

Legendo Majora

pri

Sankta Francisko



## PRESENTADO

S. Bonaventuro (1221-1274) sin diris nedigna kaj ne kapabla verki pri homo tiel sankta kiel Francisko, kaj, ke mem tion ne entreprenintus se ne puŝite de la urĝaj invitoj de la kunfratuloj, kaj insistoj de la Ĝenerala Kapitulo de Narbono kaj, precipe, de la amo kaj dankemo kiujn li ŝuldis al la Serafa Patro (oni bolvolu legi la ĉefinan noton de la tradukisto).

Eliris tiel el lia plumo elstara verko, himno sonora pro vero kaj belo kaj trapenetrita je penetriga gracio.

Pravis sankta (Akvina) Tomaso eligi kiam, dum vizito, lin trovis tute sola, enfermita en propra ĉelete, tute absorbita el la zorgata verko: *Ni lasu sanktulon por sanktulo labori* (sinamus sanctum pro sancto laborare).

La Serafa Doktoro konis la virton de Francisko ankaŭ pro sia sperta praktikado en si mem, en sia korpo kaj animo. Kaj per intuicio propra al sanktuloj legis en lia penso, en lia koro, kaj pli ol iu ajn lin interpretis.

Certe li prenis el aliaj biografioj kiel el la Spirano kaj kopiis el la Celano. Tion konatas al multaj. Ankaŭ mi tion povis konstati pretigante la esperantigadon kiun mi nun havas la plezuron prezenti al karaj amikoj.

Sed se oni atente rigardas la formon kiun li donas al la materialo kolektita, al la aldonajoj, al la modifaĵoj faritaj sekve de oportunaj enketoj kaj fine al la eroj, ne malmultaj, tute liaj, oni sin trovas antaŭ al la vera Francisko.

Panegiron nomas aliaj la Legenda Major (Majora Legendo). Jes, sed pro ĝia ĉarmo, kiu tamen entenas nuran veron kaj restas evidente unu el la plej fruaj kaj prestiĝaj biografioj de la Malriĉulo el Asizo.

Armando Zecchin

## ANTAŬLEGO

### 1. Anĝelo de paco

“*Aperis la graco de Dio, portante savon, tiujn lastajn tempojn (Tit 2,11)*”, en lia servisto Francisko.

Aperis al ĉiuj kiuj, vere humilaj kaj ŝatantaj pri la sankta malriĉeco, admirante en li la superabundan dian mizerikordon, estas altiritaj de lia ekzemplo rezigni ĉiujn malpiecon kaj mondumecajn allogojn, por vivi laŭkonforme al Kristo, en arda atendo de la beata espero.

La altega Sinjoro direktis sian rigardon, kun granda bonvolemo kaj afableco, al Francisko, vola senhavulo kaj korpentanta.

Lin Li surlevis, almozulon, el la vana polvo de l' mondo, lin igis observanto kaj kondukanto kaj disvastiganto de la evangelia perfekteco, kaj lin konstituis lumo al la popoloj por atesti pri la lumo kaj antaŭprepari al la Sinjoro la vojon de la vero kaj paco en la koro de fideluloj.

Kaj vere *kiel matena stelo tranebule* (Sir 50,6), li lumiĝis per splendaj brilegoj je vivo kaj saĝo, kaj direktis al la lumo, per klaregaj radioj, tiujn kiuj kuŝis en la tenebroj kaj ombro de morto.

Kaj *kiel ĉielarko inter majestaj nuboj* (Sir 50,8), montrante en si mem la signon de la elsinjora deveno, li anoncis pacon kaj sannon, anĝelo ankaŭ mem je vera paco, destinita de Dio, kiel la antaŭanoncanto Johano, prepari, en la monda dezerto, la vojon al la altega malriĉeco, kaj prediki, per ekzemplo kaj predika instigo, la pentofaron.

Preparite de la dia graco, kaj levite poste per la meritoj de sia elstarega virto; plenplene je profeta spirito kaj destinite al tasko de la anĝeloj; ardiĝinte je serafa amo kaj, kiel ege honorinda estulo, alten levite de fajra ĉaro, li estas pravego taksata kiel eniran-

to la mondon en la spirito kaj virto de Elija.

Oni rajtas ankaŭ diri ke mem estas la anĝelo venanta el oriente, kun la signo de la Dio vivanta, laŭ la vido, ĉe la malfermo de la sesa sigelo, de alia amiko de la Edzo, nome la apostolo Johano: *“mi vidis alian anĝelon kiu supreniris el oriento kaj portis la sigelon de la Dio vivanta (Ap. 7,2)”*.

## 2. Mesaĝisto el Dio.

Jes, estas Francisko tiu heroldo de Dio, tiom kara al Kristo, inda je nia imito kaj admiro de la mondo.

Tion evidentege proklamas lia sankteco, kiu lin igis, en ĉi-tero, laŭpurece simila al la anĝeloj kaj ekzemplo por la perfektaj sekvantoj de Kristo.

Puŝas nin tion kredi, kun fido kaj pieco, la misio al li destinita prediki, ke oni larmu kaj ploru, surmetu sur sin sakaĵojn, kaj marku per la litero *Taŭ* la fruntojn de tiuj homoj kiuj ĝemas kaj ploras (Jes 22,12; Jeh 9,4).

Tio al ni konfirmas, per nebremsebla vero, la sigelo similiganta al Krucumita Kristo, stampita sur lia korpo, ne de naturo kaj artifiko, sed de la admira potenco de la Spirito de la Dio vivanta.

## 3. Kialoj motivantaj tiun verkon

Nedigna mi min kalkulis kaj nekapabla verki pri homo tiel sankta. Kaj ne min koncedintus al tiu malfacila intrepreno se mi ne estintus pelita de la amsenta deziro de la frataro kaj de unuanima peto de la Ĝenerala Kapitulo<sup>1</sup>.

Min al tio devigis ankaŭ la granda devoteco al la honorinda Patro. Helpe de li mi estas viva. Mi lin memoras kiel nun agantan sur min. Pro lia propetado Dio min deŝiris el la faŭkoj de nepri-dubinda morto certa kiam mi estis infano.

---

<sup>1</sup> En Narbono 1260.  
Legendo majora

Estas tia vere la precipa motivo, kiu devigis min akcepti tiel malfacilan taskon. Mi estas sava en la korpo kaj en la animo per liaj meritoj. Mi konas, do, lian virton ĉar mi ĝin spertis en mi mem. Ĉu li mem min ne kulpigus je sendankemo kaj ĉiu alia, post tio ĉio, se mi refuzus laŭde rakonti pri li?

Mi kolektis tial, kiel plej eble, la infornojn pri la virtoj, la agoj kaj vortoj rilate lian vivon, nome jam neglektitaj kelkaj, disperditaj aliaj, por eviti, ke proforgese ili malaperu pro forpaso de tiuj kiuj estis al li kunuloj.

#### 4. Esploroj kaj metodo.

Por ke la aŭtentika historio transdonenda al la posteularo al mi efektiviĝu pli certa kaj pli konvinka, mi iris al Asizo, lia naskiĝurbo, al la lokoj kie li travivis siajn tagojn kaj kie mortis.

Mi faris diligentajn esplorojn ĉe la postrestintaj familianoj kaj, laŭ aparta maniero, ĉe kiuj estis atestantoj kaj la unuaj sekvantoj de lia vivo, al kiuj ŝuldeblas ĉiu laŭdo, pro ilia travivo kun li kaj pro ilia persona sankteco.

Mi ne taksis oportune uzi elegantan stilon en la rakontado pri la agoj kiujn Dio degnis plenumi pere de sia servisto. Devoteco de la leganto kreskas pli per la simpleco ol per ornamita parolado.

Nek ĉiam mi enteksis la historion laŭ kronologia ordo por eviti konfuzon. Mi preferis ĝin ordigi, male, laŭ objekto, tiel ke la eventojn okazintajn en diversaj tempoj mi povis katalogi laŭ la diversaj materioj; kaj farojn deverstempajn mi kunigis en la respektiva temo.

#### 5. Listo de la ĉapitroj

La komenco, la travivo kaj la vivfiniĝo estas priskribitaj laŭ dekkvin ĉapitroj, tiel ĉi-sube listigitaj.

En la unua ĉapitro mi temas pri la vivo en sekulara vesto **p. 8**;

en la dua, pri la perfekta konvertiĝo al Dio kaj pri la riparaĵoj en tri preĝejoj **p. 13**;  
en la tria, pri instituiĝo de la religio<sup>2</sup> kaj pri la aprobo de la Regulo **p. 21**;  
en la kvara, pri la kreskiĝo de la Ordeno kaj pri la aprobo de la Regulo **p. 29**;  
en la kvina, pri la aŭstereco je vivo, kaj kiel la kreaĵoj flegis al li konsolon **p. 38**;  
en la sesa, pri humileco kaj obeo kaj diaj indulgoj al liaj deziroj **p. 47**;  
en la sepa, pri amo al la malriĉeco kaj pri la admiraj anstatuajoj pro la manko de bonaĵoj **p. 57**;  
en la oka, pri la piemo, kaj kiel la senracihavantaj estaĵoj al li estis obeaj **p. 67**;  
en la naŭa, pri la karitata ardo kaj deziro je martiriĝo **p. 78**;  
en la deka, pri amo kaj virto de preĝado **p. 86**;  
en la dekunua, pri la komprena enpenetro en la Skribojn kaj pri la profeta vivo p. 93;  
en la dekdua, pri la efiko de la predikado kaj pri la dono de sanigado **p. 103**;  
en la dektria, pri la sanktaj stigmatoj **p. 112**;  
en la dekkvara, pri la pacienco kaj morto **p. 120**;  
en dekkvina, pri lia sanktul-proklamiteco kaj transporto de lia korpo **p. 125**;  
laste, estas aldonataj rakontoj pri iuj liaj mirakloj okazitaj pro lia propeto post lia forpaso **p. 130**.

---

<sup>2</sup> Per tiu termino, je mezepoka origino, estas indikata la nova ordeno.  
Legendo majora

## Ĉapitro unua

### FRANCISLO EN SEKULARA VESTO

#### 1. Liaj inklinoj

Estis, en la urbo Asizo, homo nomata Francisko, pri kiu la memoro *estas por la beno (Sir 45,1)*, ĉar Dio, preventive per siaj gracoj lin forprenis de la danĝeroj de la mondo kaj riĉigis per ĉielaj donoj.

Li estis edukita, dumjunaĝe, meze de la vantaĵoj de la mondo, same kiel ĉiuj filoj de la homoj kaj, post iom da instruiĝo pri literaturaĵoj, destinita la mongajna komerco.

Sed, gvidate de Dio, li ne sekvis la pasiajn voluptaĵojn, kvankam meze de sensama junularo kaj mem inklinema al plezuroj, nek spite de travivo inter avaraj komercantoj ne algluiĝis al la mono, kvankam laboranta cele de gajno.

En la intimon de la juna Francisko estis enmetita de Dio granda mizerikordo al la povruloj. Tiu sinteno pliiĝante kun li ek de la infanaĝo, plenigis lian koron per tiom da bonkoreco, ke li, ne malfreŝiĝa aŭskultanto de la Evangelio, decidis donaci al ĉiuj, aparte al tiuj kiuj almozpetis je la nomo de Dio.

Kaj unufoje kiam, absorbite el la butikaj aferoj, lasis sendonacita ulon tielmaniere almozpetantan, reveninte en en si mem, tiun postkuris, lin milde donacis per almozo kaj promesis al Dio, ke mem ne plu ignoru liajn malriĉulojn ĝiseble.

Observante sekve kun nelacebla pieco tiun ligan proponon li meritis el Dio abundajn kreskojn laŭamajn kaj laŭgracajn. Li fakte diris, kiam jam estis revestita per Jesuo Kristo, ke ankoraŭ en la sekulra vivo, li ne povis paroli pri la dia amo sen senti ardan korduŝon.

Tiel granda bonvolemo, kunigita al mildeco kaj bonmaniero,



apartaj pacienco kaj afableco, korlarĝeco en donacado, eĉ trans liaj rimedoj, ĉiuj floroj de bona inklino... ĉio tio igis antaŭvidita pli abundan pluvon de gracoj por la estonteco.

Ulo en Asizo, ege simpla, inspire, laŭonidire, de Dio, kiomfoje renkontis Franciskon, etendante antaŭ ties piedoj siajn mantelon kaj vestojn, lin proklamis inda je venerado. Tiu diradis, ke tia ulo estis destinita de la ĉielo por grandaĵoj, kaj ricevonta honoron de la tuta mondo.

## 2. La dia mano

Sed ankoraŭ ne sciis Francisko la diajn planojn rilate lin.

Komisiite de la patro zorgi en butiko, inklinigita de sia naturo al la plezuroj de la sensoj, li nek kapablis sin levi sur la flugiloj de la kontemplado, nek sentis altiron al la ĉielaj bonoj.

Kaj ĉar *“trolacigitaĵoj igas komprenata la instruajon (Jeh 1,3), kaj la ŝanĝigo de la dekstra de la plej alta (Ps. 76,11)”*, jen malsano, celanta certe enirigi tiun animon en la dolĉecojn de la Spirito.

Resaniĝinte, iun tagon, elegante vestita kiel kutime, elhejmiĝis. Laŭvoje renkontis nobelfamilian kavaliron, senhavan tiam kaj ankoraŭ malbone vestitan.

Li hezitis eĉ ne momentete. Tuj li senvestis kaj per siaj vestoj kovris la malbonŝanculon.

Li sin sentis kontenta pro la duobla helpaĵo per unu sola ago: li superis sian hontemon kaj malpliigis la bezonojn de la riĉulo defalinta.

## 3. Sonĝi kavalirajn armilaron.

La sekvan nokton li spertis sonĝon intervene de Dio. Al li ŝajnis vidi grandiozan kaj belegan palacon, ene ornamitan per armilaro krucsignita por montri kiel la mizerikordo uzata de li al defalinta kavaliro, pro amo al la plej alta Reĝo, kompensendas per senegala

salajro.

Petis Francisko pri la proprietulo de tiu armilaro, kaj venis voĉo el la ĉielo tiel respondanta:

“Vi kaj viaj kavaliroj”.

Tion li memoris kiam ellitiĝis. Sed kutimiĝinta nek esplori la diajn misterojn, nek leviĝi al Dio per la kreaĵaro stuparo, li vidis en tio aŭguron por estontaj sukcesoj.

Kaj decidis aliĝi al la militekspedicio al Apulio<sup>3</sup>.

Rekrutiĝi al tiu brigado, promociiĝi kondotiero de kavaliroj: jen lia idealo. Post nemulte li tiucele ekvojaĝis; sed ĵus veninte al plej proksima urbo<sup>4</sup>, li aŭdis en la nokto la saman misteran voĉon al li parolantan:

“Francisko, kiu pli estimindas: la sinjoro aŭ la servisto, la riĉulo aŭ la malriĉulo?”

*“Sendube la sinjoro kaj la riĉulo”.*

“Kial do vi forlasas la sinjoron por servi la serviston, Dion por la homo?”

*“Kion volas, Sinjoro, ke mi faru?”*

“Revenu Asizon. Alimaniere interpretendas la sonĝo. En ĝi estas anoncata spirita evento kiun en vi plenumos ne la homo, sed la Sinjoro”.

Frue, ektagiĝon, li reprenis la revenvojon, feliĉa kiel neniam antaŭe. Kaj jam obeema al la ĉiela voĉo, el ĝi ekatendis la ordonojn.

#### 4. En la silento

Post tio, eskapinte el la butikada bruego, li devote preĝadis por ke la Sinjoro senvualu, laŭ preciza maniero, sian volon.

Kaj dume, per la asidua preĝado kreskis en li la sopiro al la ĉiel-

---

<sup>3</sup> Subflage de Gualtiero el Brieno defendanto de ekleziaj rajtoj kontraŭ Markovaldo.

<sup>4</sup> Spoleto (centra Italio).

aĵoj kaj la malŝato al la mondumaĵoj, li sentis, ke li trovis trezoron kaj, kiel saĝa komercisto, projektis vendi ĉion por ĝin akiri.

Sed li nesciis kiel.

Du lumoj, tamen, sin igis pliefikaj en lia menso: la spirita komercado komenciĝas el la neallogiĝo por la mondo, kaj la rekruitiĝo sub la flagoj de Kristo ekas el la neniigi pri si mem.

## 5. La leprulo

Plejbaldaŭe li ekpraktikis tiaĵojn.

Li rajdadis, iun tagon, tra la ebena estendiĝanta ĉirkaŭ Asizo kiam certamamente, li vidis leprulon. Li paliĝis pro timo kaj hororo, kaj ekkomencis galope retiriĝi. Sed tuj rememorante la proponon akiri pli perfekta konduton kaj neceson sin venki por fariĝi kavaliro de Kristo, unusalte teren metis piedojn kaj ekrapidi lin brakumi. La leprulo kiu, kiu jam etendis la manon por ricevi materian helpon, ĝuis je mono kaj kiso.

Resuriris la selon Francisko kaj malgraŭ gvate ĉirkaŭrigardante tra la vasta kaj aperta kamparo nenium vidis: la leprulo estis malaperinta. Pro tio li ŝoke miriĝis sed samtempe sentis intensan ĝojon, tiel ke li dolĉe ekkantis al la Sinjoro spertante en sia koro deziron pri animiĝoj eĉ pli altaj en la vojo al la ĉielo.

Li serĉadis do ermitajn lokojn, nome taŭgaj por la ĝoja larmoj.

Tie asidue preĝante tra neesprimeblaj suspiroj, iun tagon, konceditan al pli grandaj raviĝoj kaj fervoroj, li estis elaŭdita de la Sinjoro: Jesuo sin montris kiel enpikita en kruco.

Je tiu vido li ekeliris for de si mem kaj la pasiono de Kristo sin stampis en lia koro tiel vive, ke li ĝin ne povis memori sen larme plori, kiel tion deklaris li men proksime de sia morto.

El tiu apero li konvinkiĝis ke Jesuo intencis diri: *“Se vi deziras veni post mi, levu vian krucon kaj sekvu min (Mt 16,24)”*.

## 6. Kompato al malfeliĉuloj

Ek de tiam li sin revestis per spirito de malriĉeco, de humileco, kaj ardo de profunda pieco.

Kaj dum antaŭe abomenis ne nur la proksimecon sed ankaŭ la laŭvidan renkonton eĉ malproksiman kun leprulo, ek de tiu momento, pro amo al krucumita Kristo kiu, laŭ la profeta vorto, aperis malŝatinda kiel unu el ili, tiujn li ekservis gracie, humilece, ameme. Tion li faris por neniiĝi sin mem: ilin tial ofte vizitadis ĉe ilia loĝejoj, liveris al ili abundajn almozojn kaj kisis kun vera pieco iliajn lipojn kaj manojn.

Al almozuloj ne nur donacis siajn bonaĵojn, sed deziris doni tute sin mem. Foje li eĉ sin senvestis je siaj roboj, aŭ ilin malkudris aŭ disŝiris, por donaci eron al ĉiu, ĝis kiam nenio plu restis en sia manoj.

Ne preterlasis li helpi, kun riverenco kaj pieco, ankaŭ malriĉajn sacerdotojn, ĉefe rilate la poraltarajn ornamaĵojn por povi partopreni dian kulton kaj malpliigi la bezonojn de la eklezio.

Iam pilgrime en Romo por viziti la tombon de sankta Petro, vidinte grandan amason da povruloj ĉe la pordo de la templo, puŝite de kortuŝeco kaj amo al malriĉeco, li interŝanĝis siajn vestojn kun tiuj de la ulo plej ĉifona inter ili. Kaj surtenante tiajn vestojn pasigis tutan tagon en ilia kompanio, esprimante ĝojojn.

Li zorgis ankaŭ, grandvigle, mortigi la aĉajn emojn de sia karno. Li volis, fakte, portis en sia korpo la krucon de Kristo, kiun li permedite gravuris en sia koro.

Tiaĵojn faris Francisko ne jam vestita je religiula vesto, nek jam apartigita el la mondo.

## Ĉapitro dua

### KOMPLETA KONVERTIĜO DE FRANCISKO KAJ REPARADO DE TRI PREĜEJOJ

#### 1. Sankta Damiano

La humila Diservisto nenialian gvidon havis ol Kristo. Kaj la dia indulgo ankaŭ jenon aldonis, nome ofte lin viziti per nedireblaj ĝracaj ĝojoj.

Elirinte iun tagon por mediti tra la kamparo, li sin trovis najbare de la preĝejo Sankta Damiano, kiu montris ekruniĝon pro ĝia troa antikveco.

Insirite de Dio, li en ĝin eniris.

Ĉe la piedoj de la Krucumito li ekpreĝis kun arda fervoro dum lia animo superabundis je ĝojo.

Poste direktis la larmantajn okulojn al alto, kaj sin sentis trafi la orelojn per mistera voĉo.

Tiu voĉo eliris el la lipoj de la krucumita Jesuo, kaj estis direktita ĝuste al li. Laŭ tri fojoj aŭdiĝis: “Francisko, riparu mian domon kiu, kiel vi vidas, estas tute ruiniĝanta”.

Soleca en la preĝejo, li ektimis, fakte li tremis kiel folio.

Sed poste, meditante pri tiuj diaj vortoj, li kaptiĝis el ekstazo.

Reveninte en si mem, ekpreniĝis el unusola penso: ripari la domon de Dio, tiun en kiu li antaŭ preĝis.

La intenco de Kristo, tamen, almenaŭ la precipa, celis la universalan domon, nome tiun de la animoj, kiun li akiris per sia sango.

Li tion komprenos poste, per dia inspiro, kaj tion diros al siaj fratuloj; tiam, dume, li tute okupiĝis pri tiu materia.

Sen minimuma hezito, tuj, post krucsigno, decidis kion fari: sin

ŝarĝi, el la domo, je stofoj kaj kuri al Foligno por vendi ĉion, ankaŭ la ĉevalon. Kaj li sukcesis en la afero: estis bonŝanca komercisto Francisko!

Poste li revenis al Asizo, nome al sia preĝejo, kien enirinte kun granda pia sinteno kaj renkontante la tiean sacerdoton, kiu reale kaj aspekte malriĉis, kun profunda riverenco al tiu ofere transdonis la tutan enspezon, eldirante siajn planojn kiuj konsistis en la riparado de la preĝejo kaj restado laŭ kelke da tempo ĉe li.

Ke li restus ĉe li, ne provis ĝenon la surprizito: sed akcepti la monon ne konsentis ĉar la mono povis aparteni ankaŭ al parencaro.

Kaj la malŝatanto de la trompigaj riĉecoj tiam flugigis la saketon sur fenestrobreto. Li ĝin forlasis kiel limon.

## 2. Katenita

Infirmiĝis pri ĉio lia patro, kiu senmalfrue kuris, kun perurbita animo, tien.

Francisko, apenaŭ novico en la agono de Kristo, sin sentis ne jam preparita alfronti lukton. Jam atingis lian oreton la minacoj, kies bruoj ekaŭdiĝis.

Li opiniis pli konvene lasi senvaporiĝi tiu kolero kaj sin kaŝis en fosajo.

Tie enfermite, li preĝis intense. Eĉ larmojn li verŝis dirante “*Sinjoro, forŝiru min el la manoj de miaj malamikoj (Ps 30,16)*”, kaj realigu la piajn dezirojn kiuj vi mem inspiris al mi”.

Li estis plenigita je ĝojo, sed komencis sin riproĉi pro tiu sia vivo de leporo.

Li ne volis esti, nek aperi, malkuraĝulo. Vekinte en si koron de leono, ekmarŝis al Asizo, tute sola.

Li tute ŝanĝiĝis en la animo, kvankam en vizaĝo paliĝanta.

Oni lin juĝis freneza. Kuncivitanoj lin kovris per koto, ŝtonoj, insultoj. Li ricevis per kriegoj kaj fajfegoj, kvazaŭ li demencus.

Kaj la Diservisto, neniel skuita kaj heziligita, eltenis ĉiujn ofendojn. Nek vorto eliris el lia buŝo.

Aŭdis Bernardono tiun bruegon, kaj eksciis, ke la mokcelo estas sia filo. Tuj li alkuris, ne por pli lin defendi, sed por lin pli mal-freŝigi. Formetinte ĉiun piecon, li lin kuntrenis hejmen, kaj post malkaresado per kriegoj kaj frapoj fine lin katene legis.

Sed Francisko fariĝis ĉiam pli forta, pli resoluta daŭri en sia ege malfacila propono. Kaj silente en la animo pensadis: *“Feliĉaj tiuj kiuj estas persekutataj pro justeco ĉar ilia estas la regno de la ĉieloj (Mt 5,10)”*.

### 3. Liberigita

Post kelkaj tagoj, la patro devis vojaĝis for.

Kaj tiam la patrino, neniel konsentante pri tia peza rigoro, kaj des malpli esperente fleksi la heroecan konstantecon de la filo, kaptis la oportunon por lin malligi el katenoj kaj lin lasi libera sekvi siajn novajn inklinojn.

Francisko dankis al Dio, kaj revenis al sia loko.

Sed okazis sceno en la familia hejmo, ĉe la reveno de la patro; kaj kiu pagis la konton estis la kompatinda patrino (Madono Pika, el Francio) pro la furio, krioj kaj riproĉoj de la edzo. Tiu ĉi deliris kiel toro vundita kaj estis jam decida aŭ lin deturni el tiu intenco aŭ de li liberiĝi lin forpelante por ĉiam.

Konsilite de Dio, ĉi-foje iris renkonten al li Francisko, per vortoj klaraj kaj senkaŝaj: “Dolĉaj jam fariĝis por mi la katenoj, viroj kaj turmentoj eĉ plej kruelaj”.

Senrezulta okazis ĉiu peno. La avara patro depostulis tiam tuj kaj senescepte la monon.

Francisko tiun al li fingromontris: “Tie en la polvo, sur la fenestrobreto”.

La patro avide ĝin ekkaptis kaj laŭmomente mildiĝis lia kolero.

#### 4. Antaŭ la episkopo.

Poste, la laŭkarna patro provis kondukigi la laŭgracan filon, jam rezignintan je mono, antaŭ al episkopo, por ke en ties manoj, li rezignu ankaŭ la patran heredaĵon kaj redonu kiom ajn ankoraŭ restantan ĉe li.

La vera ŝatanto de malriĉeco hezitis eĉ ne minuton.

Jen li antaŭ la episkopo.

Li ne atendas la verdikton, nek sin defendas. Fulmorapide, je ĉeesto de ĉiuj, li sin senvestas kaj redonas la vestojn al la patro.

Estis vidite tiam, ke liajn flankojn mordis pentozono. Tiun li kaŝis sub la morbidaj vestoj.

Kaj al li tio ne sufiĉis. Ebria en la animo pro intensa fervoro, ankaŭ je la kalzono li sin senvestis ĝin teren ŝetante, kaj tutnude rigardante la patron ekkriis: “Ĝis tie mi vokis, surtere, patro vin, ek de nun mi povos diri tutevere «Patro nia kiu estas en la ĉielo», en kiu mi lokis ĉiun bonon kaj ĉiun fidon”.

Ĉe la neatendita ago de la homo de Dio, la episkopo tuj surpiede elstariĝis kaj, kompatema kaj bona, kuris larmante lin brakumi kaj lin kovri per sia manto. Poste ordonis al la servistoj porti ion stofan por kovri la nudajn membrojn de Francisko.

Oni prezentis disŝiritan manton jam forlasitan de la legomisto. Tia estis la vesto de la homo krucumita kaj duonnuda.

Kaj li pludankante, per ŝtonosplito hazarde trovita trapiede, sur ĝi desegnigis grandan krucon kaj tiun robon sin ŝetis surŝultren.

Tien estis koncedite, al la servisto de la granda Reĝo, sekvi nude la nudan Krucumiton kiun li amis, provizitan tamen je la kruco, volante konfidi sian animon al tiu sava ligno, per kiu li povus savite eliri el la ŝippereo de l' mondo.

#### 5. En neĝa fosaĵo



Liberigite el ĉiu ligo, la malŝatanto de la mondo direktiĝis al solecaj lokoj, fore de ĉiuj. Li volis percepti la dian voĉon en la silento tra arbaroj.

Sed trairante arbaran sovaĝejon, kaj ĝoje kantante al la Sinjoro en la lingvo de Francio, jen ekaperis ŝtelistoj el la makiso

- Kiu vi estas?

- Ĉu mi? Mi estas la heroldo de Dio!

- Krevu tie, kruda diheroldo!

Kaj kiel kokido li sin trovis, post nemalabunde da batoj, en neĝbano.

Sed tian sian kvaliton li eldiris konvinkite. Dio certe al li inspiris. Fakte ĝi estis eldiro profeta.

Kiam poste tiuj vizaĝaĉoj ne plu videblis, skuinte la neĝon el korpo, li rapide eliris el la neĝfosaĵo, feliĉe reekis sian kanton. La voĉo eliris el li pli klara, pli sonora ol antaŭe.

## 6. Inter leprularo

Atinginte najbara monaĥejon, li kiel senhavanto almozis panpecon por havigi al la stomako malplena kaj al korpo duonnudation da kvietigo.

Tion li ricevis, sed la traktado estis grave severa. Lin oni taksis trampo kaj propravola netaŭgulo.

De tie li envojaĝis al Gubbio, kie li estis komplezeme akceptita ĉe sia malnova amiko kaj kovrita per sakvesto kiel konvenas por povrulo Kristimitanto.

La ŝatanto de vera humileco sin portis, poste, ĉe la leprularon kaj loĝis kun ili; kun amemo kaj patrina zorgo servis ĉiujn. Li lavis al ili la piedojn, bandaĝis ulcerojn, despremimis pusaĵojn kaj aspergis la plagojn; kaj ankaŭ kisis tiujn ulcerajn plagojn kun admira elkoreco, la estonta samariana kavaliro.

La Sinjoro lin premiis pro tia spirito de profunda humileco

kaj viva karitato favore al lepruloj: lin riĉigis per la sanigdono, ne nur rilate la korpajn malsanojn kaj ankaŭ tiujn spiritajn. Mi memorigas unu el multaj mirakloj, fariĝintan per lia interveno kiam lia famo estis jam vastigita.

Kompatinda viro de la kamparo de Spoleto, ronĝita ĉe la mackelo kaj buŝo pro nekuracebla malsano, reveninte el Romo kien li pilgrimis al la tomboj de la apostoloj por propeti diajn favorojn, trafis Franciskon.

Ĝisteren kliniĝis por kisi liajn piedojn tiu kompatindulo, sed la Diservisto eskapis for kaj, poste, mem enpremis varman kison sur tiuj ekdetruigintaj lipoj.

Malaperis tuj la morbaĵo. La paciento estis resanigita komplete kaj porĉiame.

La humila servisto de lepruloj lin resanigis per la simpla kontakto de siaj lipoj.

Nun mi ne scias kion pli admiri: aŭ la heroecan humilon de tiu kiso tiel favorporta, aŭ la eksterodiarecon de la miraklo.

## **7. Triumfo de la heroo**

Firmigite en la humilo de Kristo, Francisko revenas, en siaj pensoj, al sia preĝejeto kaj tien direktas siajn paŝojn.

Al li necesas nun venki ĉiun specon de hidecsenton pro amo al sia Krucumito.

Li devas peti hehpon, almozi ŝtonojn, etendi la almozantan manon ankaŭ al tiuj kun kiuj, iam, rivalis per lukso, kaj submeti siajn magrajn ŝultrojn al la grava pezo de la ŝtonoj.

Triumfas la heroo eĉ super tio.

Kaj la preĝejeto de Sankta Damiano estis rifarita, kun la helpo de la Sinjoro kaj la kooperado de la devota popolo.

Poste, malamikante al nenifaro kaj al sia korpo, li iris riparadi alian, tiun dediĉitan al sankta Petro, multe for de la urbo, pro la viva

fido kaj aparta devoteco kiujn li havis al la princo de la apostoloj.

## 8. Porciùnkola

Readoptitnte ankaŭ tiun, li retiriĝis en loko nomata Porciùnkola. Kie situis antikva preĝejo, dediĉita al la ege beata Virgo Maria Dipatrino, sed tiam tute forgesita kaj forlasita.

Ĝin vidinte en tia larmebla stato, la homo de Dio, tiom devota al Suverena Ĉiel- kaj Ter-Reĝino, decidis tie ekloĝi por ĝin restaŭradi.

Enpensigante poste ke, komforme al la nomo “Sankta Maria de la Anĝeloj”, certe tiuj beataj spiritoj ofte malsupreniras ĝin viziti, pro devoteco al tiuj ĉi kaj precipe pro aparta amo al la Patrino de Kristo, tiun lokon li elektis sia loĝejo.

Li amis tiun lokon pli ol iun ajn lokon en la mondo. Ĉi tie, fakte, en tia humileco, estiĝis komenco de ĉio, ĉi ie li progresis de virto al virto, ĉi tie li gajnis la kulminon de la evangelia perfekteco. Kaj en la hora de morto ĝin rekomendis al sia fratuloj, kiel la plej karan al la Virgulino.

Indas esti memorata vizio perceptita de fratulo dum mem ankoraŭ travivis sekulare. Iun tagon li kredis vidi sennombran kvanton da blinduloj ĉirkaŭ tiu dezerta preĝejo.

Surgenue, la okulojn senvidaj kaj palmojn levitaj al la ĉielo, ili ploris kompatekscite. Ili propetis pardonon kaj vidpovon. Certamamente, fasko da blindiga lumo ilin atingis el alto, ilin ĉikaŭvolvis kaj sanigis ĉiujn jen en la okuloj jen en la animo.

Estas tie la loko kie la Beata Francisko, per dia invito, estigis la ordenon de la Minoraj fratuloj.

Tri preĝejojn li refaris antaŭ ol krei sian ordenon kaj sin dediĉi al la evangelia predikado. La dia Providenco kiu al li jam sugestis tion, volis montri tiel liajn sinsekvajn ascendojn el la materiaj zorgoj al tiuj spiritaĵoj, el la minoraĵoj al la maĵoraĵoj, kaj antaŭvidi, laŭ sensa maniero, la mirindajn liajn estontajn farojn.

Fakte, same kiel la tri materiaj preĝejoj, eĉ la Eklezio de Kristo estus poste releviĝonta sekvante liajn vivformon kaj la Regulon kaj la instruaĵojn. Kaj estus ankaŭ, per triobla milico, atingita triumfo, kiel la faroj atestas.

## Ĉapitro tria

### INSTITUIĜO DE LA ORDENA RELIGIO KAJ APROBO DE LA REGULO

#### 1. Komenciĝo de la Ordeno

En la preĝejeto “Sankta Damiano”, ĉe la piedoj de altaro spirĝeme preĝadis Francisko al la Virgulino Dipatrino, por ke ŝi farĝu lia dolĉa advokatino.

Kaj ne estis senefikaj tiuj humilaj kaj konstantaj preĝoj.

Per propetado de tiu kiu konceptis la Verbon gracplenan kaj verplenan, li obtenis ke eĉ mem konceptu kaj generu evangelian spiriton.

Partoprenante fakte, iun matenon, meson honore de la apostoloj, li aŝkultis tiun evangelian segmenton kie la dia Majstro instruas la disĉiplojn la manieron vivi en la mondo: “*Ne provizu oron nek arĝenton nek kupron en viajn zonojn, nek saketon por vojaĝo, ne du tunikojn, nek ŝuojn, nek bastonon (Mt 10,9)*”.

Francisko ĉion bone komprenis kaj stampis en sia menso. Absorbite en nedirebla ĝojo, li tuj ekdiris: “Estas ĝuste tio kion mi volas: estas tio kion el la korprofundo mi deziras”.

Li malligas la piedojn el la ŝuoj, forĵetas la bastonon, ek malŝatas la saketon kaj la monon, forlasas la zonan.

Kovrite je simpla tuniko, strikta je flankoj per humila zono, li ekpripensas kiel aktualigi la vortojn de la Sinjoro kaj ĉiuaspekte sin konformigi al la regulo de la evangelia perfekteco.

#### 2. Paco kaj bono

Ek de tiam komencis la homo de Dio gigante progresi tra la entreprenita vojo, kaj inviti ĉiujn al la sama pentofaro.

Liaj vortoj ne estis senefikaj, nek indaj je moko, sed redundancaj je graco. Ili penetris la kormedolon kaj movis al ploro.

Dio inspiris al li la salutoformon: “La Sinjoro donu al vi la pacon”. Tiel li ĝuste komencis en siaj predikoj.

Kaj pacon kaj sanon li anoncis kaj predikis al la popoloj, laŭ la profeta vorto, estante eĉ mem profeto.

Kaj al la Krista paco li revenigis tiujn kiuj el ĝi jam estis foraj.

### 3. Bernardo

Disvastiĝis la famo de la doktrino simpla kaj de vivo evangelia de la homo de Dio; kaj iuj, altiritaj el la admira ekzemplo, forlasinte ĉiun bonaĵon, lin eksekvis por imiti lian vivmanieron.

Unua inter ĉiuj venerinda homo Bernardo, kiu meritis, en la dia alvokiĝo, estis la unuenaskito de la beata Patro, jen laŭ tempo jen laŭ privilegio de sankteco.

Informite pri la virto de Francisko, Bernardo proponis en sia koro lin sekvi kaj forlasi la mondon.

Sed nescia pri kiel tion fari, li petis konsilon al la sanktulo.

Kaj la homo de Dio, ĝojante pro la nova ido koncipita, tiel respondis: “El Dio al ni alvenos tia lumo”.

Ektagiĝinte, ili eniris la preĝejon dediĉitan al sankta Nikolo kaj, post humila kaj fervora preĝo, la devotulo al la Sankta Triunuo trifojajn malfermis la evangeliaran libron, petante al Dio, ke per triobla atesto konfirmu la sanktan decidon de Bernardo.

La unuan fojon prezentiĝis la legaĵo: “*Se vi volas esti perfekta, iru, vendu viajn posedaĵojn kaj donu al malriĉuloj (Mt 19,21)*”.

Poste: “*Portu nenion por la vojaĝo (Lk 9,3)*”

Kaj fine: “*Se iu volas veni post mi, li abnegaciu sin mem, kaj levu sian krucon kaj sekvu min (Mt 16,24)*”.

“Tiu – firme diris la sanktulo – estas la vivo kaj la regulo niaj

kaj de tiuj kiuj volus nin sekvi. Iru, do, se vi volas esti perfekta, kaj tion ekpraktiku”.

#### 4. Egidio

Postnelonge, kun aliaj kvin, logataj de la sama spirito, fariĝis ses la filoj de Francisko, el kiuj la tria estis Egidio, homo tute dediĉita al Dio kaj inda je senmorta memoriĝo.

Li estis aspekte kruda kaj simpla, sed, kreskante de virto al virto, li atingis, kiel antaŭvidis la servisto de Dio, la plej altan kontempladon.

Tiom da tempo li pasadis en la mensleviĝoj al Dio, kaj tiom ofte li estis ekstaze ravita, kiel mi mem povis vidi per tiuj ĉi miaj okuloj, ke ŝajnis, ke li trenus vivon pli anĝelan ol homan.

#### 5. Silvestro

En tiu sama tempo spertis vizion edifema asiza sacerdoto, nome Silvestro,

Li jam taksinte, laŭ homa optiko, la vivo-ennoviĝon de Francisko kaj ties kompanuloj, ĝin abomenis. Kaj por ke li ne pere-iĝus pro juĝo-temerareco, Dio volis lin vizitis per sia graco.

Li al li sonĝigis drakon je senmezura grandeco, kiu, brakumante per sia senfina korpo la urbon Asizon, ŝajnis ĝin tute detruiri.

Sed jen ekbrilegis ora kruco. Tiu eliris el la buŝo de la sanktulo. Ĝia supro tuŝis la ĉielon kaj ĝiaj brakoj etendiĝis ĝis la teraj forlimoj.

Tion vidante, la drako malaperis.

Trifoje ripetiĝis tiu sonĝo.

Kaj Silvestro, opiniinte ke tio estas dia sugesto, rakontis ĉion al Francisko kaj ties fratuloj, kaj kiel eble plej baldaŭ decidis unuiĝi al sekvantaro de Kristo per tia persistemo en la religiula vivo, ke li ne lasis iun ajn dubon pri la realeco de la vizio.

## 6. Certigoj el la ĉielo

Ne fiere orgojlis pro tia vizio la sankta homo de Dio, sed rekoninte la bonecon de la Sinjoro en tiuj bonfaroj, sin sentis eĉ pli instigita elnestigi el la animoj la ruzan serpenton kaj prediki la triumfojn de la kruco.

Iun tagon, dum en ermita loko larmante pripensis, kun malĝojo en la animo, la pasintajn jarojn, li perceptis kun intensa ĝojo en sia eno voĉon dirantan: “Francisko, viaj pekoj estas tute pardonitaj”.

Tiu voĉo kaj tiu ĝojo elvenis el la Sankta Spirito.

Francisko ekstaziĝis kaj absorbiĝis en admira dia lumo. Li vidis en ĝi, per suna klareco, sian estonton kaj tiun de siaj filoj.

Poste li revenis ĉe siajn fratulojn, kaj tiel al ili parolis: “Konsoliĝu, ĝoju en la Sinjoro, ho miaj filoj; kaj malgraŭ ke ni estas nombre tiel neatentindaj, vi ne malkuraĝiĝu kaj ne vin timigu mia kaj via eteco. Kreskos la humila grego, ĝi etendiĝos ĉiuloke, kaj kun multe da fruktoj. Dio al mi tion rivelis”.

## 7. Por la mondo

Postnelonge alia, spirite vere sambona, venis por sin kunigi al la malgranda kunestado. Kaj estiĝis sep la filoj de Francisko.

Tiam la piecplena Patro ĉiujn volis ĉirkaŭ si. Li parolis pri la ĉiela regno, malŝatindaj mondumaĵoj, rezigno al sia volo, kaj mistrakto de la karno.

Poste malfermis ankaŭ sian animon, kaj montris la ardan deziron ilin sendi al ĉiu el la kvar ĉefaj mondflankoj.

Jam la sterila kaj tute senhava lia simpleco generis sep filojn, kaj tuj ekdeziris akuŝi al Kristo la homaron tutan ĝin invitante al pentofaraj larmoj.

“Iru - diris la dolĉa patro - iru, ho miaj filoj, anoncu pacon, prediku pentofaron, pardonon de la pekoj. Paciencu en suferoj, en pa-



roloj modestu, senlaciĝu en laborado, insistu en la preĝado, estu seriozaj kaj dignsintenaj kaj dankemaj pro la favoroj. Eterna reĝo pretiĝas pro vi en la ĉielo, se vi tiel vivos”.

Humile terkliniĝis, antaŭ la piedoj de la patro, la filoj, kaj korgoĵante ricevis la taskon de la sankta oboe. La Diservisto al unu post la alia diris: “*Metu vian ŝarĝon sur la Sinjoron, kaj Li vin subtenos (Ps 54,23)*”. Tia esprimo estis kutima sur liaj lipoj kiam li donis precepton al sia fratulo.

Ankaŭ li, fariĝanta por la aliaj ekzemplo kiu praktikas antaŭ ol instruas, kuniĝis al unu el ili.

Kaj tiel duope-duope, ekdispartiĝantaj krucforme, sin disigis kaj dispartigis la mondon.

Pasis tamen nemulte da tempo kaj la tenera Patro sentis bezonon revidi siajn filojn. Sed kiel ilin kunkolekti? Ne povinte tion per siaj kapabloj, li preĝis, ke lin “*kontentigu kiu la elpelitojn de Izrael kolektas (Ps 146,2)*”.

Vera mirindaĵo! Postnemulte ili sin trovis ĉiuj kune. Ili si trovis ĉirkaŭ la Patro, kaj eĉ mem ne sciis kiel tiel okazis. Certe pro Dia dispozicio.

Tiujn tagojn, la nombro kreskiĝis je kvar. Kaj ili do fariĝis dekdu.

## 8. La Regulo

Francisko tiam opiniis necesa komunan normon por kunvivado. Ĝin volis verki, la Diservisto, per simplaj kaj mallongaj vortoj. Ĝi entenis la kernon de la evangelio, al ĝi li pli aldonis minimumaĵojn por unuformigi la praktikajn eksteraĵojn.

Li deziris, tamen, ke ĝi estus aprobata de la papo. Pro tio neprisiri al Romo. Sed la fratuloj, ĉe la nura penso sin prezenti, mem humilaj kaj senrangaj, antaŭ eminentulo tiel alta, laŭ la propono de Francisko, ektremis kiel folioj al forta vento.

El sia glora trono ŝatis Dio la deziron de la patro kaj la humilecon de la filoj. Ĉiujn li kuraĝigis per dolĉa vizio mesaĝigita tiam al Francisko.

Ŝajnis al tiu ĉi, fakte, marŝi laŭ vojo ĉe kies rando leviĝis arbo je granda alto; alproksimiĝinte al ĝi, kaj restante senmove por ĝin kontempli, tuj Francisko sin sentis, per dia forto, levita eĉ li alten ĝis tuŝi la arban pinton kaj ĝin facile kurbigi al malalto.

Tia vizio estis antaŭsigno. La suverena pontifiko, kun patra komplezemo, inkliniĝus antaŭ la simplaj kaj senrangaj malriĉiuloj de Kristo.

Ĉe tiu rakonto la fratuloj kuraĝiĝis kaj entreprenis, kun gaja animo, la vojaĝon<sup>5</sup>.

## 9. En Romo

Alveninte al Romo, Francisko estis prezentita al la papo, kiu, merĝita tiam en gravaj pensoj, promenadis en loko dirita “Speculum” en la Laterana palaco, lin ne ricevis, male lin forpeligis malŝate.

Sed dumnokte laŭ dia volo la papo sonĝe spektis antaŭ si altan kaj belegan arbon. Samtempe dia lumo klarigis al li la signifon de la fariĝaĵo: “Estas tiu humila frato kiun hieraŭ vi ne volis ricevi kaj forpeligis malŝate”.

La sekvontan matenon li sendis siajn servistojn tiun ulon serĉi, kiu estis trovita en la gastejo de sankta Antono, tie nemalproksime.

Li volis la fratulon tuj antaŭ si.

Kaj Francisko eksponis sian proponon kaj humile prezentis peton, ke estu aprobita sian enpaperitan Regulon.

La Vikario de Kristo, Inocento la Tria, homo je pofunda saĝo, rekoninte la korektegan intencon, la nevenkeblan konstancon kaj

---

<sup>5</sup> Majon aŭ junion 1210  
Legendo majora

la ardan decidon en vivo tuta sankta, sin montris ema al konsento; sed kredis pliprudente prokrasti. Al iuj kardinaloj tiu vivpropono estis ŝajninta nova kaj supera al la homaj fortoj.

Ĉeestis la sinjoro kardinalo de Sankta Paŭlo, episkopo de Sabina, kiu, ŝatante de ĉiu sankteco kaj protektanto de la malriĉulo de Kristo, inspirita de la Sankta Spirito, antaŭ ĉiuj ekparolis tiel: “Se ni kontraŭas konfirmi, pro ĝia tro aŭdaca kaj noveco, vivformon tiel evangelian kiel tiun ĉi, mi timas peki kontraŭ la evangelio mem. Estus, fakte, kvazaŭ se en la observo de la evangelia idealo kaj en la voto ĝin praktiki estus entenata io stranga, kontraŭracia kaj praktike nebla. Kaj ĉu al vi tio ne taksigŝas vera blasfemo kiu trafas Kriston, aŭtoron de la evangelio?”.

La posteulo de Petro, antaŭ rezonadoj tiel klaraj, adresiĝante al la simplulo, tiel diris: “Iru, filo, kaj preĝu por ke la Sinjoro montru al ni pere de vi kia estas lia volo, kaj tiel, kun pli plena sekureco, ni konsentu al viaj piaj deziroj”.

## 10. Aprobo pri la Regulo

Retiriĝis Francisko en humila preĝo kaj du favorojn obtenis: la vortojn diredajn, kaj kion la papo pro dia instigo devus senti en sia animo.

Dio al li inspiris la parabolon de la antikva reĝo, kiu edziniginte malriĉan kaj belegan virinon, generis gefilojn al si tute similaj, nutriendajn do ĉe sia reĝa manĝotablo.

Ĝin rakontis integre, kaj poste tiel konkludis: “Oni ne rajtas timi, ke mortos pro malsato la filoj kaj heredantoj de la Eterna Reĝo, kiuj naskiĝintaj el malriĉa patrino per la virto de la Sankta Spirito, laŭbilde de Kristo Reĝo, estas plie generitaj, per la spirito de la sankta malriĉeco, al religio malriĉeta. Se, fakte, la ĉiela Reĝo al siaj sekvantoj promisas eternan regnon, des pli malavare donacos al la samaj tiujn bonaĵojn kiujn li sendistinge liveras al

la bonuloj kaj al la malbonuloj”.

Aŭdinte la parabolon kaj ĝia interpretadon intime miris la Kristo-Vikario, kaj rekonis, ke sendube Dio parolis per la buŝo de sia servisto.

Kaj inspirite de Dio, li konfirmis, ke la vizio ĵusĵuse havigita de la ĉielo estis ekfariĝanta reala en tiu homo. Inocento, fakte, jam vidis en sonĝo la lateranan bazilikon ruiniĝanta, kaj viron, malgranda, malriĉa kaj malŝatebla, ĝin subtenanta per siaj ŝultroj.

“Estas tiu certe - diris la papo - kiu apogos la eklezion, kaj ĝin subtenos perverke kaj perdoktrine”.

Li sin sentis altirita al li el profunda devoteco kaj amo, preta koncedi ĉion kion tiu estus ekpetanta.

Li aprobis la Regulon, allasis al ili la prediko-permeson kaj altrudis, ke al ĉiuj laikaj fratuloj alvenintaj kun li oni sur la kapo faru malgrandan harkronon por ke eĉ ili povu libere prediki.

## Ĉapitro kvara

### PROGRESO DE LA ORDENO SUB LIA GVIDO KAJ KONFIRMO DE LA REGULO JAM VOĈE APROBITA

#### 1. **Reveno el Romo**

Helpate de la dia graco kaj de la aŭtoritato de la papo, Francisko, konsoloplena, ekmarŝis kun siaj amataj disĉiploj en la direkto de la Spoletana valo, por vivi kaj prediki la evangelion.

Dumvoje li kunparolis konversaciante pri la maniero observi la Regulon: ilin instigis vivi laŭ justeco kaj sankteco, sin ĉiam konsiderante je ĉeesto al Dio, kaj alstrebante al sia pliperfektigo per la ekzempla edifo al la aliaj. Tiel multe da tempo pasis kaj pri tio ili eĉ ne avertiĝis. Tamen ili estis vere sinfortiĝintaj pro la vojaĝo kaj falemaj pro malsato. Ĉe kiu ili zorgu pri si mem?

Ĉar neniu viva animo ĉirkaŭe vidiĝis kaj ili sin trovis foraj el plej proksima vilaĝo, ili pace kuniĝis en solitara anguleto.

Paŝbruo aŭdiĝis, abrupte. Kaj jen viro inter ili. Li portis pane-rojn. Ĝin liveris kaj malaperis.

Kiu estis? Kiu lin sendis?

Respondo floris sur la lipoj de ĉiuj: Dio! la Patro rememoris pri siaj povruloj. Pli ol en la korpo ili sentis sin reviglitaj en la spirito. Kaj la kunuloj sin repersvadis, ke iri kune kun Francisko egalvaloras havi Dion helpanta per ties ĉiuspeca favoro.

Kaj ĉiuj, plenplenaj je elĉiela konsolo, decidis, ke pro neniu kialo mem forlasos la sanktan malriĉon jam revevokeble kaj porĉiame promesitan.

#### 2. **Dubo**

En tiu sankta firma decido ili rekomencis marŝi laŭ la Spoleta valo diskutante ĉu mem devas resti en soleco aŭ sin dediĉi al la

servo de la animoj.

Sed la servisto de Dio, kiu en similaj aferoj nemulte fidis la homan saĝon, turnis sin al preĝo.

Kaj Dio parolis al lia koro: “Ne por vi sola, sed por la animoj, kiujn la demono provas fortiri el mi, vi estis vokita”.

Aŭdis atente tiun voĉon Francisko, kaj ekde tiam li ne zorgis tiom pri si kiom pri la aliaj, ekzemplon prenante el tiu kiu dignis morti por ĉiuj.

### 3. Ĉe Rivo Torto

Ili kuniĝis en forlasita loĝejaĉo najbare de Asizo kun la fidela kompanio de frato bezono kaj fratino malriĉeco.

Ili multe laboris kaj satiĝi pli per larmoj ol per pano.

Asidua estis la preĝo. Ili tamen praktikis la mensan preĝadon ĉar ne jam provizitaj je psalterio kaj brevierio ne povis kanti la kanonajn horojn. Kaj paŝtis la menson kaj koron, tage kaj nokte, je la abundega libro de l' kruco, kun senĉesaj suspiroj, puŝite de la ekzemplo kaj parolo de la Patro, kiu ne finis memorigi al ili Jesuon Krucumitan.

Lin ili iam petis. “Instruu nin preĝi”.

Kaj li ilin respondis. “Diru la Patronian kaj tiun ĉi preĝon: “Ni vin adoras, ho Kristo, en ĉiuj preĝejoj de la tero, kaj vin benas pro tio ke vi per via sankta Kruco elaĉetis la mondon”.

Ilin li instigis sin servi je la kreaĵoj, kiel je ŝtuparo por sin leviĝi al Dio, kaj Lin laŭdi en ili kaj pro ili; kaj honori per speciala riverenco sacerdotojn, kaj kredi kaj konfesi simplece kaj firme la verojn de la kredo laŭ la penso kaj instruo de la Roma Eklezio.

Kaj la fratularo konservis en sia koro la vortojn de la Patro kaj ilin praktikis kaj humile adorkliniĝis antaŭ ĉiuj preĝejoj kaj krucoj, eĉ tiujn viditajn de fore, recitante la supran preĝon.

#### 4. Fajra ĉaro

Plu loĝante en tiu loĝejaĉo, Francisko iun sabaton iris al Asizo por prediki la postan tagon, kiel oni kutimis, en la katedralo.

En mizera kaj porila hejmeto, ene de la legomĝardeno de la kanonikuloj, li kontente loĝis tiun nokton kaj ĝin tutan pasigis preĝante.

Fora kun la korpo el la filoj, tia li ne estis kun spirito.

Proksimume je la meznokto, dum iuj el la fratularo dormis kaj aliaj preĝis, vidiĝis eniri pardon de senkomforta loĝejo kaj ĉirkaŭturni tra ĝi, ĉaro brilega kvazaŭ fajro kun supre globo simila al la suno, kiu transformis la nokton al tago.

Pro tia mira lumo ĉiuj vekiĝis kaj, teruritaj, ne nur iu spektis la korpon de la alia, sed ankaŭ la intimon de la animo, nome la konsciencon.

Ili sin trovis je unu penso: “Dio per la ĉaro je fajro intencas montri al ni la mildan Patron, korpe malĉeestan sed spirite ĉeestanta, transfigurita per superaj brilo kaj ardoj, por ke, kiel veraj izraelidoj, kun fido ni lin servu, fariĝintan por ni ĉiuj ĉaro kaj gvidanto, kiel Elija”.

Estis la Sinjoro, kiu pro la preĝoj de Francisko senvualis la okulojn de tiuj simplanimaj fratuloj por ke ili admiru liajn grandaĵojn, kiel alitempe li faris al sia servisto Elizeo, kiam por lin konsoli, al li vidigis monton plena je ĉevaloj kaj fajrĉaroj pretaj ŝirmi la profeton (2 Reĝoj 2,12).

Reveninte ĉe siajn fratulojn, la sankta homo sin engaĝis esplori iliajn konsciencojn, kaj liberigi el la timoj pro tiu vizio kaj aŭguri pri la estontaj destinoj de la ordeno.

Poste li rivelis multaĵojn, tiel superaj al homa menso, ke oni prave pensis, ke la Sankta Spirito descendis sur lin, kaj ke tial oni povis lin sekvi, pro doktrino kaj vivo, kun plena sendanĝereco.

## 5. Predikanto de la Evangelio

Poste la paŝtisto de la eta grego, gvidite de la graco, transloĝiĝis kun la dek du al S. Maria de l' Porciunkola. Li volis, ke kie la ordeno, per la protekto de la Dipatrino, havis sian ekon, per la helpoj de la sama estu gvidata ĝia kreskiĝo.

Kaj de tie, fariĝinta predikanto, eklaŭiris urbojn kaj vilaĝojn, anoncante la dian regnon, ne *per vortoj sugestitaj de la homa saĝo, sed per tiuj instruitaj de la Sankta Spirito (1Kor 2,13)*.

Li ŝajnis, al la okuloj de kiu ajn observanto, homo de la alia vivo. kun la menso kaj la okuloj direktiĝintaj al la ĉielo, tien li alstrebis sendi ĉiujn. Kaj la vitejo de Kristo ekfruktis ĝermojn je dia profumo, kaj ekproduktis florojn kaj fruktojn elstarajn pro agrebleco, honoro kaj sankteco.

## 6. Dua kaj tria ordenoj

Flamigitaj fakte de lia arda predikado, multaj lin sekvis en la nova ordeno de li fondita kaj nomita Ordeno de la Pentofarantaj Fratuloj.

Li akceptis ĉiujn, pastrojn kaj laikojn, en fraŭla kaj geedziĝa stato de la unu kaj de la alia sekso, estante la vojo de la pentofaro malfermita al ĉiuj kiuj celas la ĉielon. Kaj pruveblas pro la multaj mirakloj okazigitaj perpreĝe de iuj el ili, kiom estis favore akceptata ĉe Dio tia vivformo.

Alkuris ankaŭ junaj needziniĝintaj virinoj, kiuj altiritaj el la “skolo” de Francisko sin konsekris al Dio per la porĉiama ĉastecco. Inter ili Klara, la unua planteto, karega al Dio kiel lilio, brilanta kiel stelo.

Glorita ŝi nun estas en la ĉieloj kaj de la eklezio honorita sur la tero, en Kristo spirite filino de Francisko kaj Patrino de la Malriĉaj Damoj.



## 7. Disvastigo de la unua Ordeno

Multaj, plue, aliritaj de la pieco kaj pasiigitaj pro la deziro de perfekteco, forlasis ĉiun terajn bonaĵon por sekvi Franciskon.

Kaj la vicoj de la eta greco dikiĝis ĉiam pli kaj disvastiĝis laŭ la tuta tero.

La sankta malriĉeco, sola ilia riĉeco, igis ilin pretaj al oboe, rezistantaj en laboradoj, sveltaj en la vojaĝoj.

Kaj ĉar neniaĵon ili posedis en ĉi-tero kaj nenion kortenis, sekve nenion timis perdi.

Ili sentis sin sekuraj ĉiuloke, neniam timemaj nek deturnitaj pro kiu ajn penso, kaj nek vivis zorgigite pro la morgaŭo kaj pro ekscesa serĉemo pri la vespera loĝejo.

Sennobece ekstere kaj malŝatinde laŭaspekte, ili estis por multaj mokobjekto. Sed la karitato de Kristo ilin igis paciencaj; kaj ili preferis tiujn lokojn kie, pro nekonateco, eblas pli suferi ol tiujn kie, pro iliaj konataj virtoj, ili povis akiri favoran akcepton.

Malabundo pri teraĵoj estis por ili abundo, samamniere kontentaj kaj pro la multo kaj pro la malmulto, laŭ la konsilo de la saĝulo (Ekl 29,30).

Foririnte nekristanajn landojn, iuj fratuloj trovis bonan akcepton ĉe iu saraceno. Tiu volis donaci al ili monon ĉar ili tiom malriĉis. Sed senrezulte. Sciinte, poste, ke ili tiaj sin igis pro amo al Dio, kaj ke nenion ili volis posedi, kun pli granda simpatio li sin ligis al ili per amikeco, kaj proponis donaci al ili ĉiam la necesajojn ĝis kiam al li restus ereto da bonaĵo.

Ho senpreza riĉeco de la malriĉeco, kies virto igis tiel milda la animon de barbaro! Sed, ho abomena kaj terura ĝojo de kristano kiam primokas kaj surtretas tiel noblan lekanton, laŭdŝatan de saraceno per tioma venerado.

## 8. Frato Moriko

Tiun tempon religiulo de tiu ordeno, nome frato Moriko, suferis en hospitalo najbare de Asizo pro malsano tiel grave, ke li aperis nesavebla laŭ kuracistoj.

Tamen fidoplena je Francisko, li sendis viron por petegi, ke tiu propetu ĉe la Sinjoro por lia saniĝo.

Kaj la beata patro ameme, post fervora preĝo, manprenante panpecon, ĝin bulkis en la oleo de la lampo bruliganta antaŭ la altaro de la Virgulino, per ĝi faris pilolon kaj, kvazaŭ temus pri vera kuraco, helpe de fratuloj ĝin portigis al li. “Liveru - li diris - tiun kuracilon al nia frato Moriko. Per ĝi la virto de Kristo lin sanigos. Lin igos nevenkebla atleto kaj lin kunigos al mia milico”.

Apenaŭ enbusiginte tiun kuracilon pretigitan de Francisko, la malsanulo tuj forlasis la liton, perfekte sanigite.

Li ĝuis, poste, ŝtalecan sanon kaj kutime sin kovris, enirinte la ordenon, per nenialio ol per la simpla froko, kun pentozono sur nuda karno; kaj kutime manĝis nenialion ol krudajn nutraĵojn, herbojn, legomojn kaj fruktojn gutante nek panon, nek vinon. Li travivis longan tempon.

## 9. Frato Pacifiko

La famo de la vivo de la malriĉuloj disvastiĝis ĉieloke kaj el ĉiulokoj personoj estis altiritaj vidi la sanktulon fondiston.

Al li prezentiĝis ankaŭ elstara komponisto de nerigidmoraj popularaj kanzonoj, kronita de la imperiestro<sup>6</sup> kaj tial nomita reĝo de la versoj.

Tiu trovis la sanktulon predikanta en la monaĥejo de San Severino; kaj lin vidis, pro miraklo efektigita de Dio liafavore, fretita per du brilaj spadoj, unu vertikala de la kapo ĝis la piedoj, la alia orizonta traŝasanta la bruston kun la ekstremaĵoj en ambaŭ manoj etenditaj krucforme.

---

<sup>6</sup> Federiko la Dua.  
Legendo majora

Tiu vizaĝo estis nova por li, neniam renkontita; sed pro tiu signo li tuj komprenis, ke temis pri la serĉito.

Mirplene, li sentis sian sangon en tempesto kaj komencis proponi al si bonajn intencojn.

Tuŝite fine de la forto de tiuj vortoj, kvazaŭ per spado eliranta el la buŝo de Francisko, decidis tiun sekvi, rezignante mondumajn pompojn.

La bona Patro, kiu lin vidis intime ŝanĝita kaj tute orientiĝinta el la mondumaj malkvietoj al la paco de Kristo, lin nomis frato Pacifiko.

Poste li progresis de virto al virto; kaj antaŭ ol esti elektita superulo en Francujo (la unua de tiulanda historio), li meritis pluan fojon vidi sur fronto de la Sanktulo iun grandan *Taŭ* kiu, en la kolorvariadoj, ornamis lian vizaĝon per mirinda belo.

Francisko al tiu signo nutris grandan amon; ĝin rekomendis, per oftaj paroladoj, al ĉiuj, kaj per ĝi kutimis konkludi la kurtajn leterojn, skribitajn propramane, kvazaŭ ĉiu lia zorgo celus *signi per Taŭ*, laŭ la profeta diro (Jeh<sup>ĉ</sup> 9,4), *sur la fruntoj de la homoj, kiuj ĝemis kaj ploris*, tutekore konvertiĝintaj al Jesuo.

## 10. Ĝeneralaj kaj provincaj kapituloj

Pasis la tempo kaj la fratuloj nombre kreskis. Tiam la zorgema paŝtisto komencis ilin kunvoki al la ĝenerala kapitulo, en loko Sankta Maria de la Porciŭnkola. Tion li lanĉis por asigni al unuopulo, kun *la ŝnuro de la dia distribuado* (Ps 77), la laŭobean porcion, en la tero de la sankta malriĉeco.

Nenion kunportis kun si la ekstreme malriĉaj. Foje ili transpasis la nombron kvinmilpersonan. Sed per la helpo de la dia boneco, superabundis nutraĵoj, por ili prosperis la farto, sankta ĝojo travideblis el ilia vizaĝo.

Ĉe la provincaj kapituloj li partoprenis ne korpe, ĉar tio ne

eblis, sed spirite ja jes, interesiĝante pri la stato de la Ordeno, preĝante, benante. Sed foje li ĉeestis ankaŭ videble pro mirinda dia interveno, kiel okazis en la kapitulo de Arleso.

En tiu okazo, dum la elstara predikanto Antono, nun beata en la ĉieloj, paroladis al fratuloj temante pri la surkruca titolo: “Jesuo nazareta, reĝo de Judoj”, unu el la aŭskultantoj, viro je granda virto, nome fratulo Monaldo, puŝite de la dia spirito antaŭene-tendis la okulojn al la kapitula elirejo, vidis kun sia granda miro la sanktulon alten levita kiu, kun la manoj kruce etenditaj, benis ĉiujn.

La samon la fratuloj sentis en la animo, kaptita pro nekutima ĝojo. La Sankta Spirito al iliaj koroj ĝuigis la ĉeeston de la Patro.

Poste, per aliaj indicoj kaj atesto de la sama beatulo, oni povis demonstri vera kion Monaldo jam vidis kaj rakontis.

La ĉiopova Dio kiu, koncedis al Ambrozio ĉeesti la entombi-gon de la glora Martino por ke lin honoru devotega korinklino, tiel igis ĉeesta sian serviston Franciskon dum la prediko de sia heroldo Antono, certe por montri aprobon pri ties vortoj de vero, kaj laŭ aparta maniero tiujn pri la kruco, kies li estis standardisto kaj gvidisto.

## 11. Hostieroj kaj tuthostio

Poste, pro la grandioza disvastiĝo de la ordeno kaj pro la volo de la ĥomo de Dio, ke la papo Honorio la Tria definitive konfirmu la Regulon, jam nur vivvoĉe aprobitan de Inocento la Tria, Fran-cisko decidis tion fari, inspirite de ĉiela vizio.

Al li ŝajnis, ke mem estis elgrunde kolektinta malgrandegajn panerojn liverotajn al multaj malsategaj fratuloj tie rekontiĝintaj. Meze de timo, ke ili forglitus el siaj manoj, li aŭdis voĉon resonan-tan el alto al sia orelo: “Francisko, el ĉiuj eroj faru hostion, kaj liveru manĝotan al kiu ajn ĝin volas”. Tiel li faris.

Kiuj ĝin ricevis sendevote, aŭ, post estis ricevinta, ĝin taksis malŝatinda, tuj aperis kovritaj je lepro.

Tiun vizion li rakontis al siaj fratuloj la sekvan matenon, kaj plendis kontraŭ la fakto, ke mem ne kapablas kompreni ĝian signifon.

La postan tagon, tamen, ensorbite en longa preĝado, li aŭdis alian voĉon eĥiĝantan el la ĉielo. “Francisko, la eroj estas la vortoj de la evangelio, la hostio la Regulo, la lepro malboneco”.

Li tial decidis redukti la ampleksan rikolton de evangeliaj vortoj al Regulo pli kurtvorta.

Ascendis kun du siaj kompanuloj<sup>7</sup> al monto<sup>8</sup> kaj tie fastis sin nutrante per nuraj panoj kaj akvo, ĝin reskribigis laŭ kio la Santa Spirito, de li intense preĝata, estis al li sugestanta.

Post nemulte li reiris ĉe siajn fratulojn kaj garde transdonis tiun Regulon al sia Vikario.

Sed tiu ĉi, post kelkaj tagojn, ĝin perdis, pro sia malzorgemo, kiel li mem allasis.

Kaj la tre pacienca Patro, sen iu ajn plendo, reiris al tiu kara soleco, por ĝin refari. Ĝi revenis identa al la unua, kvazaŭ ĉiu vorto estus al li diktitaj de Dio, kaj fine estis validigita, laŭ lia deziro, de la supreindikita papo Honorio, en la oka jaro de ties pontifikado.

Por logi siajn fratulojn al la fidela observado de la Regulo, li diradis, ke mem nenion sian enmetis en ĝin, sed ke ĉio estis inspirita de Dio.

Kaj por ke evidentiĝus la ratifiko en la ĉielo pri tio kion la papo jam faris sur la tero, post nemulte estis enpremitaj en Francisko la stigmatoj, kvazaŭ buleo de suverena pontifiko Kristo, je definitiva konfirmo de la Regulo kaj je rekono pri liaj virtoj, por ke tio ĉio estu enmensigita.

---

<sup>7</sup> Fratuloj Leono kaj Bonicio.

<sup>8</sup> Fonte Colombo.

Legendo majora

## Ĉapitro kvina

### PRI VIVAŬSTERECO KAJ KIEL LA KREAĴARO LIN MILDIGIS

#### 1. Rigora humuliĝo

Konstatis la homo de Dio ke, post li, sekvante lian ekzemplon, multege da homoj estis instigite porti kun granda fervoro, la krucon de Kristo. Tiam li duobligis, kiel bona kondukisto, la siajn streĉojn por gajni la venkopalmon, per la praktiko de plej elstaraj virtoj.

Per la atenta konsidero pri la vortoj de la Apostolo: “*Kaj kiuj apartenas al Kristo Jesuo, jam krucumis la karnon kun ĝiaj pasioj kaj voluptoj (Gal 5,24)*”, cele de konstanta portado de la kruco en sia koro, li humiligis siajn sensojn per rigora disciplino, ĝis preni apenaŭ la nepre necesa al propra vivtenado.

Li ade diris, ke malfacilas kontentigi la pretendojn de la korpo, kaj samtempe ne cedi al instinktoj de la naturo.

Jen kial en tempoj de bona farto malofte li koncedis al si kuiritajn nutraĵojn; kaj en tiuj maloftaj fojoj, aŭ ilin cindre surŝutis, aŭ ilin igis sengustaj per aldono de akvo.

Kion diri pri vino, se jam je akvo, eĉ kiam li sin sentis bruligi pro soifo, li faris limigitan uzon?

Li pliigis ĉiutage manierojn de abstino; kaj kvankam alveninte al la perfekteco plej alta, kiel konstanta novico li eltrovis ĉiam vivoturmentilon, por rebati la sensarajn deziregojn.

Tamen kiam li troviĝis eksterkovente, lia zorgo estis konformiĝi, laŭ la sugesto de la evangelio, al la kutimo de la gastigan-toj rilate kvaliton de la nutraĵoj; revenante, poste, hejmen, li revenis ankaŭ al la antaŭa aspra karnhumiliĝo.

Rigora kun si, amikiĝema kun la proksimularo, obea ĉiukaze al la evangelio, ĉu fastante ĉu nutriĝante, li estis ĉiam edifa al la fratuloj.

Flurfoje la nuda tero estis lia lito por la elĉerpita korpo; kaj multofte ripozis sidiĝinte kaj apogante la kapon sur kuseno je malmola ligno aŭ je pli malmola ŝtono.

Lia vesto estis malgranda, simpla kaj senvalora froko. Kaj tiel ĉu en malvarmo ĉu en nudeco li servis al la Sinjoro.

## 2. **Krudecoj**

Foje demandite kiel li povas elteni la severajn vintrajn malvarmojn kovrita per tiel leĝeraj vestoj, jen respondo. “Se estus logitaj en animo el la flamo de la ĉiela patrujo, facilege ni eltenus tiun malvarmon en la korpo”.

Li abomenis la suprajn vestojn, ŝatis tiujn raspajn, kaj kutimis diri, ke ĝuste pro tio Johano la Baptano estis laŭdata de la diaj lipoj. Kaj se hazarde en tuniko donacita perceptis agrablan tuŝosenton, ĝin interne trateksis per ŝnuretoj. “En la reĝaj palacoj, li diradis, kaj ne en la povrulaj hejmoj, senpene loĝas uzantoj de morbidaj vestoj, laŭ la vorto de la vero. La demonoj forfuĝas antaŭ aspre vestitoj, dum el la delicaĵoj kaj molecaĵoj sin sentas invititaj por tenti”.

Li pri tio paroladis pro malmola sperto.

Malsanule en la kapo kaj en okuloj, iun nokton ekkuŝis sur duobla kuseno, nekutima afero por li. Nu? La demono enŝteliĝis kaj lin malkvietigis milruze ĝismatene. Kaj nenimaniere akiris pacon la homo de Dio ol kiam, alvokite la kompanulon, petis ke la kuseno estu forigita.

Sed la fratulo, kun tiu kuseno surbrake, apenaŭ ekstere de la ĉelo, ne plu sukcesis moviĝi, paralizite en ĉiuj membroj. Necesis la voĉo de la Patro, kiu ĉion spirite komprenis, por redoni al li la

fortojn.

### 3. Gardado pri si

Rigore li vigilis en la teniĝa gardado pri si mem.

Li celis konservi integra la internan kaj eksteran purecon.

Pro tio en la ektempo de sia konvertiĝo, vintre li tempigis en neĝo-fosaĵoj, por submeti la internan malamikon kaj defendi el la malĉasta fajro la senmakulan pudoran veston.

Li kutimis diri: “Ege plajbonas pro la spirita homo suferi malvarmegon en la korpo ol senti en la animo la ardon, eĉ nur etan, de la voluptavido.

### 4. La familio je neĝeroj

Iun nokton, en Sarteana ermitejo, dum preĝado en sia ĉeleto, li sin sentis trifojojn laŭnome vokita:

- “Francisko, Francisko, Francisko!”.

- “*Kion vi volas?* - petis la Sanktulo”.

- “Ne estas pekulo en la mondo, kiu, pentinte, ne ricevas la pardonon. Sed tion neniam akiros kiu per aspra pentofaro al si forŝiras la vivon”.

Per dia revelacio kaj pro la sekvaĵoj, rekonis Francisko la voĉon de la antikva serpento kaj ties mavan intencon. Tiu provis lin replumbi en staton de tepideco. Fakte, tujpost, forta tento el karno lin invadis, estigita de tiu kies spiro fajrigas karbojn (Ijobo 41).

Sed apenaŭ tion sentinte, la ĉastega homo, seniĝinte el siaj vestoj, eksangigis sian karnon kunpremitan de malmola ŝnuro, ekkriis: “Ek, frato azeno, por vi utilas resti tiel por suferi la vipŝnuretojn. La tuniko estas aranĝita por la religiulo, kaj estas distingilo pri sankteco; ne estas permesite, ke malĉastulo ĝin uzurpu. Se vi volas foriri aliloken, tion faru libervole!”.

Ekscitite, poste, pro pli arda fervoro, li eliris el la ĉelo, senve-



ste; alvenis en la legomĝardenon kaj plonĝis neĝomezen. Per la neĝo li modlis sep pupojn varigrandajn, kaj, starante antaŭ ili, tiel li diris al sia korpo. “Jen, la plej granda estas via edzino, vicas poste du filoj kaj du filinoj, kaj laste servisto kaj servistino nepraj por la endomaj servoj. Ek, hastu ilin sufiĉe kovri; ĉu vi ne vidas, ke ili frostorigidiĝas? Ke se al vi ekscitas ĝenon la multego da zorgoj pri ili, nu servu nur al via Dio”.

La diablo forfuĝis humiligite kaj Francisko revenis al sia ĉelo kun enmane la venkopalmon.

Lia korpo estis frosta, sed ene senfajriĝis la volupta forto. Es-tonte, ne plu sentiĝis la karnaj stimuloj.

Frato, kiu tiam estis preĝanta, vidis ĉion pro la radioj, ege kla-raj, de la luno. Kaj la homo de Dio, perceptinte, ke jam la faro e-stas malkovrita, al tiu priskribis laŭsinsekve la tutan diablan tenton, sed ordonis samtempe, ke pri tio estu parolate al neniuj, ĝis kiam li estas en tiu ĉi vivo.

## 5. **Konversacioj kun virinoj.**

Li ofte diris, ke ne sufiĉas humiligi la malvirtojn de la karno kaj bremsi ties avidajn voluptojn, sed, ke necesas ankaŭ vigle kaj zorge gardi siajn sensojn, tra kiuj eniras la animon la morto, kaj laŭ aparta maniero eviti konfidencon, konversaciojn kun vir-inoj, kaŭzo de multaj ruiniĝoj. Koruptiĝas pro ili la febla spirito kaj la forta ofte malfortiĝas.

Malfacilas eviti la kontaĝon por tiu kiu konversas kun virinoj, escepte ke estas koncernate sanktulon, ĉar okazas kiel, laŭ la sankta skribo, marŝi trafajre kaj ne bruliĝi ĉe plandumoj (Sen 6,27).

Kaj li, unua, estis tiel deturninta siajn okulojn el allogo de tiuj vantaĵoj, ke li preskaŭ neniun virinan vizaĝon rekonas, kiel li di-ris iam al la fratulo lin akompananta.

Li opiniis danĝere engaĝi sian menson per virinaj figuroj, kiuj

aŭ revekas la fajrerojn de la subigita karno aŭ vualumi la klarecon de la pudora menso.

Vanta esti por li konvesacio kun virinoj, escepte kaze de konfesprenado kaj de hasteca prispirita konsilo, konvena al la honoro kaj al la savo de la animoj.

Diris ankaŭ Francisko: “Kiaj interesoj povas kreiĝi inter religiulo kaj virino, escepte ke tiu ĉi petu savan pentofaron, aŭ konsilon por plibonigi la vivon? La troa memfido malatentigas al la malamiko, kaj se la diablo sukcesos enirigi haron en homon, haste tion li kreskigas al trabo.

## 6. Kontraŭ nenifarado

Malamikante al nenifaro, li instigis ĉiujn ĝin eviti kvazaŭ temus pri nesto de malvirtoj; kaj montris, per sia konduto, ke la karno, ribelema kaj pigrema, devas esti subigita per konstantaj disciplinoj kaj fruktodonaj laboroj.

Li difinis, ankaŭ, sian korpon frato azeno, kvazaŭ ĝi estus besto dresebla per peza ŝarĝo kaj vipado, kaj nutrebla per aĉa manĝaĵo.

Se kelka vidiĝis nenifaradi, vagadi, kaj vivadi je alies elspezoj, li lin riproĉis kaj sugestis, ke tiu estus nomata Frato Muŝo, ĉar nenion bonan produktas tia homo kaj, male, makulas la bonajn agojn de la aliaj fariĝinte malŝatinda kaj abomena al ĉiuj.

Iam li diris. “Mi volas, ke miaj fratuloj laboru kaj estu ĉiam okupitaj, por ke ili ne vagadu kore kaj lingve nenifarante, tra malkonvenaĵoj kaj vantaĵoj”.

Ankaŭ rilate la evangelian silenton li sin montri tre rigora, memorante, ke je ĉiu senfruktema vorto oni devas kvitigi la konton ĉe Dio.

Se li sciiĝis pri iu ajn fratulo kutimigita babilaĉi, Tiun li senrezerve riproĉis: “Oportuna silentemo - li ripetis - estas gardilo de la kora pureco, kaj estas granda virto; en la lingvopovo estas la

morto kaj la vivo, ne tiom pro la lango-gustemo, kiom pro la lingvo-vortemo”

## 7. **Modereco**

Sed kavankam li energie instigis la fratulojn al morigida vivo, al li ne plaĉis tamen tiu malmola severeco kiu ne sin vestas per mizerikordaj visceroj kaj ne estas kondimentita per la salo de la sana diskreteco.

Iun nokton fratulo agitiĝis pro malsato kaj pro tio ne sukcesis endormiĝi.

Ekvidis la kompatema Patro, ke sia ŝafeto danĝere baraktas, aŭdis plendojn kaj provis kompaton.

Lin alvokinte al si, li antaŭ tiun metis panon kaj invitis manĝi, kaj por forigi el li ĉiun ekhonton, komencis mem unua.

Kuraĝigite, la fratulo manĝis, kontenta esti evitinta, per tiu indulgemo de la paŝtisto, la danĝeron de la korpo, kaj esti ricevinta de la samo ne malmulte da edifo.

Poste, la sekvan matenon, kuniginte la fratulojn, la homo de Dio rakontis tion kio okazis en la nokto, kaj liveris al ili tiun ĉi profitdonan konsilon: “Estu al vi ekzemplo ne la nutraĵo, sed la karitato, ho miaj filoj”. Kaj ilin instigis al la diskreteco, modereco de la virtoj, ne tiu laŭ la karno, sed tiu kiun instrui Kristo, spegulo de ĉiu sankteco”.

## 8. **Nepro de larmoj**

Ĉar ne eblas al homo savvoje trakuranta, trempita tra bezonaĵoj, sekvi la senmakulan ŝafidon kun tioma pureco sufiĉa por senmakule vivi, Francisko monstiris, per sia ekzempliĝo, la neprecon, por tiuj kiuj strebas al la perfektiĝo, sin purigi ĉiutage per larmoj.

Li estis atinginta tioman anĝelan purecon koran kaj korpan! Tamen li ne ĉesis lavi la animajn okulojn per abundaj larmoj,

neniom maltrankviliĝante pro la perdo de korpaj okuloj. Kaj al la kuraĉisto lin informanta pri da danĝero, se tiome li daŭrigus plori, ĉi-tone respondis: “Frato kuracisto, pro amo al la lumo kiun ni havas komuna kun la muŝoj, ne bonas rezigni, eĉ ettempe, rigardi la dian lumon. Spirito ne ricevis sian vidkapablon favore al la karno, sed la karno ĝin ricevis favore al la spirito”.

Kaj li preferis perdi la vidkapablon ol malhelpi, kun malprofitiĝo de pieco, la larmojn, per kiuj la interna okulo sin purigas kaj fariĝas inda vidi Dion.

## 9. Frato fajro

Konsilite de kuracistoj kaj puŝite de la kunfratuloj permesi, ĉe sia okuloj, kuracilan kaŭterizon, la homo de Dio, humile konsentis, opiniinte saniga kaj samtempe turmenta tiun rimedon.

Venis la kuracisto kaj metis la fera rimedilo flamiĝi en la fajro.

Subtene de sia tremanta korpo, la servisto de Kristo tiel ekparolis: “Ho mia frato fajro, brilanta sur ĉiuj aĵoj, fortika kaj bela kaj utila vin faris la Sinjoro. Estu benvola nun, vi vin montru al mi karesa! Kiun vin kreis mi nun preĝas por ke li mildigu vian varmegon kaj tiel, per via modera bruligo, mi kapablas elteni.

Poste li krucsignis sur ĝin kaj firme kaj sentime ekstaris.

Tiu terura aparato estis enprofundigita, kraketanta, en lian teneran karnon, ek de la okulo ĝis la brovo. Kaj kiam ĉio finiĝis, Francisko tiel diris al la fratuloj: “Laŭdu al la Altegulo! Neniun ardon, neniun suferon sentigis al mia korpo frato fajro”.

Kaj al la kirurgo: “Se ne jam kuirita la karno, en ĝin enprofundigu denove”.

Tio mirigis la kuraciston pro tio ke li vidis en korpo ekruiniĝanta gigantan spiriton. Por li tio estis vera miraklo lin ekzaltanta ĝis igi lin eksklamanta: “Mirindaĵojn hodiaŭ mi vidis, ho fratuloj!”.

Francisko jam atingis puron tiel altan, ke la karno spontane

submetiĝis al la spirito kaj la spirito al Dio, kun admirebla harmonio. Pro dia dispozicio en tio konkludendas, ke *la kreaĵo servante al sia Kreinto (Saĝ 16,24)*, fariĝis obea al la volo kaj al la ordono de Francisko.

La faktoj tion pruvas.

## 10. Akvo aliigita al vino.

Loĝis la servisto de Dio en la ermitejo Sant'Urbano, suferanta je danĝerega malsano.

Iun tagon li sentis bezonon de gluto da vino por subteni sian korpon elĉerpitan. Sed eblis da ĝi trovi eĉ ne guton.

“Kj tiam portu al mi iom da akvo”, diris la sanktulo.

Kiam li ĝin tenis tramane en taso, ĝin benis. La akvo ne plu estis akvo, sed bonega vino.

Kiun ne povis pretigi la loka malriĉeco, tiun provizis la pureco de Francisko.

Kaj saniĝis tuj apenaŭ li ĝin gustumis.

La miraklo de ŝanĝigo de akvo al vino kaj de tuja akiro de sano, nome la supernature akirita transformiĝo de la akvo kaj de la korpo, ĉu ne atestas en Francisko la perfektan senvestiĝon el la malnova homo kaj la vestiĝo per la nova?

## 11. La anĝelo citranta

Sed ne nur la kreaĵoj sin montris obeaj al lia volsigno. Ankaŭ Dio, aŭtoro de al naturo, per sia Providenco venis renkonten al liaj deziroj.

Plimalbonigite iam pro amaso de malbonaĵoj, li deziris aŭdi mildigan kaj malstreĉigan muzikon. Kaj spite de malpermeso, pro la seriozeco de la loko, ke tio konkretiĝus per mano de homo, la anĝeloj alkuris el la ĉielo.

Estis nokto, kaj li vigilis kun la pensoj direktitaj al sia Sinjo-

ro. Abrupte citra muziko reeĥis al lia orelo. Neniu vidiĝis, sed el impreso de sia aŭdosenso, kiu momente perceptita el tie kaj momente el tie ĉi, li konsciiĝis pri ĉeesto de anĝela citristo.

Ĉu li plu estis en la tero? Francisko tion ne kredis.

Kaj ankaŭ la ĉeestantoj, tiun fojon, povis ĝui paradizan sperton.

Ne estis maloftaj tiuj spertiĝoj en la servisto de Dio, kaj ne ĉiujn li sukcesis kaŝi. Fakte, fratuloj ilin rimarkis.

## 12. Lumo en plennokto

Cetere vojaĝante, motive de predikado kun akompananta fratulo tra Lombardio kaj Treviza Markio, proksime de la Pado lin kaptis senluna nokto.

Konsideris, tiu akompananto, la danĝerojn kiujn ili riskis, nome mallumo, rivero, marĉo, kaj timplene diris: “Preĝu, Patro, por ke ni estu savataj”

Kaj Francisko lin kuraĝigis: “Ne timu, Dio ĉion povas. Se plaĉas al sia koro, forfuĝigi la mallumon, li provizos super ni abundegan lumon”. Li ne jam finis eldiri tiujn vortojn, ke ili sin vidis tiel iluminitaj ĝis distingi ne nur la vojon, sed ankaŭ ĉion ĉirkaŭe, dum forfore profunde noktis.

Tra tia viva brilo, kun kantoj kaj devotaj himnoj, post longa marŝo ili atingis sendamaĝe kaj gaje la hospicon.

Oni pripensu, tial, al kiu kondiĉo de pureco kaj sankteco estis alveninta tiu homo, ĉe kies signo fajro moderas sian ardon, akvo nature ŝanĝiĝas, anĝela melodio konsolas kaj dia lumo montras la vojon. Ĉu ne ŝajnas, ke la tuta monda maĥino estis servigita al liaj sensoj tiel sanktigataj?

## Ĉapitro sesa

### HUMILECO, OBEO, DIAJ KOMPLEZOJ AL LIAJ DEZIROJ.

#### 1. Amo al humilo

Humileco, gardisto kaj ornamo de ĉiuj virtoj, riĉigis je abundaj donacoj la homon de Dio.

Li estimis sin nenialian ol pekulon, dum li reale estis spegulo kaj brilo de ĉiu perfekteco.

Kiel sperta arkitekto, instruita ĉe la skolo de Kristo, sur humilo li volis levi la konstruaĵon de sia spirita vivo.

Li kutimis diri. “La Difilo, nia Majstro kaj Sinjoro, elvenis el la ĉielaj altoj al niaj nesufiĉaĵoj, por nin instrui, per ekzemplo kaj parolo, la veran humilon.

Kaj ĉiuokaze li klopodis, kiel vera disĉiplo, sin nuligi ĉe okuloj siaj kaj alies, memorante tiun Jesuan diron: “*Kio estas altigita inter la homoj, tio estas abomenaĵo antaŭ Dio (Lk 16,15)*”. Al li kutimiĝis ankaŭ jena esprimo: “Kiom la homo valoras antaŭ Dio, tiom li estas kaj ne pli”.

Taksante, do, stultaĵo esti ekzaltite de la homoj, li ĉagreniĝis pro aplaŭdoj.

Tial li preferis insulton ol laŭdon, konvinkite, ke tiu lin instigus al korektiĝo, tiu ĉi al falo.

Kiam homoj ekzaltis ĝisĉiele la meritojn de liaj virtoj, li volis, ke al sia orelo oni ripetu ĉiuspecajn insultojn, ke lin oni difinu krudulo kaj pagano, nescianta kaj neutila homo. Tiam kun ĝojo en la koro kaj rideto sur la lipoj, plenplenigis je benoj tiun fratulon, kiu kontraŭvole al li obeis: “Vin Dio benu, ho filo karega, ĉar vi diras la veron. Konvenas, ke la filo de Petro Bernardono aŭs-

kultu insultojn”.

## 2. Konfesoj el la predikejo.

Por igi sin malŝatinda ĉe ĉies okuloj, li ne hezitis konigi ankaŭ el predikejo siajn mavkvalitojn.

Trafite iam per grava malsano, li juĝis bezona malpliigo de sia pentofaro. Sed ĵus akirinte ion da sanfortoj, la vera malŝatanto de si, plena je indigno, tiel evoluigis: “Ne justas, ke la mondo kredas min pentofaranta dum en la sekreto de mia ĉelo mi min nutras per viando”.

Flamiĝinte pro ardo de sankta humilo, li abrupte leviĝis kaj renkontis en Asiza placo popolon. Tie kun multaj fratuloj, kondukitaj kun si, eniris la katedralon, sin liginte ĉe kolo ŝnuron kaj senveste, nome kun nura kalzoneto, antaŭ ĉies okuloj igis sin trenigita sur la ŝtonon, sur kiu oni kutimis puni la fiulojn.

Kvankam suferanta je kvartaga febroy, febla kaj rigida, el tiu ŝtono, kvazaŭ el predikejo, li fervorege predikis, deklarante, ke mem estas ne spirita homo, sed karna kaj frandema, kaj ke ili ĉiuj konsideru lin tia.

Sed la popolo antaŭ tiel grandsignifa spektaklo ekestis mirigita, kaj ĉar sufiĉe informita pri la rigida vivo, kore-pense humilmiena, komencis laŭdegi tian lian humilon admireblan pli ol imiteblan.

Kaj malgraŭ ke tiu fakto povas prefere ŝajni mirindaĵo, simila al tiu kiun oni legas ĉe la profeto (Jes 20,3), anstataŭ ekzemplo, estas dokumento de perfekta humilo, el kiu ĉiu servanto de Kristo estas puŝita malŝati efemeran laŭdon, kunpremi la plumpan arogantecon kaj malkreditigi la farisean ŝajnigon.

## 3. Pri kio sin glori

Francisko oftege plenumis similspecajn humiligajn agojn por



aperi ekstere kiel *rompita vazo* (Ps 30,13) kaj ene konservi la intensan emon al sankteco.

Li zorgemis kaŝi la donojn de la Sinjoro, en la sekreto de sia animo; ilin ne volis elmeti al la publika famo, facile inkliniĝanta al danĝerigo.

Kiam okazis ekzaltado flanke de popolo, li tiel komentis:

“Filoj kaj filinoj, ankoraŭ mi povas malleviĝi, vi min ne ekzaltu kvazaŭ mi estus sekura! Neniu laŭdinda, kie finiĝo ankoraŭ estas necerta”.

Al si mem plue aldonis: “Se friponego estus plenigita de Dio per dotoj tiel grandaj, li certe respondus pli bone ol vi, ho Francisko”.

Kaj al fratuloj: “Pri ĉio tio kion povas plenumi ankaŭ pekulo, neniu rajtas sin glori. Pekulo povas fasti, preĝi, plori kaj maceri sian korpon. Nur unu afero al li estas neebla: esti fidele al sia Sinjoro. Tial, jen pri kio ni povas fieri: se ni redonas al Dio lian gloron, kaj se, post fidele servado al li, al li alskribas ĉiun bonon”.

#### 4. La vera obeulo

Celante akiri ĉiumaniere kaj alskribi ĉiun sinsekvajn tempajn okazaĵojn al merito, tiu evangelia negocisto preferis submetiĝi ol estri, obei ol direkti.

Rezignis li, do, oficon de generala superulo kaj postulis ankaŭ por si gardistan fratulon, de kies volo li povu dependi en ĉio. Li sciis kaj lin ripetis ke, subiĝinte al la jugo de oboe, ĉiu tempero transformiĝas al trezoro. Pro tio li promesis obeon al la fratulo kun kiu kutimis akompaniĝi, kaj ĝin plenumis ĝis la minimumaj aspektoj.

Iam tiel alparolis la akompanatajn fratulojn: “Inter la multaj gracoj, tiun al mi donacis la bona Dio, nome esti sampreta obei tiel al lasthora novico, eventuale destinita gardanto al mi, kiel al

la plejaĝa kaj prudenta fratulo el la fratularo. Ĉar subulo devas ne taksi en prelato simplan homon, sed tiun pro kies amo mem obeas. Kaj kiom malŝatindas kiu prezidas tiom ŝatindas ĉe la Sinjoro la humila obeo.

Demandite sekve pri tiu kiu meritas esti taksata vera obeanto, li proponis kiel ekzemplon el la komparo kun mortinto.

“Imagu - li diris - senvivan korpon, kaj ĝin metu kien al vi ŝajnas plitaŭge. Se vi ĝin movas, ĝi ne oponas reziston; se vi ĝin sternas ĝi ne protestas; se vi ĝin lasas fali, nenimaniere ĝi plendas. Ĝin levu al trono, ĝi nenion rigardas ol la grundon; kaj se vi ĝin envolvas per purpuro, ĝi paliĝas du fojojn. Jenas - li konkludis - la vera obeanto: kiu ne diskutas pri la motivoj pro kiuj li estas movata; kiu ne faras al si zorgojn kien ajn estas destinita; kiu ne insistas por esti loke ŝanĝita; kiu, ŝarĝite je tasko sin konservas tre humila; kiu ju pli estas onorata des pli sin estimas neinda.

## 5. La vera minora fratulo

Alifoje li diris al la fratulo akompananto: “Mi min sentas Minora fratulo, se mi ne estos en la kondiĉo kiun nun mi al vi pris-kribas. Estante elstarulo, mi, partoprenanta en Kapitulo, predikas kaj admonas miajn fratulojn. Kaj ĉe la fino ili diras al mi: “vi ne plaĉas ĉar vi estas senkultura, senparolarta, kruda kaj simpla”; kaj plie ili min malŝatige, kvazaŭ nenivaloran, forpelas. Mi diras al vi, ke se mi, alsturmita per tiuj vortoj, ne konservas la saman mienon, kun la sama ĝojo en la animo kaj kun la sama celo al sankteco, mi absolute ne estas Minora fratulo”.

Kaj aldonis: “En la prelata stato okazas falriskoj, en la laŭdoj krutegaĵoj, en la humila subula stato ĉiam ĝajno. Kial, do, kuri al danĝeroj, kaj ne al la akiro de veraj bonoj?”

Jen kial Francisko, modelo de humileco, volis, ke oni nomu liajn fratulojn Minoraj kaj la ordenajn superulojn Ministroj por

adopti la samajn evangeliajn vortojn (Mt 25,45), kiun li promisis obei, kaj kial el la sama nomo la filoj memoru, ke mem venis al la skolo de Kristo por ellerni tiun virton.

Tiel fakte parolis la dia Majstro por ili formis al la perfekta humilo: *“Ne tiel estu inter vi; sed kiu volas esti granda inter vi, tiu estu via servisto; kaj kiu volas esti la unua inter vi, tiu estu via servisto (Mt 20,26-27)”*.

Demandite de la Hostiana Kardinalo (la unua protektanto kaj kuniniciatinto de la Minoraj Fratoj), levita poste, al la plejsuepro pontifika stato, ĝuste kiel Francisko al li antaŭdiris, kun la nomo Gregorio la Naŭa), ĉu li favore akceptus, ke siaj fratuloj estus levitaj al la prelateco en la eklezio, subite per jenaj vortoj respondis la homo de Dio. “Sinjoro, pro jeno miaj fratuloj estis nomitaj Minoraj, por ke ili ne pretendu fariĝi Majoraj. Se vi volas ke ili donu fruktojn en la eklezio de Kristo, lasu ilin en ilia vokiĝo, kaj neniam permesu, ke ili ascendu al la ekleziaj prelaturej”.

## 6. La trono en la ĉielo

Kaj pro tio ke, kaj en si mem kaj en siaj fratuloj, li preferis la humilemon ol la honorajojn el la homa mondo, tiun Dio, ŝatanto de humiluloj, juĝis inda plej altaj gloraj kulminoj, ĝuste kiel vizio montris al aparte virta kaj sankta fratulo<sup>9</sup>.

Estis tiu vojĝanta kune kun la sanktulo, kaj kune kun li haltis por preĝi en forlasita preĝejo. Ekstaziĝinte, li vidis antaŭ siaj okuloj malfermiĝi la ĉielo kaj, inter la multaj sidiloj, unu el ili li rimarkis elstaranta super ĉiuj. Ĝi estis la plej bela, ornamita per juvelŝtonoj, multelume briletanta.

Mirigite, li ene de si mem ekpensis malkvietiĝe: “Kiu okupos tiun tronon?”. Voĉo el alto tia sin aŭdigis: “Ĝi apartenis al unu el la ribelaj anĝeloj kaj nun estas rezervita por Francisko”.

---

<sup>9</sup> Frato Pacifiko.  
Legendo majora

Vekiĝinte el ekstaza stato, li sekvis kiel kutime la Patron, jam ekremarŝantan.

Laŭvoje konversacianta pri Dio, certamamente la fratulo, memorante tiun vizion, ruze-lerte provis sondi la animon de la sanktulo.

“Frato Francisko, kia vi opinias esti?”

“Ĉu mi? *La plej granda pekulo de l' mondo*”.

“Sed vi tion povas nek diri nek pensi en via animo”.

“*Se de Kristo estus tiel malavare pleniginta per tiaj gracoj homon, la plej fian homon, mi opinias ke tiu estus fidela al li pli ol mi*”.

Aŭdinte vortojn tiel imprenitajn je profunda humileco, li konvinkiĝis, ke la vizio elvenis el Dio. Li sciis fakte el la Evangelio (Mt 23,21), ke al la alto de la subluma gloro, la malhumilulo estas forigita, estas levita nur la humilulo.

## 7. Forlasitaj relikvoj

Alifojon, dum preĝado en forlasita preĝejo, en teritorio de Massa, najbare de Casale, li konis per dia inspiro, ke tie troviĝas, en forlasiteco, sanktaj relikvoj.

Multe ĉagreniĝis la sankta homo pro la longatempa manko de deviga honoro, kaj ordonis al la fratuloj ilin preni kaj kun granda riverenco porti al sia preĝejo.

Tamen post la tuja foriĝo de la homo de Dio pro alilokaj urĝaĵoj, la fratularo ĉion forgesis kaj forlasis la meriton de la sankta obo.

Sed iun matenon, volante celebri meson kaj, do, levinte altarkon, ili trovis sub ĝi, kun granda miro, ostojn belegajn kaj intense bonodorajn. Tial ili komprenis: ili estis tiuj samaj kiujn, tamen, ne ili sed la dia mano tien lokigis.

Alveninte postnemulte, unuezorge la sanktulo enketis ĉu ili

plemunis kion li ordonis rilate tiujn sanktajn relikvojn. La ĉeesta fratularo humile konfesis sian kulpon, kaj pro tio ricevis pentopunon kaj la pardonon.

Poste frato Francisko tiel eksplodis: “Benata estu la Sinjoro mia Dio, kiu faris mem kion devintus fari vi per viaj manoj”.

Tiam oni atentiĝu pri kia zorgo la dia providenco respektas nian mizeran argilon, kaj mezuru, se por vi tio eblas, la estimecon pri la humila Francisko ĉe la okuloj de Dio! Homo ne obeas al liaj instigoj, kaj Dio kontentigas liajn dezirojn.

## 8. Premiita humilo

Irinte iun tagon al Imola, li sin prezentis al la episkopo por peti permeson prediki al la popolo.

Li pri tio ricevis indigplenan maljesan reagon: “Sufiĉas, ho fratulo, ke prediku mi al mia popolo”.

Klinis la kapon la humila Francisko kaj eliriĝis al la vojo. Sed postnemulte, li sin reprezentis.

Kvazaŭ koleriĝinte, la episkopo demandis kion li estis ekpetanta la duan fojon.

“Sinjoro - respondis la malriĉulo duonvoĉe - se la filo estis forigita de la patro tra unu pordo, li devas eniri tra alia”.

Sin sentis venkita tiu episkopo kaj, lin brakumante, gajamienne tiel al li adresiĝis: “Estonte, kun mia ĝenerala permeso, vi kaj viaj fratuloj prediku tra mia tuta diocezo. Tion meritas via sankta humilo”.

## 9. La demonoj de Arezzo

Okazis, ke la homo de Dio, kiam tiu urbo, perturbita pro internaj luktoj, ekmarŝis al certa ruiniĝo.

El la suburbaĵo kie li gastigiĝis, Francisko vidis super ĝi aere ĝojegantaj demonojn, kiuj fajregadis civitanojn, jam involviĝin-

taj en reciproka amasbuĉado.

Por ilin forigi li sendis kiel heroldon fratulon Silvestro, homon kolombe simplan, “Iru, al tiu li diris, ĉe urban pardon kaj altru-  
du, ke je la nomo de la ĉiopova Dio kaj pro virto de la obeo ili fuĝu tuj for”.

Kuras la obeega filo kaj en laŭde inkliniĝinte al Dio, per kiom eble plej da forto en la gorĝo, ekkrias la vortojn de la sanktulo.

Revenis tuj la paco, kaj la civitanoj kun delikataj farmanieroj komencis reformi la leĝon de la reciprokaj civilaj rajtoj.

Kaj tiel la saĝo de la malriĉulo, nome la humilo de Francisko, foriginte la lepron de la rabiema aronganteco de la demonoj, kiuj jam investis tieajn homojn, igis refloranta la konkordon kaj tiel savis la urbon.

Estis la virto de la humila Francisko kiu al li meritigis tian grandan potencon sur la insolenteco de tiuj spiritoj, nome la potenco forpuŝi, per la simpla resonado de la nomo de Dio, la furiozajn perfortojn.

## 10. **Demonoj lin vipas**

Evitas la arongantaj demonoj la elstarajn virtojn de la humiluloj, escepte ke kelkfoje la dia providenco ne permesu, ke ĝiaj servistoj estu vangofrapitaj savcele de iliaj humilo, kiel ankaŭ Paŭlo apostolo (Agoj 12,7) atestas pri si kaj Francisko konstatis.

Iam li estis insiste invitita de la kardinalo Leono de Sankta Kruco pasigi kelke da tagoj en ties domo; kaj la humila Francisko ne rifuzis pro la amo kaj riverenco kiujn li nutris por li.

Sed la unuan nokton, volante ripozi post la preĝo, la demonoj feroce leviĝis kontraŭ lin. Lin ili vipis tiom perforte, ke li restis preskaŭ morta.

Kiam poste li estis libera, vokinte ĉe si sian kunfratulon, al tiu ĉi rakontis la okazaĵon.

Sekve li aldonis: “Mi opinias, ke la demonoj, kiuj nenion pli ol tion permesitan de la Sinjoro insidas, tiom feroce min alstrumis pro mia restado en la kortego de ranguloj, kio certe ne impresas edife. Miaj fratuloj kiuj loĝas en senkomfortaj lokoj, aŭdinte, ke mi restadas kun kardinaloj, suspektos, ke mi implikiĝas en mondumaj aferoj, pufiĝas pro honoroj, mergiĝas tra plezuroj. Mi opinias, ke justas, ke kiu estas indikata kiel ekzemplo por la aliaj forrestu el kurioj, kaj restu humila inter humiluloj, en nedezi-reblaj lokoj por igi fortaj tiujn kiuj suferas, suferante kun ili. La sekvan matenon, kun humila preteksto kaj kun afabla saluto al la kardinalo, deviciĝis.

### 11. Kapuĉo en la fajro

Abomenis la sankta homo la fieregon, fonton de ĉiu malbono, kaj la malobeon, ĝian malbonegan filinon. Sed tamen ne malpli arde li akceptis sinceran penton.

Al li estis prezentita, iam, kiu kulpigita pri peko kontraŭ la oboe, por ke li estu korektata eĉ per profitdona puno.

Sed la homo de Dio, rimarkinte en li sincerajn pentajn signojn, pro amo al la humilo konsentis pri pardono al li.

Por eviti, tamen, ke tiu indulga ago fariĝu instigo samagadi ĉe aliaj, li ordonis ke estu ĵetata en flamojn la kapuĉon deprenitan el la kulpa fratulo. Tiel ĉiu povis vidi kiom kaj kian punon meritas malobeo.

Kiam, sekve, ordone de la Patro, tiu kapuĉo estis deprenita el blaĝo, ĝi aperis nedifekta elmetante eĉ ne fetoron de brulaĵo.

Dio aprobis per tiu miraklo la virton de la sanktulo kaj la penton de la fratulo.

Ĉu ne imitindas la humilon, kiu igis, ke Francisko indus eĉ fleksi Dion mem je sia signo, ŝanĝi la animon de homo, retropuŝi la arogantecon de la demonoj kaj malhelpi la efikojn de flamoj?

Humilo levas tiujn kiuj ĝin posedas kaj, dum sin mallevas antaŭ ĉiuj, de ĉiuj estas honorata.



## Ĉapitro sepa

### AMO AL LA MALRIĈECO KAJ MIRA SUPLEMENTO AL MANKO DE BONAĴOJ

#### 1. Amo al la Malriĉo

Inter la aliaj donoj kiujn Francisko havis el Dio, li meritis, kiel specialan privilegion, kreski en la riĉeco de la simpleco, per arda amo al la Malriĉeco.

Konsiderinte la homo de Dio tiun virton tiel kunigitan kun Kristo kaj malŝatatan male ĉe la homoj, al ĝi sin kunigis per nerompebla nodo.

Li rezignis ĉion por ĝi, patron, patrinon kaj kion posedis kaj kion povos havi.

Neniu havis por la oro tioman deziregon kioman li havis por la sankta malriĉo; nek iu ajn gardis tiel zorge trezoron kiel Francisko la evangelian lekanton.

Kiel ofendo al siaj okulaj pupiloj li sentis kiam vidis en siaj fratuloj ion ne tute konforman al la sankta malriĉo.

Li unue, ek de la komenco de la ordeno ĝis la morto, riĉa je tuniko, je la ŝnuro kaj je kalzoneto, nur sole je tiuj li kontentiĝis.

Li alvenigis al sia perceptiĝo, kun larmoj el la okuloj, la malriĉeco de Kristo kaj de ties patrino. Li ĝin kromnomis Reĝino de ĉiuj virtoj, ĉar ĝi brilegis, super ĉiu aliaĵo, en la Reĝo kaj Reĝino ties patrino.

Kaj al la fratuloj, kiu en kunvenoj al li petadis kiu el la virtoj igus plej akceptite ĉe la Sinjoro, kvazaŭ malferminte la sekreton de sia animo, li ripetadis. “Sciu, miaj filoj, ke la malriĉeco estas la precipa savvojo ĉar nutraĵo de la humilo kaj radiko de la perfeteco. Ĝiaj fruktoj, kvankam kaŝaj, estas senfinaj. Ĝi estas tiu trezoro de la evangelia kampo, kiun por akiri, necesas vendi ĉion,

kaj kion nevendeblian taksis senvalora kompare kun ĝi”.

## 2. La fundamento de la ordeno

Diris Francisko: “Kiu volas atingi la supron de tiu sankta virto, tiu rezignu ne nur mondajn sagacaĵojn, sed ankaŭ certasence la majstrecon de literaturaj sciaĵoj por ke, senigite el tiu posedaĵo, povu eniri la mirindaĵojn de la Sinjoro, kaj nude brakumi la nudan krucumiton. Ne perfekte rezignas, fakte, la mondon kiu, en la koraj sekretoj, rezervas loketojn por sia mio”.

Ofte, traktante pri la Malriĉo, rememoris al la fratuloj tiun evangelian diron: “*La vulpoj havas kavojn, la birdoj de la ĉielo havas ripozejojn sed la filo de homo ne havas. kie kuŝigi sian kapon (Mt 8,20)*”.

Li volis, do, ke ili starigu hejmojn similajn al tiuj de la malriĉuloj kaj en ili ne loĝu se ne kiel pilgrimuloj kaj alilandanoj. Estas propre de pilgrimuloj, li aldonis, rifuĝiĝi sub alies tegmento, sopiri la patrujon, antaŭeniri kun paco. Altrudis foje, mal-konstrui sjan starigitajn hejmojn, aŭ ilin forlasi, se en ili li mal-kovris ion troan aŭ kontraŭan al la evangelia malriĉeco.

Krome li konsideris tian virton fundamenton de la ordeno; kaj estis konvinkita, ke tiel grave baziĝas la ties tuta strukturo sur la malriĉeco, ke ĝi firmiĝu kaj disfalu laŭ la mezuro de pli aŭ malpli firmeco en ĝi.

## 3. Pordo de la Ordeno

Francisko volis, kiel al li estis rivelite, ke oni komencu la iniciadon al la ordeno per jenaj evangeliaj vortoj: “*Se vi deziras esti perfekta, iru, vendu viajn posedaĵojn, kaj donu ilin al la malriĉuloj (Mt 29,21)*”.

Li akceptis nur iujn kiuj, jam seniĝintaj je ĉiu bonaĵo, nenion absolute tenus. Li vidis en privataj sakoj stumblejajn ŝtonojn al

la praktikado de la evangelio.

Al ulo el la Ankono de Markio, petanta vesti franciskanano frakon, la vera patriarko de la malriĉuloj tiel parolis: “Se vi deziras kuniĝi al la malriĉuloj de Kristo, disdonu al la malriĉuloj de la mondo”.

Tiu homo iris, sed allogite de la karna amo donacis ĉion al la parencaro; kaj rakontis kion li faris dum la homo de Dio aŭskultis. Tiam malŝatsintene tiel lin riproĉis:

“Revenu al via mondo, ho frato Muŝo. Vi ne eliris el via tero kaj el via parencaro. Al viaj kunsanganoj vi donacis viajn bonaĵojn, ilin forprenante el la malriĉuloj: Vi ne indas loĝi kun la amikoj de la sankta malriĉo. Per la karno, ruiniga fundamento, vi ekis la spiritan memdekonstruon”.

Tiu karna homo revenis ĉe la siajn kaj reprenis siajn bonaĵojn.

Ilin li ne volis disdoni al la provruloj kaj forlasis la intencon celantan al la virto.

#### 4. **Neniam okazu**

Alian fojon, estante tielgranda la malabundo en Sankta Maria de la Anĝeloj, ke oni eĉ ne povis provizi la necesojn al novaj alvenintoj, prezentigis al Francisko lia vikario<sup>10</sup> kiu tiel parolis: “Patro mia, ĉu vi ne vidas? Al ni mankas ĉio. Permesu almenaŭ, ke ni metu en rezervo ion de la bonaĵoj de la novicoj kiuj alvenas por aniĝi al la ordeno, por ke ni povu poste je tiaĵoj profiti kiam bezonate”.

“Tio neniam, ho filo mia, - respondis senhezite la sanktulo - neniam okazu, ke, kiu ajn la cirkonstanco, oni senpiece malobservu la Regulon! Senigu el vestoj la altaron de la glora Virgulino, kiam bezono tion sugestas. Tion preferas mi, kaj eĉ Ŝi tion preferas, ol konstati atencan kontraŭ la voto de malriĉeco. Estas pli akcepte-

---

<sup>10</sup> Petro Cattani  
Legendo majora

ble al Ŝi havi la altaron nuda pro obeo al la evangelio, ol vidi ĝin ornamita kun malobservo de promiso farita al sia filo”.

## 5. Monsaketo

Marŝadis li iun tagon kun sia kunulo laŭstrate tra Apulio najbare de Bari. Ili ekvidis sur la strato saketon aŭ ĉevalsakon, ŝvelan eble pro monpleneco.

La fratulo ĝin indikis al la Krista malriĉulo kaj petis ĝin povi preni kaj donaci la enhavon al la malriĉuloj.

Sed la homo de Dio energie tion rifuzi. Li ekvidis en tio ruzilon de la demono, kaj juĝis ne meritan agon sed pekon almozdoni per ne siaj havaĵoj.

Ili pli rapidigis la paŝon.

Sed la fratulo, trompiĝinte pro falsa kompatato, ne trankviliĝis kaj plu ĝenis la homon de Dio kaj tiun kulpigis je manko de amo al la malriĉuloj.

Konsentis, fine, la indulgema homo reveni al la loko, ne certe por adheri al ne bona deziro, sed mantuŝigi la ruzan kaŝitan fraŭdon.

Post mallonga preĝo, antaŭ junulo ĵus renkontita laŭvoje, ordonis ke la fratulo levu el tero la saketon

La fratulo laŭ iom da tempo hezitis. Ankaŭ li eksuspektis aĉan ŝercon de la demono. Sed poste fidante je la virto de obeo venkis ĉiun timon kaj estendis la manon.

Dika serpento elsaltis el la sako kaj kun ĝi tuj malaperis.

“Ĉu vi konstatis? - diris tiam Francisko – Konvinkigu, ke mono por la servistoj de Dio estas nenialio ol demono kaj veneniga serpento.

## 6. Tri virinoj

Postnemulte mirindaĵo okazis al la homo de Dio dum marŝ-

adis al Siena pro urĝa afero<sup>11</sup>.

Tri virinoj vere mariĉulaj, similaj inter si en ĉio: alto, aĝo, aspekto. Al li ili en vasta ebenaĵo - situe inter Campiglia kaj San Quirico - venis renkonten kun stranga saluto: “Bonvenu la damo malriĉo!” kaj tuj malaperis. La vera amanto de la malriĉo sin sentis plena je nedirebla plezurego pro tia novforma saluto, ŝatinda en sia koro pli ol iu alia.

La fratuloj liaj kunuloj, antaŭ tiu apero, pro tiu perfekta intersimilo, pro tiu saluto kaj laste pro tiu subita malapero, restis vere mirplenaj: ili ekpensis, tial, ke io mistera kaŝiĝas rilate al lia venerinda Patro.

Je, per tiaj tri virinoj tiom malriĉaj estis montrata, laŭ unua dedukto, la belo de la evangelia perfekto, brila en Francisko per la virtoj de ĉasteco, obeo, malriĉo, perfekte egalaj, kvankam liaj preferoj inkliniĝis al la malriĉo, kiun li kromnomis kaj patrino kaj edzino kaj sinjorino.

Rilate amon al tiu virto, en kiu ellernis sin estimi la lasta, li volis ĉiam estis la unua.

Se li renkontis iun pli malriĉan ol li en la ekstera vesto, li ek-sentis preskaŭan honton pri si kaj ekprovis sin egaligi al li, kva-zaŭ, konkurante kun li, timus esti venkita.

Iam, dumvojaĝe, surstrate renkontiĝis kun lia rigardo homo tre malriĉa. Li haltis unue por konsideri pri tiuj membroj preskaŭ nudaj, poste, korhumileme, kun larmema voĉo tiel diris al la akompananta fratulo: “Granda honto estas por ni ĉar, elektinte la malriĉon nia supera riĉeco, ni renkontas iun kiu nin superas ĝuste per ĝi”.

## 7. Granda honoro

Por amo al tiu virto, la servisto de la Plejalta taksis pli bongustajn la almozoj petitaj de pordo al pordo ol tiujn spontane do-

---

<sup>11</sup> Aprilon 1226.  
Legendo majora

nacitaj. Kaj, se invitita de grandaj sinjoroj, li antaŭvidis riĉan bankedon, antaŭe mem najbariradis de hejmo al hejmo almozante panpecojn kaj poste, riĉa je tiu mizero, eksidis ĉetable.

Tiel li sin kondukis kun la Sinjoro de Ostio, de kiu li ricevis esceptan amon.

La episkopo plendis pro tio ke, invitita tagmanĝi ĉe lia domo, Francisko antaŭe ĉirkaŭe petalmozis kaŭzante malhonoron al lia episkopa moŝteco.

“Sinjoro - respondis Francisko - mi kontraŭe sentas, ke mi donis grandan honoron al vi, honorante Sinjoron pli grandan ol vi. Dio metas siajn kompleziĝojn en la malriĉo, aparte en tiu nomata vola petalmozado, praktikata pro amo al li. Pro la feŭdo de vantaj riĉoj, aliuĝitaj al vi laŭhore, mi ne volas perdi tiun reĝan indecon, kiun la Sinjoro Jesuo akiris por ĝin transdoni al ni kaj igi nin reĝoj kaj heredantoj de la ĉieloj, en la kazo ke ni estus vere malriĉaj en spirito.

## 8. Pano de la anĝeloj

Foje, por kuraĝigi siajn fratulojn al petalmozado, li uzis tiujn ĉi vortojn: “Volontiru, miaj fratoj. Tiujn ĉi lastajn tempojn, la Minoraj fratuloj estis donitaj al la mondo por ke la elektitoj plenumu dum ili tion pro kio ili estos publike laŭdataj de la voĉo de la eterna juĝisto: *“Kiom vi faris al unu el ĉi tiuj miaj fratoj, la plej malgrandaj, tion vi faris al mi (Mt 25,40)”*”.

Li diradis, do, esti afablega afero iri petalmozante sub la titolo de Minoraj Fratuloj, kiujn la dia Majstro, per sia propra buŝo, tiel eksplicite eldiris antaŭvidigante la rekompencan por la justuloj.

Ankaŭ en la precipaj festoj, kiam bezonate, li kutimis ĉirkaŭiri por petalmozi. Li diris en la memelektintoj de malriĉeco plenumiĝas tiu profetia diro: *“La homo manĝis la panon de la anĝeloj (Ps 77,25)”*. Kaj pano de la anĝeloj estis por li tiu kiun,

petite pro amo al Dio kaj donacite pro sugesto de la samaj beataj spiritoj, la sankta malriĉo kolektas de pordo al pordo.

### 9. Pasko de la Sinjoro

Iun paskan tagon, troviĝinte en ermitejo<sup>12</sup> tre fora de vilaĝo, kaj ne povinte tie petalmozi, memorinte tiun kiu en tiu tago estis aperinta laŭ pilgrimaj vestoj al disĉiploj de Emaŭso, kiel pilgrimumulo kaj povrulo almoze etendis la manon al siaj fratuloj. Kaj poste kiam li humile ricevis almozon, ilin per devotaj vortoj instigis celebri ĉiam en la monda dezerto, kiel pilgrimumuloj kaj fremduloj kaj kiel veraj hebreoj, la paskon de la Sinjoro, nome la transiro el tiu ĉi mondo al la Patro, en la malriĉo de spirito.

Ĉar li en la petalmozado ne celis senvaloran gajnon, sed la liberon de spirito, Dio, patro de la malriĉuloj, ŝajnis lin privilegii per speciala Providenco.

### 10. Riĉa malriĉo.

El Nocera Umbra, kie li kuŝis grave malsaniĝinta, la servisto de Dio, pere de specialaj senditoj zorge de siaj kuncivitanoj, estis rekondukita al Asizo.

Alveninte ĉe vilaĝon tre malriĉan, nome Satriano, la portistoj de la sanktulo, pro ekmalsatiĝo kaj pro tio ke jam fariĝis manĝohoro, foriris por aĉeti nutraĵojn. Sed ili revenis kun la manoj seniaj.

Tiam la homo sankta tiel parolis al ili: “Vi trovis nenion pro tio ke via konfido estas pli sur la muŝoj (muŝoj por li estis la mono). Revenu al la samaj domoj kaj, interŝanĝe proponante ne monon sed la amon de Dio, humile almoze petu, kaj ne juĝu tion abomena kaj senvalora, ĉar ĉiujn bonaĵojn, post la origina peko, al induloj kaj malinduloj, kun larĝa bonvolemo, koncedas la granda ĉiela Almozdonanto”.

---

<sup>12</sup> Greccio.

Tiuj rajdantoj demetis tiam ĉian hontsenton kaj tuj iris plenumi la volon de la Patro.

Ili kolektis pli ol kiom ili povintus akiri per la mono. Tiuj vilaĝanoj, puŝite de dia impulso, ne nur malavare donaci laŭpetite, sed ankaŭ sian servon.

Kaj tiel la riĉa malriĉo de Francisko riparigis la mankon, kiun ne povis rimedi la mono.

### 11. La miraklo de haroj.

Dum lia promalsana kuŝiĝo en la ermitejo najbare de Chieti, kuracisto lin ofte vizitis kun granda kuraciga zorgo.

Sed mankinte la Malhavulo je io ajn kompanse donacinda, riparigis tion la tre malavara Sinjoro per jena miraklo.

La domo, kiun la kuracisto per tuta sia gajnita mono tiam jam konstruigis, pro larĝa kreviĝo de la alto ĝis la fundo de subtenaj muroj, minacis tujan ruiniĝon, kaj ne eblis malhelpi ĝian disfalon per homaj rimedoj.

Fidema tamen en la meritoj de la homo de Dio, li kun granda devoto petis de la fratuloj objekton kiun ajn tuŝitan de liaj manoj.

Post multe da insistoj, la kuracisto obtenis iujn harojn. Je la versperproksimiĝo tiujn li trametis en la minacantan fendaĵon.

Irinte la sekvantan matenon konstati, li vidis nek harojn nek fendaĵojn.

Pro sia amplena zorgo kuraci la elĉerpiĝantan korpon de Francisko, tiu kuracisto akiris, ke sia domo ne ruiniĝu.

### 12. Akvo el ŝtono

Alian fojon la homo de Dio volis translokiĝi al iu ermitejo por malpli ĝenite sin dediĉi al la kontemplado. Sed li estis malforta kaj pro tio devis rajdi sur azeneto de malriĉa kamparano.

En tiu aermanka sumertago kaj laŭ tiu alpeca vojo, tre kruta



kaj longa, la azenmastro, kiu sekvis piedirante, sin sentis ekelĉerpiĝi.

Certamamente, jam malfortikiĝinte, li krie plendis: “Mi estas mortanta je soifo. Se mi ne havos ion da akvo, mi mortos!”.

Estis tuj piedteren la humila Francisko kaj, genufleksiĝinte, kun la palmoj kaj okuloj levitaj al la ĉielo preĝis ĝis kiam li sciis, ke la Sinjoro lin elaŭdis.

“Kuru, li poste diris al tiu homo, kuru al tiu ŝtono. Tie vi trovos akvon vivan kiu ĝuste en tiu ĉi momento, pro sia bono, Kristo ekŝprucigis por vi”.

Mira digno de Dio, kiu kun tia komplezemo sin klinas antaŭ la deziroj de siaj filaj servistoj.

Trinkis, la sensoifanto, la akvon fontigitan el la ŝtono pro la preĝo de la sanktulo. Ĝin li ĉerpis el malmolega ŝtono (*Ad 32,13*).

Ĝis tiam en tiu loko ne estis vidita akvofluo, kaj ankaŭ poste diligente serĉantoj tiaĵon ne trovis.

### 13. Plimultiĝo de nutraĵoj

Oni vidos pliposte kiel la Sinjoro, pro la meritoj de la homo sankta, plimultigis lian malgrandan almozitajon tiel ke ĝi sufiĉis al la tuta ŝipanaro dum la tagoj de ŝtorma maro.

Sufiĉu pormomente tiu aludo por ke oni vidu, ke, kiel pro fontigo de akvo el ŝtono Francisko sin montris vera Moseo, tiel pro la plimultiĝo de nutraĵoj li aperis preskaŭ alia Elizeo.

For, do, de la servistoj de Kristo ĉiuspeca malkonfido! Ke se la malriĉeco de Francisko estis tiel abunda ĝis provizi, en senesperaj kazoj, per nutraĵo, trinkaĵo kaj hejmo tiujn kiuj lin helpis, kiom plimulte ĝi provizos per tiuj aferoj kiujn la Dia Providenco kutimas doni al ĉiuj.

Se la arideco de la ŝtono, mi diras, ĉe la voĉo de la malriĉa Francisko ŝprucigis abundan akvon por la soifa povrulo, eĉ ne malpli

estos neata al tiuj kiuj, pro amo al la kreinto de l' mondo, forlasis ĉiujn bonaĵojn.

Ĉapitro oka

## AMO AL LA PIECO KAJ KIEL LA BESTOJ SIN MONTRIS AL LI OBEAJ

### 1. La pieco

Vera pieco, kiu, laŭvorte de la apostolo (1 Tm 4,8), utilas al ĉio, tiel plenigis la koron de Francisko kaj penetris la intimon de lia animo ke ŝajnis, ke ĝi lin prenis tute en sia posedo.

Estis tiu virto kiu, eluzite de lia devoteco, lin levis al Dio; per la kompato, lin transformis al Kristo; per la indulgemo, lin emigis al la proksimularo, kaj, per la universala amikeco kun la kreaĵoj, lin reportis al la senmalica kondiĉo.

Puŝite de la sama virto al amo al ĉiuj kreaĵoj, kaj laŭ aparta maniero al la animoj elaĉetitaj per la sango de Kristo, ĉiujfoje kiam li vidis tiujn ĉi sin makuli per kulpo, li ploris kun tiel tenera kompato, ke ŝajnis ke ĉiutage ilin li akuŝus al Kristo.

Estis krome la pieco kiu instigis lin treege veneri la liverantojn de la dia vorto, nome kiuj, predikante kaj konvertigante, ekscitas kaj flegas kun devota prizorgo la semon al la frato mortinta, nome al Kristo Krucumita.

Li taksis tian oficon la ofero plej akcepta ĉe la Patro de la mizerikordoj, aparte se plenumita kun perfekta karitato kaj, do, pli per la ekzemplo ol per la parolo, pli per la tralarma preĝo ol per parolema prediko.

### 2. Fruktoriĉa pieco

Tial li taksis inda je ploro, ĉar manka je vera pieco, ĉu tiun kiu ne celas en sia eklezia ofico la savon de la animo sed sian propran gloron, ĉu tiun kiu detruas per sia konduto kion li edifas per la parolo. Li kutimis diri, ke prefereblas, ol tiu, simpla kaj analfabeta fratulo kiu per bona ekzemplo movas la aliajn al la virto.

Tial al la du bibliaj esprimoj: “*senfruktulino naskis, kaj multinfanulino senfortiĝis (1 Sam 2,5)*” donis jenan interpreton: “Senfrukta estas fratulo malriĉeta, kiu en la eklezio ne havas tasko generi filojn. Multajn li, tamen, akompanos al la dia juĝo, ĉar tiuj kiuj nun, per privataj preĝoj, li konvertas al la fido, estos alskribitaj kiel lia laŭdo ĉe la eterna juĝisto. Vere senfekunda estos, male, la predikanto vana kaj vanta, kiu ĝuas en la kontentiĝo pro multaj filoj, kvazaŭ ili estus generitaj per lia laboro. Li konos en la lastaj tagoj, ke li nenion propran havas en ili”.

### 3. Zorgemo pri la animoj

Ĉar li fajris pro profunda amo al la animoj kaj kun fervora rivalado zorgiĝis pro ilia savo, li kutimis diri, ke mem sin sentas plenplena je agrablegaodoro kaj kvazaŭ rekreita per altavalora ŝmiraĵo, ĉiufoje kiam atingis sian orelon informo laŭ kiu per la parfumo de liaj fratuloj, disaj tramonde, multaj eniris la ĉielan vojon.

Li jubilis tiam plene, kaj superŝutis per specialaj benoj tiujn fratulojn kiuj, per la parolo kaj ekzemplo, estis instigintaj pekuojn al la timo antaŭ Dio.

Malbenis ankaŭ per fajrvortoj tiun kiu fie malobservis la sanktan religion: “El vi, ho sanktega Sinjoro, el la tuta ĉiela kortego kaj el mi, via malriĉulo, estu malbenataj tiuj kiuj, per fia ekzemplo, malkvietigas kaj detruas kion vi edifis kaj ne ĉesas edifi pere de la sanktaj fratuloj de la ordeno”.

Kaptiĝis tra tiom da tristo pro skandaliĝo de la bonaj animoj, ke li eksvene defektiĝus se la dia indulgemo lin ne subtenus per sia komforto.

Iam tamen, tre malĝoja pro la fiaj maledifaĵoj, dum angora preĝo por siaj filoj, li aŭdis tian respondon el Dio: “Kiel vi ĝeniĝas tiel, senpotenca fihometo? Ĉu mi nomumis, en mia religiula ordeno, vin absoluta paŝtisto? Ĉu vi ignoras, eble, ke estas mi la

precipa gardanto pri ĝi? Ĝuste pro tio mi elektis vin, senutilan homon, por ke ne al la homa lerteco, sed al la supera graco estu alskribitaj la verkoj kiujn mi en vi plenumas. Mi estigis al vivo tiun malriĉulan ordenon, kaj mi ĝin konservas kaj ĝin nutras; kaj tiujn kiuj dizertas mi anstataŭos per aliaj, kaj se ili jam ne naskiĝis, mi faru, ke ili naskiĝu. El kiu ajn flanko perfortita, ĉiam stabila ĝi restos per mia favoro”.

#### 4. **Abomeno al mallaŭdo**

La malvirto de mallaŭdo, malamika al la fonto de la pieco kaj graco, estis malŝatita de la homo sankta kiel mordo de veneniga serpento kaj tre furora pesto, eĉ kiel afero abomenita ĉe la tre kompatema Dio ĉar - li diris - mallaŭdanto sin nutras per la sango de la animoj, kiujn li mortigas per la langa spado.

Iam li ekaŭdis fratulon malalaŭdanta sian kunfratulon. “Ek, ek - li ekdiris al sia vikario - kribre ekzameni la aferon; kaj se vi trovis senkulpa la akuziton, notigas al la kvar ventoj la akuzanton kun malmildaj riproĉoj!”.

Foje li volis, ke sin malvestu je la froko kiu malvestis sian fraton je la gloro de la bona famo, kaj lin juĝis malinda ĉielen levi la okulojn, se tiu antaŭ ne redonus, ĉiurimede, kion rabitan. Kaj diris: “Estas tiom pli grava la malico de la mallaŭdantoj ol tiu de ŝtelistoj, kiom la Krista leĝo, tute kompendiiĝanta en la amo, nin instigas preferi la savon de animoj ol tiun de la korpoj”.

#### 5. **Kompato por la malfeliĉuloj**

Estis li tute kompatema ankaŭ favore al ajnmanieraj suferantoj en la korpo. Li admiris en ili la tre paciencan Kriston.

Denaska indulgemo de lia koro estis pliigita de la pieco en lin enverŝita de la Sinjoro. Li suferis en la animo pro la malriĉuloj kaj malsanuloj. Kaj al tiuj al kiuj ne povis donaci materian hel-

pon, li transdonis la ardon de sia koro.

Okazis, iam, ke fratulo respondis tre dure al povrulo petole almozetanta. Lin aŭdis la kompatema amanto de malriĉuloj kaj altrudis ke li tuj demetu la franciskanan veston, sin ĵetu al ties piedoj, agnosku sian kulpon kaj petu la preĝan helpon kaj pardonon,

Tiu fratulo ĉion plenumis kun humileco: pro tio al li Francisko diris: “En malriĉulo, filo mia, vi kontemplu la Sinjoron kaj la malriĉan patrinon lian; kaj en malsanuloj, la suferaĵojn kiujn Jesuo eltenis por ni”.

Kiel vera sekvanto de la evangelia malriĉo, la homo de Dio, unua inter ĉiuj, perceptinte en la malriĉuloj la bildon de Kristo, ĉiomfoje kiam vidis ilin alvenantaj renkonten, al ili pasigis la kolektitajn almozaĵojn, ankaŭ se necesajn al sia vivo. Li tion taksis devo, kvazaŭ ili estus la veraj mastroj.

Revenante iun tagon el Siena, kovrite per eta mantelo ĉar ekmalsaniĝanta, li trafis laŭvoje povrulon almozpenatan. Post kontemplado, kun kompatema okulo, pri tiu ekstrema mizero, tiel li diris al la akompananto fratulo: “Nepras, ke ni redonu al li la mantelon: ĝi estas lia. Ni pruntedone ĝin havis ĝis kiam renkontos nin alia pli malriĉa”.

Sed tiu, sciinte la grandan bezonon de la patro, tion energie oponis. Francisko estis tiel malsana, ke la akompananto ne akceptis, ke li tro malzorgu pri si por helpi alian.

“Pri enŝtela kulpo mi estos akuzita ĉe la granda almozdonanto - ekkriis la sanktulo - se mi ne redonos kiun mi surmetas al iu pli mizera ol mi”.

Rilate ĉiun aĵon ricevitan avantaĝe de sia korpo, li kutimis peti al la donacantoj permeson povi ĝin pasigi al personoj pli malriĉaj ol li.

Por sintoniigado al la kompato, ĉion li senrezerve donacis: man-

teloj, tunikoj, libroj, kaj ankaŭ altaraj ornamaĵoj, kiam tio eblis.

Kaj kiom da fojoj superŝarĝis siajn malfortajn ŝultrojn per pezaj deprenitaj elŝultre de malriĉuloj renkontitaj laŭvoje.

## 6. La mortigita ŝafido

Impregnite per la penso pri la unua origino kaj komenciĝo de ĉiuj aĵoj, superŝtite je abunda pieco, li vokis fratoj kaj fratinoj ankaŭ la plej etajn kreaĵojn.

Sed por tiuj kiuj pro natura mildeco kaj profeta uzado pensigis Kriston, li havis preferojn kaj specialajn inklinojn. Ofte elaĉetis tenerajn ŝafidojn, mortdestinitajn pro la ilia memorigo pri la mildega ŝafido, kiu akceptis esti mortigita por elaĉeti la pekulojn.

Iun nokton dum kiu la beata Francisko loĝadis ĉe la monaĥejo Sankta Verekondo, en la diocezo de Gubbio, ŝafeto akuŝis ŝafidon. Sed kruela porkino, senrespekta al la vivo, per mordo ĝin mortigis.

Kiam la homo sankta sciis la okazintaĵon, kaptiĝis en viva kompatato, kaj, memorante la senmakulan Ŝafidon, ekploris larmabunde antaŭ la ĉeestantaro kun tiuj lamentoj: “Ve al mi, frato ŝafido, senkulpa besto, reprezentanta Kriston! Malbenata estu la senpiulino kiu vin mortigis! Neniu homo, neniu besto sin nutru per viaj karnoj!”.

Tiuj vortoj estis kiel fulmo. La aĉfara porkino ekmalsaniĝis kaj laŭ tri tagoj, dolorplena, elpagis la punon.

Poste la venĝfara morto ĝin kaptis. Fine ĝi estis ĵetita en fosajon de la monaĥeja ĝardeno, kie ĝi restis longatempe, tabuligita pro sunsekigo. Neniu besto, eĉ malsatiga, al ĝi apudiĝis. Konsideru, do, senpia homo pri kiu peno en la juĝtago li estos punata, se per tiel horora morto estis frapita la krueleco de tiu besto.

Kaj konsideru ankaŭ pia fidelulo je kiom da efiko kaj dolĉeco devis esti la pieco en la servisto de Dio, se ĝi estis aplaŭdita, laŭ sia maniero, de la naturo mem de la bestaro.

## 7. Ŝafaro kaj ŝafidaro

Ĉirkaŭe de Siena iam li trafis aron da ŝafoj, kaj afable ilin salutis.

Kaj tiuj, forlasinte la herbejon, kuris tuj ĉe lin, altlevante la kapon kaj lin fikse rigardante, kun videbla ĝojmontro.

Ĉirkaŭ li ne nur ŝafoj grande festis sed ankaŭ ŝafidoj kaj virŝafoj, tiel ke ege pro tio miris paŝtistoj kaj fratuloj.

Alifojon en Sankta Maria de l' Porciunkola oni donacis al li ŝafeton.

La homo de Dio ĝin grandplezure akceptis pro amo al la senmaliceco kaj simpleco kies ĝi estas simbolo: li ĝin instigis laŭdi al Dio kaj ne maloportuniĝi ĉe la preĝanta fratularo. Kaj ŝafeto, kvazaŭ komprenunte la piecon de la sanktulo, ĉion observis kun admira fidele.

Kaj tiel kiam la fratuloj psalmis, eĉ ĝi eniris preĝejon, seninvite genuiĝis kaj elmetis blekojn antaŭ al altaro de la Virgulino, patrino de la Ŝafido, kvazaŭ por por ŝin saluti.

Ĉe la momento de la altlevado de la Tre Sankta Korpo de Kristo dummeso, ĝi kliniĝis ĝisgenuo, kvazaŭ por riproĉi la malfervorulojn pro ties senrespekto kaj instigi la devotulojn al pli intensa fervoro.

En Romo, li jam tenis ĉe si ŝafideton memorige pri la mildega Ŝafido de Dio.

Devigite poste provizore foriri, ĝin konfidis al nobela kaj pia sinjorino, Jakopa de la Sep Sunoj.

La malsovaĝa besto, kvazaŭ edukita de la sanktulo pri la spiritalaj aferoj, servis ĉiam ŝin ĉu ŝi irus ĉu restus ĉu revenus el la preĝejo.

Matene, se la sinjorino malfruis ellitiĝi, ĝi metis piedetojn li-tranden kaj poste ŝin emigis, per gestoj kaj aludoj, kuri al la pre-



ĝejo.

Estis tial gardata kiel estaĵo inda je admiro kaj amo, tiu fidela disĉiplo de Francisko, fariĝanta nun instigilo al pieco.

## 8. Aliaj bestoj

Estis donacita leporeto viva al la homo de Dio, dum lia loĝado en Greccio. Kuŝigite surgrunde por ke ĝi povu moviĝi laŭ sia-  
glate, la besteto aŭdante la voĉon de la patro tuj saltis al ties bru-  
sto. La sanktulo ĝin karesis kun granda amsento kaj patrine ĝin  
konsolis. Kaj, post instigo per afablaj vortoj, ke ĝi ne plu sin  
lasu kapti, ĝin forsendis.

Sed kiomfoje li ĝin puŝis trapavime, samkvante la leporeto  
revenis al li, kvazaŭ sentante per kaŝita sensaro la kompatemajn  
liajn kormovojn.

Fine li ĝin konfidis al la fratuloj kiuj ĝin portis en la arbaron,  
nome en loko pli sekura.

Similan okazaĵon oni rimarkis en la insulo de la lago apud  
Perugia<sup>13</sup>. Ĉi-foje temis pri kuniklo, kiu forfuĝinte el ĉiuj, en la  
manoj de Francisko kviete kuŝis kiel infano en lulilo.

Iun tagon trairante la lagon de Rieti<sup>14</sup> por reveni al la ermitejo  
de Greccio, la ŝipetremanta fiŝkaptisto, al li donacis riverbirdon.

Li ĝin volonte akceptis kaj, malferminte la manojn, ĝin inviti  
forflugi. Sed ĝi ne sin movis. Francisko kun la okuloj levitaj al  
ĉielo, restis ekstaze longtempe. Poste, kvazaŭ reveninte el fora  
mondo, ripetis la inviton: “Iru, frato birdo, flugu kaj laŭdkantu al  
la Sinjoro”. Tiun ĉi fojon, provizite per la beno kaj forpermeso  
de la patro, montrante nedireblan ĝojon, ĝi forflugis al la ĉielo.

En la sama lago estis donacita al Francisko ankaŭ fiŝo dika kaj  
viva, kaj li, ĝin nomante laŭ sia kutimo frato, mergis en la ondojn.

---

<sup>13</sup> Nome Trasimeno.

<sup>14</sup> Nome Piediluco.

Tiu fiŝo restis akvosurface ludante flanke de la ŝipeto apud la homo de Dio, kaj nenimaniere oni kovinkis ĝin kvazaŭan ligitan de amo al li.

Sed fine, kun la beno de la Patro, ĝi sin perdis akvoturniĝe.

## 9. Birdoj

Irante alifojojn kun fratulo trakampare tra la marĉoj de Venecio, li vidis, kuŝantaj sur arabaj branĉoj, svarmojn da birdoj dolĉe kantantaj.

“La fratoj birdetoj laŭdas Dion, kaj ni iru inter ili kanti laŭdojn la kanonajn horojn”.

Neniu el tiuj kreaĵoj sin movis. Sed pro la intensa pepado la fratuloj ne povis aŭdigi unu al la alia en la kanta alternado de la versegoj. Tiam tiel ilin invitis Francisko kun dolĉeco: “Fratoj birdetoj ĉesigu laŭtempeton, ĝis ni finos niajn laŭdojn al la Sinjoro”.

Abrupte ili silentis kaj restis kvietaj ĝis kiam, post la senhasta recito de la horoj kaj kompletado de la laŭdoj, ili forpermesiĝis al libera kanto.

En Sankta Maria de l’ Porciùnkola, ĉe la ĉeleteo de la homo de Dio ĉirpis cikado meze de la folioj de figo. Kutimiĝinta vidi eĉ en la plej etaj kreaĵoj la grandiozon de Dio, de tiu kanto li sin sentis logita kanti pli ofte la laŭdojn al Dio.

Li ĝin alvokis ĉe sin iun tagon, kaj tiu, kvazaŭ gvidate de la ĉielo, flugis al lia mano.

“Kantu, - li al ĝi diris - ho mia fratineteto cikado, kaj kun jubilo laŭdu Dion”.

Kaj tiu rekomencis sian kanton kaj ne forlasis lian manon ĝis kiam, ordonite de la sanktulo, ĝi reflugis al sia loko.

Laŭlonge de ok tagoj ĝi ripetis la flugon al lia mano kaj kanton kaj revenon al la figo.

Poste la homo de Dio diris al la fratuloj: “Ni nun forpermesu

fratinon cikadon. Ĝi nin ĝojigis sufiĉe kaj spronis nin seninterrompe laŭ ok tagoj laŭdi la Sinjoron”.

Kaj ĝin invitis foriri.

Obee ĝi malaperis for, kaj ne plu oni ĝin vidis aŭ aŭdis, kvazaŭ ĝi timus malrespekti ordonon de la Patro.

## 10. Aliaj birdoj

En Siena, kie loĝis malsanule, estis sendita, de nobela sinjoro, fazanon, vivkaptitan antaŭnelonge.

Ĵus aŭdinte la voĉon de Francisko kaj tiun ĉi vidinte, ĝi tuj al li kuris renkonten kaj al li sin ligis per tiel intensa amikeco, ke ne plu volis lin forlasi.

Plurfoje formetita, en la vitejo, en la libero flugi laŭvole, ĝi ĉiufoje fluge revenis al li. Ŝajnis, ke de ĉiam ĝi konvivus kun li.

Ĝi estis poste donacita al homo kiu devote vizitadis la serviston de Dio sed ĝi ne plu akceptis nutraĵon. Evidente por ĝi gravis resti fore de la Patro.

Sed kiam revenigite ĉe Francisko, tiun ĝi ekvidis kaj ekapudis, tuj kun jubila gestaro ekmanĝis avide.

Kiam li alvenis al la ermitejo nomata Vigna, por tie karesmi honore al Ĉefanĝelo Sankta Miĥaelo, varispecaj birdoj, flugante ĉirkaŭe de lia ĉelo, ĝoje kantis, kvazaŭ ili, feliĉigite pro lia alveno, volus lin inviti resti kun ili sur la monto.

Je tiu vido, Francisko tiel diris al sia fratulo akompananta: “Mi vidas, ke estas dia volo, ke ni longe restu en tiu ĉi loko. Tiom la karegaj birdetoj ŝajnas ĝui nian ĉeeston!”.

Ankaŭ falko, kiu tie havis sian neston, aliĝis al la homo de Dio per aparta familiareco. Ĉiunokte, per la sono de sia voĉo, zorge batis la horon en kiu la homo de Dio kutimis sin levi por la kanonaj horoj.

Estis do tre agrable por Francisko ĉar ĝi utilis por forskui el li

restaĵojn de dormemo kaj pigreco.

Sed se foje li plimalbone fartis, la falko uzis prikonsideron, kaj do ne soni la kutiman veksinalon. Sunleviĝe, kvazaŭ avertita de Dio, ĝi sentigis malatvoĉe la signalon de sia voĉo.

Estis certe dia aŭguro la gajo de la birdaro kaj kanto de la falko. La menestrelo de Dio sur la flugiloj de ekstazo devis, ene de malmulto, per la apero de anĝelo, leviĝi al altoj noblegaj.

## 11. Lupoj kaj hajlo en Greccio

Iam Francisko loĝis en la ermitejo de Greccio dum la tie loĝantoj estis turmentitaj per diversaj malbonaĵoj. Rabemaj lupoj voradis brutojn kaj ankaŭ homojn kaj ĉiujare hajlo ruinigis grenojn kaj vitejojn. Dum predikado al tiu diverspene elprovita popolo, li foje diris: “Por honoro kaj laŭdo al Dio, mi vin certigas, ke tiuj plagoj ĉesos kaj la Sinjoro al vi uzos mizerikordon kaj multobligos viajn terajn bonaĵojn se, fidante je miaj vortoj, vi havos kompaton pri vi mem, diligente konfesos kaj faron indajn penitencajn fruktojn. Sed mi al vi diras ankaŭ ke, se sendankaj pri la ricevitaj bonaĵoj, vi revenos al tia vomado, la plago estos refojigita, duobligita la peno kaj pli horora kolero plonĝos sur vin”.

Tiu popolo ŝanĝis konduton kaj serioze ekpentofaris. La ruinigoj ĉesis kaj malaperis la danĝeroj. Estonte ili ne plu suferis ĝenaĵojn pro hajlo aŭ lupoj. Se hazarde hajlo ruinigis najbarajn kampojn, ĉe la limoj de la teritorio de Greccio ĝi haltis aŭ alivojen iris.

Hajlo kaj lupoj observis la pakton kun la homo de Dio. Kaj ne plu provis, kontraste kun la leĝo de pieco, krueli kontraŭ homoj jam konvertiĝintaj al la pieco. Tio realiĝis fidele ĝis kiam tiuj homoj sin konservis koheraj kun la vortoj de la sanktulo.

Necesas do kunsenti kun la homo sankta kies pieco agis tiom efike ĝis dresi ferocajn bestiojn, malsovaĝigi la sovaĝajn, domp-

ti la malsovaĝajn kaj fleksi al obo la naturon mem de la brutaro, ribelaj kontraŭ la defalita homo.

Ĝi estas vere tiu virto, kiu unuiginte al si ĉiuj kreaĵoj, *“utilas al ĉio, havante promeson pri la nuna vivo kaj pri la estonta (1 Tm 4,8)”*.

## Ĉapitro naŭa

# KARITATA FERVORO KAJ ASPIRO AL LA MARTIRIĜO

## 1. Amo al Dio

Kiu kapablas priskribi la ardan karitaton je kiu Francisko, amiko de la Edzo, flamiĝis?

Kiel brulanta karbo, li estis tute absorbita de la dia flamo.

Se li aŭdis paroli pri la dia amo, li kontuŝiĝis, transformiĝis, ekflamiĝis, kvazaŭ la ena ŝnuro de lia koro estus tuŝita per la arĉo de ekstera sono.

Liveri tiom grandan riĉecon, kompense de ricevita almozaĵo, estis por li nobla prodigemo; kaj tre stultaj li difinis tiujn kiuj tion estimis malpli valora ol glimanta oro.

Francisko kutimis diri: “Ĉu ne estas amo la netaksebla prezo per kiu oni povas gajni la dian regnon? kaj ĉu ne estas aminda per samtiuma amo tiun, kiu tiom nin amis?”.

Por ke ĉiu aĵo estu por li logaĵo al la prodia amo, li plenĝojis *en ĉiuj verkoj de la manoj* de la Sinjoro, kaj el iliaj boneco kaj beleco li ekspertiĝe leviĝis al origina kaŭzo de ĉiu vivaĵo kreita.

Li kontemplanis en la belaĵoj la netakseblan belon, kaj per la spuroj stampitaj en la aĵoj li ĉiuloke sekvis la Plejamaton.

Tial ĉiun estaĵon li faris ŝtupo por ascendi kaj ekposedi Dion, delicon de la homoj.

Por lia spirito estis riveretoj la kreaĵoj diversaj: en ili li gustumis la dolĉecojn de la fonto. Kaj kvazaŭ perceptinte ĉielan koncerton en la harmonio de la virtoj kaj de la agoj komunikata al ili de Dio mem, li ilin dolĉe instigis laŭdi la Sinjoron, same kiel fari Davido.

## 2. Amo al Kristo

Jesuo krucumita loĝadis ĉiam en la plejinterno de lia animo kiel

mirha fasketo; en li Francisko deziris tute transformiĝis, per incendio de superabunda karitato.

Pro tiu amo vere escepta, ekde la epifanio, laŭ kvardek kontinuaĵoj, nome imite de la tempo laŭ kiu la Dia Majstro ermitis en la dezerto, la homo sankta, retiriginta en solecaj lokoj, enfermita en sia ĉeleto, senhalte sin dediĉis al vivo de pli pena pentofaro, al fastoj, al la preĝoj kaj al la laŭdoj al Dio.

Per tioma fervora amo ardis lia koro al Kristo dum la Plejamato per tioma familiareco repagis lian amon, ke al li ŝajnis Tiun vidi, preskaŭ ĉiam per sensaj okuloj, ĉeesta. Ĝuste tion li iun tagon sciigis al la fratularo.

Sed por la sakramento de la Korpo de la Sinjoro li estis vere fajranta, trafita per tia nedirebla karitato kaj dia degno.

Li komuniigis ofte kaj kun tiom da devoteco, ke li igis devota kiun ajn lin vidantan.

Plejofte li estis kaptita al ekstazo en la agrabla gustado de la senmakula ŝafido.

### **3. Amo al la Madono kaj al la sanktuloj**

Li amis je nedirebla amo la Patrino de la Sinjoro Jesuo, pro tio ke Ŝi igis la Dion de la eminenteco nia frato, kaj pro tio ke per ŝi ni akiris mizerikordon.

En Ŝi, post Kristo, li metis tutan sian konfidon. Kaj li Ŝin volis por si kaj por sia ordeno kiel advokaton. Je ŝia honoro li fastis de la festo de la apostoloj Petro kaj Paŭlo ĝis la ĉieliro.

Krome li estis kunigita, per nedisigebla nodo, kun la anĝeloj, kiuj ardas je admirinda fajro, taŭga por penetri en Dion kaj flamiĝi la animojn de la elektitoj. Pro devoteco al ili, laŭ kvardek sinsekvaj tagoj, ek de la ĉieliro de la Virgulino, fastis kaj preĝis asidue.

Sed pro sia fervora zorgo por la savo de la animoj, li estis altirita veneri per aparta pieco la Ĉefanĝelon Mikaelon, estante tiu

ĉi la oficiala prezentanto de ili antaŭ Dio.

Je memoro, fine, de ĉiuj sanktuloj, kvazaŭ tiuj estus incendi-gaj ŝtonoj, mem fajriĝis tra dia incendio.

Li nutris, tamen, apartan devotecon al la apostoloj, kaj, inter ili, Petro kaj Paŭlo okupis la unuan lokon, pro la alta amo kiun ili portis al Kristo. Je ilia honoro li oferis al la Sinjoro fastan karesmon.

Havis nenion la malriĉulo de Dio ol du monerojn: la korpon kaj la animon. Pro amo al Kristo konstante li ilin donis kaj ĉiumo-mente oferis: la korpon per la fasta rigoro, la animon per la ardo de la karitato, konsumante en la korpa atrio la viktimon, kaj bru- ligante en la anima templo la parfumojn.

#### 4. Amo al la fratoj

La senmezura karitato lin levis tre alte en la pridiaj kontem- pladoj, kaj lia amesprima bonvolemo etendiĝis tiel ardan karita- ton al la nature kaj grace kunsortanoj.

Ke kiu el la kora tenero estis igita frato al ĉiu kreaĵo, neniu miro se per la amo al Kristo tiu fariĝas pli multe frata al tiuj kiuj estis dotitaj per la bildo de Dio kaj elaĉetitaj per lia sango.

Li ne sin sentis amiko al Kristo sen ami la animojn de tiu ĉi elaĉetitaj.

Kaj kutimis diri ke nenio preferindas ol ilia savo, ĉar por ili la Ununaskito de Dio devis morti surkruce.

Ĝuste pro tio jen la konstanteco en preĝado, la zorgemo en pre- dikado, malŝparemo en la edifo por la aliaj.

Tiam malgraŭ ke lia senkulpa karno senpene fleksiĝus al la spirito kaj je neniu skurĝo bezonus, tamen ĝin punis ĉiam kaj per novaj turmentoj kaj ĝenigoj, *volante edife al aliaj unua tra- kuri la vojojn malpli facilajn.*

Kaj diradis: *“Se mi parolus la lingvojn de homoj kaj anĝeloj, sed ne havus amon kaj ne prezentus al la fratoj ekzemplojn de*



virto, malmulte al la aliaj, *neniel al mi utilis (1 Kor 13,1)*.

## 5. Al Sirio

Pro la arda fajro de karitato, li klopodis ankaŭ atingi la gloran triumfon de la martiroj, en kiuj povis nek estingiĝi la flamo de amo, nek malfortiĝi la kuraĝo.

Brulante pro tiu perfekta karitato kiu forigas ĉiuspecan timon, ankaŭ li sopiregis sin oferi hostio vivanta al Dio, kaj tiamaniere reciproki la amon de Kristo mortinta por ni, kaj eksciti en aliaj la dian flamon.

Kun tia soifo en la koro, en la sesa jaro de sia konvetiĝo<sup>15</sup>, li decidis enŝipiĝi en la direkton de Sirio, por prediki tien la kredon kaj pentofaron al la saracenoj kaj al aliaj nefideluloj.

Sed la ŝipo sur kiu li supreniris, devis albordiĝi kaj halti ĉe la ripoj de la Sklavonio<sup>16</sup>.

Konstatinte, la homo sankta, ke neniu ŝipo pretas malankriĝi al Oriento, elreviĝinte rilate sian deziron, li juĝis, ke oportunas re-troiri. Insistis do ĉe iuj ŝipistoj, vojaĝantaj al Ankono, por ke ili lin akceptu en la ŝipo.

Rifuzis tiuj lin akcepti, pro manko de nutraj provizaĵoj.

Francisko, tamen, fidante en la dia boneco, kaŝe eniris la ŝipon kune kun sia akompananto.

Oni vidis tiam nekonaton, senditan, laŭonidire, de Dio por ties senhavulo. Al iu, grande pia, el la deĵorteamuloj, tiu liveris nutraĵan provizon kun tiuj vortoj: “Ĝin konservu diligente, ĝi estas por la kaŝitaj fratuloj. Je ĝi donu al ili kun amikecaj sentoj kiam ili bezonos”.

Poste, pro ventoesceso, ne sukcesante albordiĝi neniloken, el-ĉerpiĝis ankaŭ la nutraĵoj al la ŝipistoj.

Restis nur la provizo de Francisko, portita de la nekonata homo.

---

<sup>15</sup> Nome en 1212, komence de la oktobra monato.

<sup>16</sup> La nuna Kroatio.

Kvankam malmulta ĝi sufiĉis por ĉiuj ĝis Ankono. Kaj se diri, ke pasis multaj tagoj sur la ŝtorma maro! Dio ĝin multobligis pro la meritoj de Francisko.

La ŝipistoj kiuj, spertante la terurajn danĝerojn de la maro, speritis ankaŭ la mirindaĵojn de la Sinjoro en la abismoj (Ps 106,84) kaj eskapis, intervene de la preĝoj de Francisko, el la morto, ne ĉesis danki al la ĉiopovulo, kiu ĉiam amebla kaj admirebla sin montras al siaj amikoj kaj servistoj.

## 6. Al Maroko

Ĵus albordiĝinte teren, Francisko kun nova fervoro sin dediĉis disvastigi la semon de la dia vorto.

Sed la flamo de la martiriĝo ne estingiĝis ene de sia brusto. Li preferis morton por Kristo ol ĉiuspeca merito aŭ virto.

Sin baldaŭ direktis li, do, al Maroko<sup>17</sup> por prediki la evangelion de Kristo al Miramolino<sup>18</sup> kaj al ties gentoj, esperante ke gajni la sopiratan palmon.

Forte altirita el ardo, kvankam malsaneta, li ĉiam antaŭiris la kunulon en la marŝo, li flugis, freneza pro amo, al la celo.

Sed ankaŭ tiam naskiĝis nesupereblaj obstakloj.

En Hispanio li estis trafita per gravega malsano kaj malhelpita tial daŭrigi la vojaĝon.

Dio lin konservis por aliaj destinoj. La homo sankta tion komprenis: komprenis ankaŭ, ke tiel permesis la Sinjoro ĉar lia vivo estis ankoraŭ necesas al la idaro de li generita. Kaj kvankam li taksis gajno la morton por Kristo, li revenis ilin nutri per siaj teneraj patraj zorgoj.

## 7. En landoj transmaraj

---

<sup>17</sup> Junion 1213.

<sup>18</sup> Abu-Jacob.  
Legendo majora

La karitata ardo ĉiam lin instigis al martiriĝo. Trian fojon vi provis iri inter nefideluloj, por enkonduki, per elverŝiĝo de sia sango, la kredon je la Triunuo.

Estis la dektria jaro ek de lia konvertiĝo, kiam Francisko forveturis al foraj lokoj de Sirio<sup>19</sup>, kun la decida intenco sin prezenti, neprizorgante la danĝerojn, al la Sultano de Egiptio.

Inter kristanoj kaj saracenoj tiam fajris nepacigebla milito. Ili surkampiĝis unuj kontraŭ la aliaj, kaj ne eblis pasi de unu flanko al la alia sen riski la morton. Validis ankaŭ. dekrete de la sultano, promeso de premio je ora bizanto pri ĉiu kapo kristana.

Sed la sentima kavaliro de Kristo, esperante ricevi fine la sopiratan palmon de martiriĝo, decidis antaŭen iri, neniel terurite, male aspirante al mortiĝo.

Li koncentriĝis en fervora preĝado,

Poste, kvietigite de Dio, li ekkantis tiun profetan verson: *“Eĉ kiam mi iros tra valo de densa mallumo, mi ne timos malbonon, ĉar Vi estas kun mi (Ps 22,4)”*.

## 8. Antaŭ la sultano

Li tuj ekmarŝis kune kun sia kunfrato, inteligenta kaj bona, nome Iluminato. La ĝojo de Francisko atingis la kulminon kiam, ĉe la unuaj paŝoj al li venis renkonten du ŝafetoj.

“Filo - li ekkriis - ĉu vi vidas? Ni konfidu je la Sinjoro. Jen la evangelio pulsanta por ni: *“Mi forsendas vin kiel ŝafojn meze de lupoi (Mt 10,16)”*.

Ili pluiras, kaj jen iuj saracenaj gardistoj tuj sin ĵetas sur ilin kiel lupoj kaj ilin arestas: ilin feroce kaj malŝate batas, ilin kovras per insultoj, ilin ligas per katenoj.

Post mil turmentoj, elĉepiĝintaj, pro dia dispozicio, ili estas enkondukitaj ĉe la sultanon, ĝuste same kiel Francisko deziris.

---

<sup>19</sup> Melek el Kattel.  
Legendo majora

Tiu princo ilin demandis pri kiuj la sendintoj, pri kiu celo, sub kiu titolo kaj per kiu ilo ili sukcesis atingi tiujn lokojn.

Kaj la servisto de Kristo, kun sentima kuraĝo, tiel respondis: “Ne da homo, sed de Dio ni estis senditaj, por montri al vi kaj al via popolo la vojojn de savo kaj anonci la Evangelion”.

Per tiom da sincereco kaj kuraĝo, per tia spirita fervoro li parolis pri Dio unueca kaj trieca kaj pri Kristo savanto de la mondo, ke klarege oni vidis aktualigita la promeson de la Sinjoro: *“Mi donos al vi buŝon kaj la saĝon, kiun ĉiuj viaj atakantoj povos nek rezisti nek kontraŭri (Lk 21,15)”*.

La sultano, admirante tiun kuraĝon kaj tiun heroan virton, libervole lin aŭskultis. Eĉ lin insiste invitis resti ĉe li.

Jes, - respondis Francisko certe inspirita de Dio - volonte mi restos ĉe vi, se vi kaj via popolo konvertiĝu al Jesuo Kristo. Ke se vi pro dubo hezitas forlasi la leĝon de Maometo por la leĝo de Kristo, aŭskultu: ordonu ke oni ekbruligu fajron laŭpove plejgrandan. Tra ties flamoj eniros mi kun viaj sacerdotoj: tiel vi konvinkiĝos pri kiuj leĝo kaj kredo estas pli certaj, pli sanktaj kaj pli indaj esti sekvataj”.

La sultano lin respondis. “Mi opinias, ke eĉ ne unu el miaj sacerdotoj akceptus sin elmeti al fajropruvo, aŭ suferi iun ajn pecon, por defendi sian kredon”.

Li tion jam perceptis. Fakte unu el ili, viro eminenta kaj maljuna, antaŭ tiu propono jam sin eklipsis.

“Nu - respondis Francisko - se vi promesas, ke se mi elirus senvunda el la fajro vi kaj via popolo konvertiĝu al Kristo, mi min ĵetas en ĝin tute sola. Se mi cendriĝos, tion oni alskribu al miaj pekoj, sed se, per dia virto, mi el ĝi eliros sava, vi volu rekoni Kriston, forton kaj saĝon de Dio, veran Dion kaj Sinjoron kaj Savinton de la mondo”.

La sultano konfesis, ke mem ne povas akcepti tian proponon

timante popolan ribelon. Al li tamen liveris multajn donacojn, kiujn la homo de Dio, avida nur pri animoj, malŝatis kiel koton.

Mirigite pro tia malŝato pri la teraj bonaĵoj, la sultano pliintense al li sentligiĝis kaj eĉ pli ekis lin veneri. Kaj malgraŭ ne volante konvertiĝi al la kredo de Kristo, aŭ eble ne aŭdacante tion fari, lin tamen arde invitis akcepti, avantaĝe de kristanoj malriĉaj kaj de preĝejoj, tiujn donacojn por atingi lian finan savon.

Sed Francisko, kiu abomenis la monpeson, kaj en la animo de la sultano ne vidis radikojn de vera pieco, ne akceptis.

## 9. Reveno

Ne akirinte iun ajn frukton kaj samtempe perdinte la palmon de martiriĝo, de Dio inspirite, li revenis al la fidelularo.

Kaj tiel la amiko al Kristo, laŭvole de la kompatema Sinjoro kaj pro la meritoj de siaj virtoj, kvankam arde aspirante al tiu graco, tiun ĉi nenimaniere li povis atingi, tiamaniere tamen, ke li ne perdu la meriton de la sopirita martiriĝo kaj ke estu al li estonte rezervita speciala privilegio.

Tiamaniere estis dispoziciite, ke tiu dia fajro eĉ pli arde brulu en lia koro, por ke eksplodu poste plilumanta en lia korpo.

Ho homo vere beata, kies karno, kvankam deŝirita de tirana fero, ne estis senigita je la simileco kun la Ŝafido mortigita!

Ho homo vere kaj plene beata, kies animo, ne elŝirita per malamika perforto, ne perdis la palmon de la sopirata martiriĝo!

## AMO AL LA VIRTO DE PREĜADO

### 1. Homo de preĝado

Sin sentante Francisko pilgrimanto en la korpa fore de la Sinjoro, kaj jam fariĝinta, per la krista karitato, tute neŝatema al la teraj deziroj, por ne resti sena je la dia konsolo, klopodadis, kun senĉesa preĝado, teni sian spiriton al la ĉesto de Dio.

Por li, anima vere kontempla, estis vera komforto la senĉesa preĝado. Pro tia konstanta ĉirkaŭvagado tra tiuj diaj loĝejoj jam fariĝinta kuncivitano de la anĝeloj, li serĉadis kun arda deziro la Amon de sia animo, el kiu jam lin disigis nur la muro de la karno. Preĝado estis ankaŭ helpilo en lia apostola agado, ĉar malfidinte sin mem en ĉio de li intrepreata kaj fidinte nur la dian elaltan gracon, li *ĵetis sur la Sinjoron ĉiun sian ansiaron. (Ps 54,23).*

Decide li asertis, ke la alpreĝema virto estas pli dezirinda de la religiulo ol ĉiuj aĵoj kaj, plenkonvinkite, ke sen ĝi neniuj kapablas progresi en la dia servado, ĉiumaniere plejeble, instigis la fratularon al amo al ĝi.

Tial marŝante aŭ sidante, ene aŭ fore de la konvento, dumlabore aŭ dumripoze, li estis tiel preĝabsorbata, ke ŝajnis ke al ĝi li konsekris ne nur la koron kaj korpon, sed ĉiun aktivadon kaj tempon.

### 2. Ĉe vilaĝeto San Sepolcro

Li ne lasis pasigi, pro neglekto, iu ajn inspiro de la Sankta Spirito. Ĝin li plenumis kun amo, kiam ĝi elvenis el la ĉielo kaj en ĝi raviĝis laŭ tuta ĝia daŭro.

Kaj se tiaj spiritmovoj perceptiĝis dumvojaĝe, lasante pluiri la kunuloj, li haltadis kaj ne ricevadis vane tiun novan gracon.

Multfojojn li estis mergita en tiel alta kontemplo, ke altirite al

ekstazo kaj sentante ion diinspiran, li eĉ preskaŭ ne konsciiĝis pri tio okazanta ĉirkaŭ li.

Trairis iun tagon vilaĝeton San Sepolcro li, ĉar malsana, rajdante sur azeneto, kaj ĉiuj vilaĝanoj alkuris renkonten al li kun krioj ĝojaj kaj preĝaj. Altirita, retenita, kunprenita kaj milmaniere tuŝita, li ŝajnis sensenta, senanima korpo, kaj nenion perceptanta.

Elirinte el tiu loko kaj alveninte ĉe leprolejon iom foran, Francisko, kvazaŭ li revenus el alia mondo, petis kiom ankoraŭ foras la Vilaĝo. Lia menso, absorbiĝinta tra la ĉielajoj kaj superaj belajoj, ne eniris en la percepton pri variaĵoj lokaj, tempaj, personaj.

Similaj okazaĵoj en li ne estis maloftaj, male ili okazis ofte. Tion deklaris liaj kunuloj, perokulaj atestoj.

### 3. Demonaj atakoj

Lerninte ĉe la sublimeskolo de la preĝado, ke la ĉeesto de la Dia Spirito realiĝas tiom pli ofte en tiuj kiuj preĝadas, kiom pli ili foras el la bruado de la mondo, apartigite el ĉiuj li retiriĝis, nokto-tempe, en solecaj lokoj kaj en forlasitaj preĝejoj.

Ofte al li tiam aperis ankaŭ videble demonoj, kiuj per teruraj atakoj klopodis lin disigi el la preĝabsorbo.

Sed ju pli rabie ili furioziĝis kontraŭ li, des pli forta kaj fervora iĝis Francisko en la praktiko de virto kaj preĝado, ĉar ekipiĝinte per la ĉielaj armiloj.

Diris li dume al la Sinjoro kun humilo kaj fido: “*Sub ombro de viaj flugiloj vi kaŝu min el malpiuloj kiuj min afliktas (Ps 16,8).*”

Al la demonoj male li diris: “Jetu viajn atakojn, elverŝu vian galon, aĉaj kaj trompigaj spiritoj; vi povas nur kion Dio permesas al vi, kaj mi estas ĉi tie preta elteni kun ĝojo ĉiujn ĝenojn per kiuj al li plaĉos min pruvi”.

Ne elteninte tiel nevinkeblan forton, konfuzite la malamikoj

forfuĝis.

#### 4. En la silento

Restinte sole en la silento kaj paco, li reeĥigis traarbore siajn ĝemojn, trempis grundon per siaj larmoj, manbatis sian bruston; kaj, kvazaŭ trovinte pli apertan intimaĵon, li konversaciis kun Dio.

A Tiu ĉi li respondis kiel al juĝisto, lin preĝpetis kiel al patro, al li parolis kiel al amiko.

Kaj foje de la fratuloj, kiuj pie lin sekrete observis, li estis aŭdita petegi per fortaj ĝemoj ĉe la dia indulgemo la pardonon por la pekuloj, kaj laŭvoĉe priplori la pasionon de Kristo, kvazaŭ tio okazus antaŭ si.

Foje li estis vidita, dumnokte, preĝanta kun la la brakoj kruce etenditaj, levita el grundo, aŭreolita per malgranda brilega nubo, viva esprimo de admira lumo de lia animo.

En tiuj ermitaj lokoj, kiel per certaj signoj estis montrite, al li estis rivelitaj kaŝitaj misteroj koncernantaj la dian saĝon, malgraŭ ke li ekstere nenion videbligis, se ne laŭkvante postulite de la karitato de Kristo kaj la utilo de la fratoj.

Kutimis fakte li diri: “Pro eta momenta kontentiĝo oni povas perdi valoregan bonaĵon kaj igi la Donacinton ne plu koncedi ion tian”.

Pro tio, kiam li revenis el sia preĝaĵoj kiuj lin komplete transformis, ĉiumaniere klopodis unuformiĝi al la aliaj, por ke la popolo estima etoso por eksteraj verkoj ne disipu la internan kompenson.

Kiam li estis kaptita, en ĉeesto de aliaj, de dia vizito, li trovis ĉiam la manieron sin kaŝi por ne elmeti al publiko la komunikaĵojn de la Edzo.

Dum la komuna preĝado li evitis eksterigojn, ĝemojn, suspirojn, nekutimaĵojn ĉar li preferis sin kaŝi, kaj ĉar, trepinte en la



profundecojn de de la spirito, li absorbiĝis en Dio.

Li diradis al siaj fratuloj: “Kiam la servisto de Dio dumpreĝe estas vizitata el alto, tiel li parolu al la Sinjoro: «Tiun konsolon vi sendis el la ĉielo al mi pekulo kaj malindulo, kaj mi ĝin al vi konfidu por gardado, ĉar mi min sentas ŝtelisto de via trezoro». Kiam poste li sin levas el tiu, li sin montru tiel povrulo kaj pekulo antaŭ la aliaj, kvazaŭ neniun novan gracon li estas ricevinta”.

## 5. Efiko de lia preĝo

Dum Francisko troviĝis en Porciùnkola, la episkopo de Asizo malsupreniris por lin viziti kiel laŭ sia kutimo.

Jam alveninte, kun ekscesa familiareco li senprokraste sin adresis al la ĉeleteo de la sanktulo kaj sen frapi ĉe la fermilo kaj sen atendi enirpermeson, puŝis la pordon ekenirante.

Ke li tion neniam farus! Apenaŭ enŝovinte la kapon enen li, kaptite de fulma tremado, restis rigidiĝinta en la membroj, senvoĉkapabla kaj de dia forto estis tuj repuŝita retroen kaj foren.

Miris la episkopo kaj kiel eble senĝene hastis iri inter la fratuloj. Ricevinte de Dio la voĉkapablon, unue li konfesis sian kulpon.

Renkontiĝis iam la servisto de Dio kun la abato de la monaĥejo de sankta Justeno, en la diocezo de Perugia. Pro riverenco al la sanktulo kaj pro bezono interparoli kun li pri aferoj koncernantaj la savon de sia animo, la abato tuj deĉevaliĝis. Poste, prenante forpermeson, li humile pripetis preĝojn al Dio.

“Mi tion faros volonte!” - respondis Francisko. Kaj dum tiu malproksimiĝis, li diris al la kunulo: “Atendu iomete, ho frato, ke mi liberiĝu de mia ŝuldo”.

Francisko apenaŭ ekis preĝi, ke la abato tuj sentis en si mem nekutiman fervoron kaj spiritan dolĉecon neniam antaŭe spertitajn. Ĉedis li ekstazen kaj sin perdis en Dio. Li restis tiel laŭ

kelke da tempo ĝuante je tiuj ĉielaj konsoltoj.

Reveninte siakonsciigēn, li ne povis ne atribui tiun dian flamon al la preĝo de Francisko.

Ek de tiam la abato kun pli intensa amo sin ligis al la ordeno kaj, poste, rakontis al ĉiuj la eventon kiel veran miraklon.

## 6. Diligenteco en la psalmado

La sanktulo kutimis reciti la kanonajn laŭdojn kun timo kaj devoteco kune.

Kvankam suferanta pri okulo, stomako, lieno, neniam li apog-iĝis dumpsalmade, rekte staris senkapuĉe, kun la okuloj absorbitaj kaj neniam mallaŭtigante la voĉon.

Se li estis vojaĝanta, li haltis je la horo de la dia ofico kaj ĝin recitis ankaŭ se plaŭdadis pluvo. Li kutimis diri: “Se la korpo senpene prenas sian nutraĵon, estonta paŝto la unua kaj la dua de vermoj, per kiom da paco kaj sereneco la animo ne devus preni la sian kiu estas vera vivo?”.

Peza kulpo estis por li se kelkfoje dumpreĝe distriĝis tra senutilaj pensoj. Ne hezitis tiam li iri por konfeso kaj tuja pentofaro.

Kutimiĝinte poste al tiel vigla kaj asidua diligenteco nur maloftege suferis je tiaj molestoj.

Dum iu karesmo iam li kavigis en ligno malgrandan vazon por okupiĝi fruktodone en ŝparmomentoj. Okulumantan poste tra lia imagpovo dum la psalmado de terco, kaj do iomete deturnantan, tiun li prenis kaj, movite de fervoro, senhezite ĵetis al la bruligejo dirante: “Mi ĝin oferos al la Sinjoro, el kies ofero ĝi min ĵus forigis”.

Li psalmis kun tiel granda atento, mensa kaj spirita, ke ŝajnis, ke li havus Dion sense ĉi-kunan. Se el la psalmoj li okule rimarkis la sanktan nomon de la Sinjoro, ŝajnis, ke pro dolĉeco li lekus al si la lipojn.

Li volis ke oni honoru tiun nomon per speciala riverenco, ne nur en la penso kaj en la vortoj, sed ankaŭ en la skribaĵoj.

Enmensigis do li inter siaj fratuloj, kun fervoro kaj efiko, ĉiam rikolti tiujn paperojn en kiuj tiu videblas skribita, kaj ilin meti en purigita loko, por eviti, ke tiu sankta nomo estus tretita de paŝantoj.

Se hazarde al li okazis ekdiri aŭ aŭdi la nomon “Jesuo”, plena je jubilo, li tute transformiĝis nivele de vizaĝo, kvazaŭ li gustumus mielon aŭ aŭkultus ĉielan muzikon.

## 7. La gripo de Greccio

Tri jarojn antaŭ ol morti<sup>20</sup>, en Greccio li volis laŭvive rekrei, kun la plejgranda soleno, la naskiĝon de la Infano Jesuo, por lin igi amata de ĉiuj, antaŭobteninte la papan permeson por ke tio ne alskribus al mava novaĵo.

Li pretigis humilan kripon, kun ene fojno kaj apude bovo kaj azeneto.

Partoprenis fratuloj, alkuris popolo. La arbaro reeĥis voĉojn, kantojn kaj sonojn, La nokto tiel eklumis, ke ĝi ŝajnis klara tago kaj solena cirkonstanco.

La sanktulo, antaŭ la gripo estis tute pieco, tute larmoj, ĝojo-inundita.

Dum meso, al kiu la brutmanĝejo rolis alatare, diakono Francisko kantis la evangelion kaj predikis al la popolo pri la naskiĝo de la malriĉa Reĝo, kiel li kun ama tenero kutimis nomi la Infano de Betleemo. Kavaliro, virta kaj sincera nome Johano el Greccio<sup>21</sup> kiu pro amo al Kristo malŝatinte mondumaĵojn al li jam kuniĝis kun liga familiareco, komunikis, ke mem estis vidinta belan infanon dormanta en la gripo kaj ke la beata Francisko, tiun brakumante, ŝajnis lin volis vekti.

---

<sup>20</sup> Kristnaskon 1223.

<sup>21</sup> Johano Vellita (Triaodenano).  
Legendo majora

La apero estas tre kredebla. Tion atestas la sankteco de tiu kiu vidis, plenpruvas la vero en ĝi ombrata kaj konfirmas la mirakloj.

Fakte la rememorado pri la knabaneto de Betlehemo, establita de Francisko, vekas en dormantaj koroj la kredon je Kristo, kaj la fojno de la gripo, konservita de la popolo, sanigas brutaron el malsanoj kaj forigas ĉiun peston. Dio tiel glorigas sian serviston kaj montras, per evidentaj mirindaĵoj, la efikon de la sankta preĝado.

INTELIGENTECO PRI LA SKRIBOJ  
KAJ PROFETIA SPIRITO

**1. Inteligenteco pri la Sanktaj Skriboj**

La senlaca ekzercado en la preĝado kaj la asidua praktiko de la virto kondukis la homon de Dio al admira spirita sereneco.

Kvankam ne posedante laŭstude la rektan konon pri la Sanktaj Skriboj, tamen, iluminita de la brilo de la eterna lumo, li per nedirebla mensa akreco en ili traesploris la plej profundajn sekretojn.

Kun la animo pura je ĉiu makula ombro, li elfosis la plej kaŝitajn misterojn: kaj kien ne alvenis la scienco de la doktoroj, penetris la amo de la amanto,

De tempo al tempo li legadis la sanktajn librojn kaj ĉion li gravuris en sia animo, ĉar kion li lernis unukaze per la menso, tion li remaĉis per amsento de sia devoteco.

Iun tagon liaj fratuloj lin petis ĉu li konsentus ke la kleruloj akceptitaj en la ordeno zorgu studi la Sanktan Skribon.

“Jes, - respondis la sankta homo - al mi tio plaĉas kondiĉe, imite de Kristo kiu pli preĝis kaj malpli legis, ne malzorgu la studon pri la sankta preĝo-praktiko, nek sin dediĉu nur por akiri paroladarton, sed por praktiki la verojn lernitajn, kaj, post persona praktika observado, ilin instrui al la aliaj. Mi volas, ke miaj fratuloj estu disĉiploj de la evangelio kaj, per la kono de la vero kaj bono, progresu en la puron de l’vivo, ne apartigante la simplecon de kolombo el la prudento de serpento, kiujn Kristo per siaj diecaj lipoj unuigis!”.

## 2. Aglo fluganta

Religiulo, magistro pri Sanktaj Skriboj, lin iam en Siena demandis pri malfacilaj problemoj.

Humila Francisko ekis ekspliki la misterojn de la dia saĝo tiel doktrine precize, ke pri tio ege mirigis tiun kleran homon, kiu poste diris: “La teologio de tiu homo vere leviĝas sur laflugiloj de pureco kaj kontemplado, kaj estas aglo kiu flugas. La nia, kompare kun la lia, rampas tertere”.

Kvankam ne lerta en la parolado, tamen li elverŝigis saĝon, kaj solvis dubojn kaj problemojn, kaj eltiris al la lumo la kaŝitajn verojn.

Ne alportu miron lia profunda kompreno pri la Sanktaj Skriboj. Pro la perfekta asimiliĝo al Kristo ilin li portis enkarniĝintaj en sia vivo, kaj per graco de la Sankta Spirito li havis en la koro ties inspiranton.

## 3. En Damietta

Francisko brilis ankaŭ je admira profeta spirito.

Li antaŭvidis la estonton, malkovris la sekretojn de la animoj, vidis la malĉeestaĵojn kvazaŭ ĉeestajn, aperis al forestantoj.

Kian kristana armeo sieĝis Damiettan, Francisko troviĝis tie provizita ne je armiloj, sed je fido.

Iun tagon li sciis, ke oni decidis ataki kaj al tio kristanaj armeoj ekprepariĝis. Multe tio lin tiam suferigis kaj ĝemigis. Poste aldonis al la kunulo. “La Sinjoro al mi rivelis, ke se ili ekbatalos hodiaŭ, hodiaŭ la kristanoj suferos la plej aĉan sorton. Sed se mi tion diras mi estos juĝata frenezulo, kaj se mi silentas, mi ne forfuĝos el la rimorsoj. Kion vi konsilas, ke mi faru?”.

“Neniom interesu vin la juĝo de homoj; ne okazus unuafonon, ke oni tia vin taksas. Liberu vian konsciencon kaj timu pli Dion ol homojn. Parolu”.

Pro tiu instigo, la heroldo de Kristo tuj alvenis ĉe kristanojn por liveri savajn sciigojn: malkonsilis la interbatalon kaj antaŭdiris la malvenkon<sup>22</sup>. Bedaŭrinde kristanoj mokridis pro liaj vortoj, malmoligis siajn korojn kaj ne volis fleksiĝi ol rompiĝi.

Ili iris, reciproke provokis, okazis batalo. Sed la kristana armeo estis fuĝe rompita en malhonoro de plena malvenko kaj ses mil mortinta kaj prizonuloj.

Klare evidentiĝis tiam, ke ne licis dispi la saĝon de la malriĉulo *“ĉar la animo de la justulo foje sciigas la veron pli bone ol sep gardistoj sentinelantaj (Ekl 37,18)”*.

#### 4. Antaŭvido pri morto

Post la reveno el transmario, troviĝinte predikcele en Ĉelano, Francisko estis invitita de devota kavaliro tagmanĝi ĉe li.

La sanktulo akceptis. La tuta familio plengojis pro la alveno de malriĉuloj de Kristo.

Sed antaŭ la ekmanĝo, Francisko, laŭ sia kutimo, starante kun la okuloj levitaj al la ĉielo laŭdis kaj preĝis al la Sinjoro. Poste, kun tiu kavaliro aparte, tiel al li parolis konfidence: “Frato gastiganta, venkite de via insistado mi venis tagmanĝi en via hejmo. Tamen vi ni prompte sekvu miajn avertojn. Ne tie, sed alie estos via manĝo. Tuj nun konfesu sincerece kaj pentofare la pekojn, kaj ne restu makulo en via konscienco. La Sinjoro precize hodiaŭ al vi redonos la rekompencan ĉar vi kun granda devoteco gastigis liajn povruojn”.

Obee al la voĉo de la sanktulo, la kavaliro konfesis al lia kunfrato la pekojn, metis en ordon siajn aferojn kaj sin preparis kiel eble plejbone al morto.

Tiu tiel iris ricevi, pro la devota gastigado liverita al la profeto, la rekompencan (Mt 10,41).

---

<sup>22</sup> 12 aŭgustan 1219.  
Legendo majora

Provizita fakte, pro la admono de la sanktulo, je la armiloj de la pentofaro kontraŭ la subita morto, tiu kavaliro evitis la inferon kaj meritis aliri la etenajn tabernaklojn.

## 5. Malĝoja finiĝo de recidivulo

En la tempo dum kiu Francisko malsane kuŝis en Rieti, al li estis prezentita en liteto, ĉar frapita per grava malsano, iu prebendulo nome Ĝedeono, lasciva kaj monduma homo.

Tiu ĉi larme preĝpetis, kaj kun li ĉiuj, por ke Francisko lin benu per kruco.

“Kiel mi povas beni vin, - respondis la sanktulo - kiu vivis tute laŭkarne, sen iu ajn ereto da Ditimo? Tamen, pro la devotaj insistoj de tiuj viaj propetantoj, mi vin krucoŝignas en la nomo de la Sinjoro. Sed avertiĝu. ke pli suferigaj malbonoj vin trafos se, nun liberiĝinta, revenos al la vomado. La peko pro maldankemo al tiu ĉiam el la ĉielo penojn pli pezajn”.

Kaj li super tiun skizis krucoŝignon. Subile tiu, antaŭe kuntiritita, stare ellitiĝis eksplodante per laŭdoj al Dio kaj kriante: “Mi resaniĝis!”.

Aŭdiĝis ankaŭ kraki la lumbaj ostoj, same kiel per la manoj oni hakas sekan lignon.

Baldaŭ tamen, forgesinte Dion, li revenis al siaj malnovaj diabolaj moroj.

Sed iun vesperon, postverspermanĝe ĉe kanoniko kaj tie enlitiĝinte, abrupte dumnokte enfalis la tegmento de tiu domo.

La aliaj evitis morton, nur tiu mizerulo, trafita dumdorme, resti premegita kaj mortigita.

Pro justa dia juĝo, *“la fina stato de tiu homo fariĝis pli malbona ol la unua (Mt 12,45)”*.

Necesas esti danke pri la ricevita pardono kaj ne reveni al la kulpo, la nova falo duoble malplaĉas al la Sinjoro.



## 6. Tuja konvertiĝo

Virino senedza kaj piema iam venis ĉe la sanktulon por al li malfermi angorojn de sia koro kaj ricevi konsolon.

Ŝi havis edzon tro malbonan kiu ŝin obstaklis en piecaj devotaĵoj. Ŝi lin urĝe invitis preĝpeti Dion por ke ties indulgo tuŝu al edzan koron.

“Iru pace - al ŝi li diris - kaj fide atendu la gracon esperitan. Dume vi parolu al via edzo, je la nomo de Dio kaj mia. Nun estas tempo de indulgemo, poste sekvos tiu de justeco”.

Post la beno, la virino rehejmeniĝinte kaj ĉi-ene trovinte la homon, raportis pri la mesaĝo.

Laŭmomente, la Sankta Spirito malsupreniris sur lin kaj tute lin transformis kaj ankaŭ igis lin diranta, per nekutima dolĉeco: “Virino, ek, ni komencu vere servi al Dio, kaj savu niajn animojn”.

Poste, sugeste de la sankta edzino, ili decidis porestante vivi celibate, kaj fine, plenplenaj je jaroj, en la sama tagp ili flugis al la ĉielo.

Vere admirindis en Francisko la profeta virto, pere de ĝi li al senfortaj membroj donis reviviĝon kaj al ŝtonecaj koroj la pie-mon. Kaj ne malpli admirinda estis en li la klarvido de la profetia spirito, per kiu li ankaŭ antaŭvidis la intimon de la konsciencoj, kvazaŭ li estus ricevinta kiel Elizeo la duoblan Elijan spiriton.

## 7. Li legas en la animo

En Sieno li estis antaŭanoncinta al sia familiano aferojn kiuj al tiu estos okazintaj estonte.

La klerulo pri teologio, plisupre menciita<sup>23</sup>, pridubante, ke tiu profetaĵo, al li raportita, vere devenus el la sanktulo, volis certiĝi proprintervene.

---

<sup>23</sup> Ĉe la numero 2 de tiu ĉi ĉapitro.  
Legendo majora

La homo de Dio ne nur tion konfirmis, sed similan komunikis ankaŭ rilate lin<sup>24</sup>. Kaj por tion solide enpremi en lia menso, la sanktulo por li legis en lia animo konsciencan skrupulon ĝin suferigantan, kaj el tiu lin liberigis.

Ĉio antaŭdirita de Francisko realiĝis kaj la finiĝo de tiu religiulo pri tio estis pruvo.

## 8. Malkovritaj pensoj

Reveninte el transmario certamamente li sin sentis laca kaj streĉita kaj, tial, bezona je azeneto por lokŝanĝi.

Lin akompanis frato Leonardo el Asizo. Laca kaj eĉ trafita de homa febleco, tiu ĉi ekpensis tiel: “Ne travivis egalrange liaj gepatroj kaj la miaj. Kaj nun li rajde iras kaj mi piede por gvidi la azenon”.

Dum tiu ĉi tion ekpensis, desaltis al tero Francisko kaj alproksimiĝinte al li tiel parolis: “Ne konvenas, ke mi iras ĉevale kaj vi piede, ho frato, ĉar vi estis pli nobela kaj potenca en la mondo”.

La fratulo restis muta kaj, ruĝiĝinte pro honto vidiĝi malkovrita, sin ĵetis ĉe la piedojn de la patro kaj, larmbanite, nete konfesis sian penson kaj pardonpetis.

## 9. Deziroj kontentigitaj

Fratulo<sup>25</sup>, devota al Dio kaj al Francisko, estis afliktita en la animo pro senpaŭza penso: Ĉu indas dian gracon tiu al kiu la homo de Dio montras familiarecon kaj amon; ĉu male estos for de la vico de la elektitoj tiu kiun li fremdestime rigardas.

Ardis, do, en li la deziro gajni por si lian amon. Al neniu tamen li tion manifestis. Sed Francisko tion legis en lia animo. Iun tagon lin Francisko vokis al si kaj tiel al li parolis kun patrina dolĉeco:

---

<sup>24</sup> Foriro el la dominikana ordeno.

<sup>25</sup> Frato Rocerio.

“Neniu penso vin turmentu, filo mia, vi al mi estas unu el plej karaj kaj indegaj je mia familiareco kaj amo”.

Ŝtoniĝis la fratulo pro la neatendita komunikado; kaj de tiam ne nur pliigis ĉiam pli la devotecon kaj la amon al la Patro, sed estis ankaŭ riĉigita per pli altaj donoj de la Sankta Spirito.

Simila evento okazis ankaŭ ĉe Verna.

Dum la beata Francisko estis porpreĝe retirita en sia ĉeleteo, lia kunfrato<sup>26</sup> arde provis deziron havigi al si etan frazon el la diaj vortoj skribitan liamane. Li esperis, per tia rimedo, superi gravan ne karnan tamen, spiritan tenton.

Li fandiĝis pro la deziro, sed ne aŭdacis, pro timideco, tion konigi al la patro.

Sed al tiu al kiu tion ne diris homo, tion rivelis la Sankta Spirito. Francisko portigis al si paperon kun skribilo kaj inkujo, kaj skribis siamane la laŭdojn al la Sinjoro, ĝuste tiujn de tiu deziritajn, aldonante plue sian benon.

Poste ĝin enmanigis al li, dirante: “Prenu tiun paperon kaj ĝin konservu ĝismorte”.

Kaj apenaŭ li tuŝis la paperon, la tento malaperis.

La papero estis bone konservita, kaj poste, okazinte, ke per ĝi eventis multaj mirakloj, fariĝis plua pruvo pri la sankteco de Francisko.

## 10. La silento de iu fratulo

En fratula komunumo vivis religiulo je fervorega religio: ŝajne sanktule, sed multe kurioze. Absorbite en ĉiamdaŭra medito, li observis silenton laŭ nekredbla maniero, ĝis pekkonfesi ne per vortoj sed per signoj.

Francisko hazarde iris tien; vidis tiun fratulojn pri kiu ĉiuj parolis kun supermezura laŭdo.

---

<sup>26</sup> frato Leono.  
Legendo majora

Sed la homo de Dio vidis pli enen ol la aliaj kaj ekriis: “Zor-  
gu ne laŭdi en tiu ĉi diablajn afektaĵojn. Sciuj, male, ke temas pri  
ruzaĵo de satano, ties trompo”.

Ŝajnis dura tiu juĝo al la fratuloj kaj ili ne povis kredi, ke la  
demono sukcesus koloriĝi per tiomaj perfektaj signoj.

Sed ne pasis multe da tempo, ke tiu, foririnte el la ordeno, klare  
vidigis per kiu plenintuo la sanktulo legis la sekretojn de lia koro.

Antaŭdirante tial kun plena certeco la ruiniĝojn de multaj, ŝajne  
justuloj, kaj la konvertiĝon al Kristo de aĉuloj eĉ pli nombraj,  
Francisko montris esti proksime al la spegulo de la eterna lumo, tra  
kies admira brileco la okulo de lia animo klare vidis okazotaĵojn  
kvazaŭ nun okazantaj.

## 11. Satano sur la dorso de fratulo.

Iam lia vikario<sup>27</sup> tenis kapitulon dum li, enfermita en sia ĉele-  
to, preĝis kaj sintenis kiel interpretisto kaj porparolanto inter la fra-  
tularo kaj Dio.

Unu el ili, kun vualita preteksto, ne volis submetiĝi al la discipli-  
nata juĝo.

Lin vidis en spirito la homo de Dio kaj, vokinte al si alian fra-  
tulon, tiel al tiu ĉi parolis: “Mi ĵus vidis la demonon sur la dor-  
son de tiu malobeema homo, ĝi lin fikse tenis ĉe la gorĝo. Mas-  
trite de tiel horora kavaliro, li skuis la bremson de la sankta oboe  
kaj sekvis la bridojn de la diabla instinkto. Ties avantaĝe mi prop-  
etis gracon ĉe Dio, kaj la demono konfuzita lin lasis. Iru kaj  
diru al li, ke li prompte obeŭ”.

Post la averto de la mesaĝisto, tiu fratulo tuj korrevenis al Dio  
kaj kun sincera humilo ekgenuis antaŭ la vikario.

## 12. Dezirita beno

---

<sup>27</sup> Frato Pero Cattani.  
Legendo majora

Venis al Greccio du fratulo el multfore, kun arda deziro vidi la homon de Dio kaj ricevi lian benon.

Sed tiu ĉi restadis en sia ĉelete absorbite en kontemplado, kien li retiriĝis ne delonge.

Senkuraĝiĝinte, ili ree ekvojis.

Oni vidis tiam Franciskon, malkiel ol kutime, eliri kaj ekkrii al ili de malantaŭe por sin aŭdigi. Kiam poste tiuj, haltinte, turniĝis al li, li gestis larĝan benon per krucsigno, ĝuste kiel ili intense estis dezirintaj.

Kiu al li konigis tion? Neniu el la homoj.

### 13. Skandaloj de malproksime

Kromaj du fratuloj iam venis el la Tero de Laboro<sup>28</sup>, kaj la pli-maljuna, laŭvoje, skandalis la plijunan.

Demandite poste de la sanktulo, kiel tiu sin kondukis laŭvoje, tiu lasta respondis: “Bone, sufiĉe bone!”.

“Ne mensogu, subpreteksto de humileco - laŭtvoĉis la sanktulo. - Ĉion mi scias, ĉion; sed atendu kaj vidos”.

Miris la demandita fratulo scivolemiĝante pri la maniero per kiu li povis en spirito koni aferojn tiom forajn.

Post kelke da tagoj la skandala fratulo forlasis la sanktan veston malŝatece, sen pardonpeti al la patro kaj sen atendi la profiton korekton,

Du aferojn evidentiĝis en la ruiniĝo de tiu homo: la modereco de la dia justeco kaj la klarvido de la profeta spirito.

### 14. Dulokiĝo

Kiel krome Francisko jam ricevis el Dio ankaŭ la gracon aperi, dumloĝe en unu loko, al aliloĝaj persono; oni povis certiĝi pri tio el la rakonto pri la fajra ĉaro ene de la loĝejaĉo apud A-

---

<sup>28</sup> Suditalio, tuj post Caserta.  
Legendo majora

sizo, kaj el tiu alia pri la kapitulo en Arleso, kie li aperis kun la brakoj krucetenditaj dum la parolado de Antonio.

Tiuj mirindaĵoj certe okazis pro dia dispozicio, por ke el la admira apero laŭkorpe ĉeestiga, rezultiĝu samklare, ke lia spirito ĉeestis, kaj apertis al la lumo de la eterna saĝo *“kiu pli lertmova ol iu ajn movo, penetras traĉie per sia pureco, komunkiĝas al sanktaj animoj tranacie, kaj formas la amikojn de Dio kaj la profetojn (Saĝ 7,24-27)”*.

Kiom veras, ke al la simpluloj kaj la malgranduloj la dia Majstro kutimas manifesti siajn altajn misterojn!

Ni tion vidas en Davido, la plej eminenta el la profetoj, plue en la princo de la apostoloj, Petro, kaj nun fine en la malriĉulo de Kristo.

Simplaj kaj senkleraj tiuj ĉi, kiuj fariĝis, per specialaj lumoj de la Sankta Spirito, elstaraj pro doktrino. La unua, fakte, estis paŝtisto, por paŝti la sinagogon, liberigitan el la Egiptujo, la dua, fiŝisto, por plenigi la reton de la Eklezio per ĉiuspeca gento; la lasta, komercisto, por aĉeti, post vendado kaj donacado de sia varo, la evangelian lekanton.

## Ĉapitro dekdua

### EFIKO DE PREDIKADO KAJ DOMO DE SANIGO

#### 1. Dubo

Francisko, servisto kaj prizorganto de Kristo, celante ĉion fidele kaj perfekte plenumi, prefere ekzercadis en tiuj sanktaj virtoj, kiujn revelacie alprenis esti plej plaĉaj al Dio.

Pro tiu ardega soifo plaĉi ĉiam pli al la Sinjoro, naskiĝis en lia animo dubo kiu tenis lin agitita plurtage, kaj kiun, ĉiufoje reveninte el la preĝo, li proponis al la fratuloj por ke ili helpu ĝin solvi.

“Kion al mi vi konsilas, miaj filoj? Kion vi opinias preferinda por mi? Ke mi engaĝiĝu nur preĝi aŭ ke mi inter homoj turniĝu por prediki?”

“Mi, mallerta, simpla kaj kruda en la parolado, sentas, ke mi ricevis gracon pli taŭgan al la preĝo ol al la pedikado.

“Kaj plue en la preĝo oni ĉiam gajnas kaj akumulas gracojn sur gracoj, en la predikado male oni distribuas la donojn ricevitajn el la ĉielo.

“En la preĝo intensiĝas la sentoj, oni unuiĝas al la supera vero kaj unika bono kaj fortikiĝas en la virtoj, en la predikado, male, polvoplenuiĝas la piedoj de la spirito, oni distriĝas tramultafero kaj loziĝas la perfekta observemo.

“En la preĝado, fine, ni parolas kun Dio, ni kvazaŭperceptas Dion, ni vivas kun la anĝeloj, kun anĝeloj konversacias; dum en la predikado, kontaktadante homojn kaj travivante inter ili, ni laŭhome ekpensas, ekvidas, ekparolas, kaj eksentas,

“Nur unu fakto kontraŭas kaj havas antaŭ Dio pli grandan pezon sur tiuj motivoj, nome ke la ununaskita Difilo, senfina saĝo, descendis el la ĉielo por la savo de la animoj, kaj do por reformi

per sia ekzemplo la mondon, diri vortojn de vivo, elaĉeti la homon per sango, lin purigi per akvo kaj nutri per la sakramento de vivo, ĉion donacante senrezerve.

“Ĉar ni devas fari ĉion laŭ tio kion ni vidas en li, kiel en la sublima *monto* (El 25,40), ŝajnas esti pli akcepta al Dio ke, imite de lia konduto, mi foriĝu el la kvieto de la ĉelo kaj min donu al la laboro”. Laŭplurtago li pridiskutis la problemon kun la fratuloj, ĉiam per la samaj argumentoj finiĝante ĉiam en la saman dubeman konkludon.

Antaŭsciis Francisko mirindajn verojn, per la profetia spirito, sed tiun dubon li ne sciis kiel solvi, certe pro dia dispozicio, por ke estu manifestata, per ĉiela orakolo, lia mandato de predikado, kaj sin tenu en la humilo la servisto de Kristo.

## 2. Al Silvestro kaj Klara

Ne hontis konsulti malsuperulojn ankaŭ rilate negravajn aferojn, li, mem vere Minora, kiu ellernis grandajn verojn el la plej-supera Majstro.

Ĉar lia precipa zorgo estis kiel eble plej multe plaĉi al la Sinjoro, jena estis lia unua filozofio, jena lia arda sopirego ĝis la vivfino: enketi ĉe saĝuloj kaj simpluloj, perfektuloj kaj neperfektuloj, granduloj kaj malgranduloj kiel pliefike atingi la supron de la evangelia perfekteco.

Li sendis, do, du fratulojn al frato Silvestro, nome al tiu kiu iam vidis eliri el la buŝo de la dumpreĝe mergito en la kontemplado, sur la monto superrigardanta Asizon, krucon, por ke ili lin instigu peti al Dio lumon rilate tiun dubon.

Li la samon taskigis al la virgulino Klara: por ke pere de iu el la plej sanktaj kaj plej simplaj siaj spiritaj filinoj, kaj ŝi mem kun ĉiuj aliaj preĝpetus, ke Dio manifestu sian precizan volon.

La honorinda sacerdoto kaj la virgulino konsekrita al la Sinj-



oro, inspiritaj de la Sankta Spirito, estis je unusola penso: estis volo de Dio, ke la heroldo eliru prediki.

Ne jam finis la du mesaĝistoj komuniki la ĉielan respondon, ke tuj Francisko leviĝis, sin zonis kaj senmalfrue ekmarŝis.

Li kuris. Estis tioma la spirita fervoro kun kiu obeis la la ĉielan mandaton, ke aperis klare kiel la mano de la Sinjoro estis apogiĝinta sur lin kaj lin investinta per nova virto.

### 3. Prediko al la birdoj

Apud Bevagna li trafis svarmon da birdoj, diversspecaj, kuŝantaj sur arboj aŭ nutriĝantaj sur herbejoj.

Abrupte li estis apud ili; kaj kvazaŭ ili havus racion, li ilin ĝentile salutis.

Senmovaj, okulleviĝinte ekrigardis ĉiuj kaj la surarbe kuŝantaj etendis malalten la kolon, dum lia pasado.

Kiam li estis meze de ili, ilin zorge instigis momentete silenti kaj aŭskulti la diajn vortojn: “miaj fratetoj, vi devas multe laŭdi la Sinjoron. Li vin kovris per plumoj kaj vin dotis per flugiloj por alten flugi, donacis al vi la aeron kaj sen via peno al vi pretigas nutraĵon”.

Dum li parolis, la birdoj, per admiraj ammontroj, streĉis la kolon, etendis la flugilojn, malfermis la buŝetojn kaj lin rigardis atente.

Ĉirkaŭvagante, korgoje, inter ili, tiujn li flugtuŝis tunikrande, kvazaŭ li volus ili karesi, kaj neniu delokiĝis.

Li fine krucsignis sur ĉiujn kaj benante.

Gaje la birdaro kune flugis en la aero kantante.

Kaj ankaŭ li malproksimiĝis por unuigi al sia fratuloj, kiuj surstrate lin atendis mirigitaj.

La homo simpla kaj pura sin kulpigis pri ĝistiam neglekto prediki al la birdaro.

#### 4. **Hirundetoj en Alviano**

Li antaŭeniris laŭ tiuj stratoj, ĉiam predikante, ĝis atingis vilaĝeton nomitan Alviano.

Li kunigis la popolon kaj ordone petis silenton. Sed li ne povis esti aŭdita ĉar la hirundoj ĉirkaŭ siaj nestoj bruege kvivitis.

“Fratinoj miaj hirundetoj, - tiam invitis Francisko - nun tempas, ke povu paroli ankaŭ mi, vi jam kantis sufiĉe ĝisnun. Aŭskultu ankaŭ vi. Ek, silentu ĝis kiam la prediko finiĝos”.

Kaj tiuj abrupte eksilentis, kvazaŭ ili komprenintus; kaj ne forlasis la lokon.

La popolo, vidinte tion, plena je miro, gloris la Sinjoron. La famo de la miraklo ĉie vastiĝis, kaj puŝis multajn al respekto al la sanktulo kaj obeo al la kredo, same kiel la jena okazaĵo montras.

#### 5. **Hirundeto en Parma**

En urbo Parma, iu studento kun bona karaktero, dum kun iuj siaj kunuloj zorgis pri studo, ĝenate pro la strida kanto de hirundo, tiel kriis: “Sendube estas unu el tiuj al kiuj la sanktulo, dumpredike obstaklite, altrudis silenton”.

Kaj adresiĝinte al ĝi, tiel familiare parolis: “Je la nomo de Francisko, servisto de Dio, mi ordonas, ke vi venu ĉe min kaj silentu”.

La hirundo, je la sono de tiu nomo, kiel obea disĉiplo silentis kaj alportiĝis sur liajn manojn kun nekredebla konfidenco.

Plena je miro, la studento tuj forpermesis la hirundon kaj ne ĝin plu aŭdis voĉumi.

#### 6. **La barko de Gaeta**

Dum iama prediko sur la sablobordo de Gaeta, homamaso, puŝite de devoteco, entuziasme enrompis sur lin por lin tuŝi.

Sed la servisto de Dio, por eskapi tiun varman aprobon, saltis sur apudan barketon. Kaj ĝi, kvazaŭ puŝite de intima forto dotita

je racio, senremiste kaj kun ĉies miro, malproksimiĝis el la rando. Poste, je konvena distanco, ĝi restis senmova kiel klifo inter ondoj ĝis kiam la homo sankta finis sian paroladon.

Kiam la popolo, postaŭdinte la dian vorton kaj postricevinte la benon, foriris, jen la barketo mempuŝe revenis sabloronden.

Tial kiu menso tiel senpia kaj tiel dura aŭdacus malŝati predikon de Francisko, antaŭ la fakto ke, per lia nekomuna virto, ne nur fariĝas obeaj la senraciaj, sed ankaŭ la senvivaj estaĵoj senhezite obeas?

## 7. Prediko antaŭ la papo

En li, ĉien ajn li irus, estis ĉiam ĉeesta la Spirito de la Sinjoro, kiu lin unktis kaj sendis. En lia koro loĝis Kristo, virto kaj saĝo de Dio, por ke lia lipo redundancu per la sama saĝo kaj liaj verkoj brilu je bruegaj mirindaĵoj.

Lia parolo, fakte, estis kiel fajro kiu penetras la intimon de la koroj kaj plenplenigis la mensojn je admiro, ĉar ĝi ne sin prezentis en rolo de homa saĝo kaj odoris je dia inspiro.

Iam, puŝite de la kardinalo de Hostio, li estis parkeriginta paroladon pretigitan por esti recitita antaŭ la Papo kaj kardinaloj. Sed kiam li troviĝis meze de ili, ĉion li forgesis tiel ke restis tute muta.

Post esti konfesinta la aferon, li adresiĝis al la Sankta Spirito. Tiam li transformiĝis al torento de apostola elokvento kaj la vortoj fontis el lia lipoj per tioma efiko, ke kontuŝis tiujn plejaltajn homojn kaj montris, ke Dio parolis per lia buŝo.

## 8. Lia predikado

Ĉar li praktikadis kion pervorte instruadis al la aliaj, ne timante iun ajn riproĉon, li paroladis al ĉiuj kun evangelia libero.

Li kapablis, do, ne dorloti la kulpojn, sed ilin vipi ĝissange; nek

senkulpigi la pekojn, sed ilin vundi ĝismorte per aspraj riproĉoj.

Kun la sama mensa memcerteco li parolis al la plenkreskuloj kaj al la infanaro, kaj kun la sama spirita gajeco al la multaj kaj al la malmultaj.

Viroj kaj virinoj, ĉiuagaj, alkuris vidi kaj aŭskulti la homon novan, donitan de la ĉielo al la mondo.

Kaj lin, ardan je la amfajro, ne limigis limoj: li kuris prediki ĉiuloken, *“dum la Sinjoro laboris kun li, kaj fortikigis la vorton per la signoj, kiujn sekvis (Mr 16,20)”*.

Fakte, per la virto de lia nomo, Francisko, heroldo de la vero, forpuŝis demonojn, sanigis malsanulojn, kaj super ĉio, per efiko de lia parolo, fleksis al pentofaro korojn ŝtoniĝintajn en la kulpo. Li tiel donis la sanon al la korpoj kaj la savon al la animoj, same kiel oni povas konstati el la jenaj ekzemploj.

## 9. Mirakloj

En urbo Toscanella li gastis ĉe pia kavaliro, kie solnaskito estis affliktita pro denaska raktismo.

Plurfioje petate de la patro, Francisko lin permane levis kaj abrupte, antaŭ ĉies okuloj, la membroj solidiĝis kaj la fileto, saniĝita kaj fortigita, leviĝis kaj ekmarŝis, eksaltis kaj eklaŭdis la Sinjoron.

En Narni, instige de la episkopo, rehavigis perfektan movon de ĉiuj membroj povra paralizito, per krucsigno longigita de la kapo ĝis la piedoj.

En la diocezo de urbo Rieti infano estis tiel dike ŝvela, ke ĝi povis eĉ ne vidi siajn kruojn. La patrino, larmante, ĝin prezentis al la sanktulo. Tiu ĝin nur tuŝis kaj la infano tuj resaniĝis.

Apud la urbo Orte, infano estis vere reduktita al fadenbulo, kun la kapo kurba ĝis la piedoj kaj iuj ostoj rompitaĵ. Pro la instigoj kaj larmoj de la gepatroj, dum momente Francisko per kruc-

signo ĝin malrigidigis, ĝin etendigis kaj perfekte sanigis.

## 10. Pluaj mirakloj

Virino de urbo Gubbio havis la du manojn tiel rigidiĝintajn, ke ŝi ne povis per ili ĝui iun ajn uzon. Sed tuj post la krucsingo de la servisto de Dio super ŝin, ŝi obtenis tiel perfekte la sanigon, ke tuj, hejmen reveninte, ŝi volis pretigi per tiaj manoj nutraĵon por si kaj por la povruloj, same kiel jam faris la bopatrino de Simono Petro por Jesuo Kristo.

Al blinda fraŭlino en Bevagna, fajrigis la vidon tiom deziritan, trifoje unktante per sia salivo ŝiajn okulojn en la nomo de la tre sankta Triunuo.

Infano de Bolonjo ĝuis vidon per unusola okulo ĉar la alia estis grandmakule vualita. Oni ne trovis rimedon por lin sanigi.

Sed ĵus la servisto de Dio krucsignis super la kapo ĝis la piedoj de la paciento, la makulo malaperis.

Aniĝinte poste al la ordeno de la Minoraj fratuloj, li diradis, ke li tiam vidis tre pli bone per la okulo iama malsana ol per tiu ĉiam ne malsana.

En Sangemini li estis gasto de pia viro, kies edzino estis turmentita de la diablo. La servisto de Dio, postpreĝe, altrudis al tiu malbona spirito senpaŭze eliri pro la virto de la sankta oboe. La fuĝo, kiu sekvis per la graco de la dia ĉiopovo, estis tiel tuja, ke klare manifestiĝis, ke je la nomo de tiu virto ne rezistas la obstinego de la diablo.

Samspecan miraklon la sanktulo obtenis en la Città di Castello. Iu fuzioza spirito kaj malica estis invadinta virinon; Francisko nur diris: “Je la nomo de la sankta oboe, mi altrudas, ke vi eliru”. Kaj la demono, malŝatoplene malaperis, lasante libera la virinon en la animo kaj en la korpo.

## 11. Kromaj mirakloj

Fratulo estis turmente suferanta pri malsano tiel stranga, ke ŝajnis evidente, oni dirus, opresata de la diablo. Li ofte sin terĵetis kaj kunvolvis busŝaŭmante. Li modlis la korpajn membrojn aŭ tordite aŭ fikssternite aŭ misforme kurbite aŭ rigide kaj malmole. Foje, rigida kiel ligno kaj kun la kapo klinita ĝispiede, leviĝis aeren por poste suferege refalis teren.

Kortuŝite, la homo de Dio kaj plenigite per la krista kompato, sendis al tiu povrulo, tiel mizere kaj senrimede malsana, ereton de la pano kiun li estis manĝanta.

Tiu fratulo saniĝis tuj ĝin postgustuminte kaj neniam plu suferis pro tiu malfeliĉo.

En kamparo ĉirkaŭurbe de Arezzo, por virino, de kelkaj tagoj suferanta pro akuŝaj doloroj, neniu kontraŭmorta rimedo restis se ne miraklo.

Bonŝance estis pasanta tra tiuj lokoj la humila Francisko, rajdanta ĉar malsana; kaj la ĉevalrekondukanto al prunedoninto, trairis tiun vilaĝon.

Tiam vilaĝanoj tuj amasiĝis ĉirkaŭ li por preĝpeti, ke li koncedu, eĉ nur laŭ malmultaj momentoj, la bridojn tuŝitajn de la manoj de la sanktulo.

La mortiganta virino sin sentis revigliĝi kiam la bridoj estis apogitaj sur sian korpon, kaj tuj akuŝis,

Viro el Città di Pieve, religiema kaj diotima, tenis ĉe si ŝnuro per kiu jam sin zonis Francisko. Kaj en tiu vilaĝo multaj viroj kaj virinoj suferis pro diversaj malsanoj, li pasadis de hejmo al hejmo, mergadis la ŝnuron en akvo kaj donadis tiun ĉi al la malsanuloj. Multegaj saniĝis.

Ankaŭ la malsanuloj gustumintaj panon tuŝitan de la sanktulo, per dia virto tuj regajnis la sanon.

## 12. La dek atestoj

Ĉar la heroldo de la Sinjoro dum sia predikado brilegis pro tiaj mirakloj, oni atentis liajn vortojn kvazaŭ parolus anĝelo.

Kaj, fakte, la elstara prerogativo de liaj vortoj, profetia spirito, la efiko de mirakloj, la ĉiela orakoleco de lia predikado, la obeo de la senraciaj kreaĵoj, la intima konvertiĝo de la koroj je la sono de liaj vortoj, la surverŝita scienco de la Sankta Spirito, la papa predikpermeso koncedita ne sen dia interveno kaj poste la Regulo, en kiu estas indikata la maniero prediki, konfermita de la sama vikario de Kristo, kaj fine la signoj de la supera reĝo stampitaj kiaj sigeloj en lia korpo, estas la dek atestoj al la mondo per kiuj la heroldo de Kristo, Francisko, venerinda pro sia misio, vera instruanta pro sia doktrino kaj admirinda pro sia sankteco, predikis la evangelion de Kristo kiel vera mesaĝisto de Dio.

## Ĉapitro dektria

### LA SANKTAJ STIGMATOJ

#### 1. La monto Verna

La anĝeleca homo neniam laciĝis bonfari. Same kiel la anĝelo laŭ la stuparo de Jakobo, li aŭ supreniris al Dio aŭ malsupreniris al la fratoj.

La tempon konceditan por meriti, li tre saĝe dediĉis parte al la laciĝaj laboro avantaĝe de la proksimularo parte la kvietaj kontemplaj ekstazoj.

Kutime, post peninti por la savo de aliaj, forlasinte homamasojn, li revenis al la paco de soleco, kie, liberiĝinte el ĉiu zorgo, leviĝis al Dio kaj forskuis el la animo ĉiun polvan ombron kiu hazarde en ĝin falintus.

Du jarojn antaŭ la morto, post multaj kaj varispecaj laboroj, li translokiĝis, inspirite de la dia Providenco, al loko alta kaj soleca, nomata Monto Verna.

Tie, ekinte la kutiman faston de la karesmo honore de la ĉefanĝelo sankta Mikaelo, li sentis sia animo plenpleniĝi per pli abundaj dolĉecoj, la koro ekflami per ardo pli vivo por la ĉielaj bonaĵoj kaj trempiĝi per pli oftaj inspiroj.

Li leviĝis sur la spirantaj flugiloj al Dio, ne kiel scivolema finjuĝanto pri la majesto, ĉar sufokita de la gloro, *sed kiel fidela kaj prudenta servisto (Mt 24,45)*, esplorante la decidojn de la Plejalta, al kiuj li plenvole kaj plejarde kaj plejarde deziras konformiĝi.

#### 1. Revelacio pri lia martiriĝo

Al li estis revelaciite, ke ĉe la malfermo de la sankta Evangelio, li estus kompreninte tion kio al Dio estas grandege ŝatata en li kaj el li.



Levis li tiam fervoran preĝon al la Sinjoro.

Poste, je la nomo de la sankta Triunuo, pretigis pere de fratu-  
lo, viro devota kaj sankta<sup>29</sup>, la sanktan libron prenititan el la altaro.

Tri fojojn li ĝin malfermis kaj trifojajn falis sub liajn okulojn  
la pasionon de la Sinjoro.

El tio la homo plena je Dio komprenis ke, kiel mem jam imi-  
tis Kriston en vivagadoj, tiel al tiu li devas, antaŭ morti, nun esti  
konformigita en la pasionaj suferoj kaj afliktiĝoj. Kvankam tiom  
febla en la korpo pro la pentofaraĵoj kaj pro la Sinjora kruco  
daŭre portata, li ne retropaŝis, male pli multe animiĝis por iri ĝoje  
renkonten al sia dolĉa martiriĝo. Kreskiĝis en li la nedirebla amo  
al Jesuo *“en brulaĵoj de fajro kaj flamoj, tiel ke granda akvo ne  
povas ĝin estingi (Kn 8,6)”*.

### 3. La stigmatoj

Ekstaziĝinte al Dio per ardaj aspiroj kaj transformiĝinte per  
dolĉa akcepto de suferado en tiu kiu, pro ameksceso, volis esti  
por ni krucumita, iun matenon proksimume je Krucfest<sup>30</sup>, dum-  
preĝe ĉe monta flanko, li vidis el la ĉiela supro descendanta se-  
rafon dotitan je ses flamaj kaj lumaj flugiloj.

Tiu ĉi per rapidega flugo subite al li alproksimiĝis restante  
aerŝvebanta. Francisko tiam vidis fulmobrili inter la flugiloj ho-  
man figuron kiu havis manojn kaj piedojn estenditajn kaj ennaj-  
litajn al kruco.

Du flugiloj leviĝis el la korpo, du malfermiĝis al flugo kaj du  
kovris la tutan korpon. Ĉe tia vizio la sanktulo miriĝis kaj estis  
kaptita de ĝojo kune kun sufero.

Ĝojon li ricevis el la Krista vizaĝo, de kiu, aspekte Serafo,  
sin sentis graciege rigardata, sed spadon spertis en sia koro lin

---

<sup>29</sup> Frato Leono.

<sup>30</sup> 14a de septembro.

vidante krucumita.

Miriĝinte, li ne povis kompreni kiel la febleco de la pasiono povus akordiĝi kun la senmorteco de la spirito.

Li sciis poste, per dia revelacio, ke tiu vizio estis prezentita al liaj okuloj por ke, ne pere de karna martiriĝo, sed pere de kora incendio li devis transformiĝi al Kristo Krucumita.

La vizio, post malaperiĝo, lasis en la koro de Francisko mir-dignan ardon, kaj en la karno lasis gravurita la nemalpli admiran stampon de la signoj. Fakte, tuj ekaperis en la manoj kaj en la piedoj tiuj najlsignoj kiujn ĵus antaŭe la sanktulo estis vidinta en la figuro de la homo krucumita.

La manoj kaj piedoj vidiĝis en la mezo trafitaj per najloj, kun la kapoj rondaj kaj nigraj sur la dorsoj kaj en la palmoj, kaj kun longaj, retorditaj kaj kvazaŭ kontraŭbatitaj en la aliflankaj membraj zonoj.

La najloj estis je la sama karno, sed antaŭen elstarantaj.

Ankaŭ la dekstra flanko aperis trafita de lanco, kaj estis ruĝkolora kvazaŭ pro pufiĝinta vundo, kiu ofte eligis sangon bananta liajn tunikon kaj kalzonon.

#### 4. **Angora dubo**

Dume la servisto de Dio konstatis, ke la stigmatoj, tiel klaraj en la karno, ne povis resti kaŝitaj al la kunvivantaj fratuloj.

Tamen li timis lasi ke la sekreto publike koniĝas kaj ene de si mem luktis inter duboj ĉu tiun kaŝi aŭ malkaŝi.

Per nedifinitaj esprimoj fine konigis sian dubon al iuj fratuloj laŭcele kunvokitaj por ricevi konsilojn.

Unu el ili, frato Iluminato, tia nome kaj grace, komprenis, ke grandajn aferojn mem estas travidanta, kaj tiel respondis: “Sciu, frato, ke ne nure por vi, sed ankaŭ por aliaj al vi estis montrataj plurfoje la sekretojn de la Sinjoro. Temu, do, ol esti riproĉata pro

tio ke vi kaŝis donacon profitigan al multa”.

Antaŭ tiaj vortoj, kvankam alifoje estis kutimiĝinta diri kun Jesaja: “*Mia sekreto estas por mi (24,16)*”, raportis, laŭorde kaj samtempe kun granda timo, la ĉielan vizion, kaj aldonis, ke mem aŭdis aferojn kiujn dumvive neniam diros al iu ajn.

Eble temis pri misteroj tiom altaj tiuj de la Serafo, ke tiujn ne licas al homo ripeti.

## 5. Li malsupreniras el la monto

Postkaresme kaj proksime de la solenaĵo de la ĉefanĝelo Miĥaelo, iam la anĝeleca homo, transformiĝinta al Kristo, malsupreniris el la monto portante en si mem la bildon de la Krucumito, skulptita ne de la arto en ŝtonaj aŭ lignaj tabloj, sed de la dia fingro en lia karnaj membroj.

Kaj *ĉar bonas konservi kaŝita la reĝan sekreton (Tb 17,7)*, la homo sankta tenis kovritaj, kiom plej eble, tiujn sanktajn gravuraĵojn. Sed Dio, al kiu apartenas riveli por sia gloro la mirindaĵojn de li faritajn, per iuj mirakloj tiujn konigis al ĉiuj.

## 6. Mirakloj de la stigmatoj

En la provinco de Rieti horora pesta epidemio amasmortigis ŝafojn kaj bovojn ne lasante ajnan esperon pri rimedo.

Iun nokton, tamen, devota viro dumsonĝe estis avertita pri konveno viziti la fratulan ermitejon, kaj peti la akvon uzitan por lavi manojn kaj piedojn de la servisto de Dio tiam ĉeestanta en tiu loko.

Ĝus mateniĝinte, li ellitiĝis, iris al tiu konvento kaj petis tiun akvon. Ĝin ricevinte, je nescio de Francisko, per ĝi surŝprucigis la malsanan brutaron, ĝuste laŭ la ordono de la ensonĝa vizio.

Estis granda la miro de ĉiuj kiam, banite per ĝi, la bestoj, duonvive tersternitaj, tuj stariĝis kaj kuris al la paŝtejoj, kvazaŭ neniel suferuntaj pro io ajn.

## 7. Aliaj mirakloj

Antaŭ ol la homo de Dio ekloĝis sur la monto Verna, nubo venanta el tie ruinigis preskaŭ ĉiam la rikoltojn de la najbaraj lokoj.

Sed post la apero de la Serafo, kun plaĉa miro de la popolo, ne plu falis hajlo. La ĉielo, ridanta kaj serena, atestis la elstarecon de tiu ĉiela vizio kaj la virtosignifon de la stigmatoj ricevitaj de Francisko tiuloke.

Iam la servisto de Dio vojaĝis azenrajde pro malsano. Vintris kaj malfavoris la vojo.

La alveninta nokto devigis lin, por eviti la malkomfortaĵojn de la neĝo kaj mallumo ĉar ankoraŭ foris la celo, haltiĝi ĉe rando de elpenda roko.

Sed la mastro de la azeno, lin akompananta, kovrita nur per leĝeraj vestoj, ne povis ekdormi en tioma frosto. Li surgrunde turniĝis kaj returniĝis ĝeme kaj lamente.

Francisko lin aŭdis. Tiam li etendis brakon kaj lin tuŝis per sia mano kiu portis la incendion de la serafa fajro.

Tiu homo poste konfesis, ke je tiu kontakto mem sin sentis kva-zaŭ ĉe flamo, komfortata en la animo kaj korpo. Kaj, malgraŭ neĝo kaj ŝtonoj, li sukcesis dormi ĝismatene pli bone ol en sia domo.

Evidente la sanktaj stigmatoj estis gravuritaj virte de tiu kiu, per la verko de serafoj purigas, lumigas, flamigas.

Fakte, ili fuĝigis la peston kaj alportis sanon, serenecon kaj varmon al la korpoj kun admira efiko, same kiel estas ankaŭ demonstrate de mirindaĵoj plej evidentaj okazintaj post lia morto, kiel ni vidos pliposte.

## 8. Kiuj vidis la stigmatojn

Francisko ĉiudiligentece provis teni kaŝita la trezoron de la vundoj. Sed al li maleblis ne lasi al ĉies vido tiujn de la manoj kaj de la

piedoj, kvankam tiuj ĉi estis vinditaj kaj tiuj sandale kovritaj.

Ilin vidis, dum li vivis, multegaj fratuloj, kiuj, kvankam fiddignaj pro aparta sankteco, por forigi ĉiun dubon perĵure sur la sankta evangelio konformis la veron pri vundoj kaj la certecon pri sia vido-konstato.

Pro la konfidenco praktikita kun la sanktulo, vidis la vundojn ankaŭ iuj kardinaloj, kiuj donis ateston al la vero pervorte kaj perskribe enŝovante, pri tio, laŭdojn proze, himne kaj antifone verkitajn liahonore.

Ankaŭ Papo Aleksandro<sup>31</sup>, je ĉeesto de multaj fratuloj kaj de mi, diris en prediko al la popolo, ke mem kontempris per siaj propraj okuloj tiujn stigmatojn sur la vivanta sanktulo.

Havis samfeliĉan sorton ilin longe admiri sur la mortolito pli ol kvindek fratuloj, la virgulino Klara kun ĉiuj siaj fratulinoj, kaj homoj sennombraj.

Multegaj, kiel ni diros pliposte, ilin ankaŭ kisis altiritaj el devoteco kaj ilin tuŝis konfirme de la vero. Sed ĝis kiam li vivis neniu povis vidi la vundon de la flanko se ne ŝtelece.

Ĝin sukcesis vidi fratulo, kiu kutimis lin flegi kun granda diligenteco, post esti lin per pia sagaceco deviginta demeti la veston por el ĝi skui polvon kaj purigi.

Vidis li tiam tiun vundon, kaj tuj superpasigis sur ĝi tri fingrojn, tiel ke li kapablis konstata informiĝi pri la dimensio kaj la formo ne sur per la vido, sed ankaŭ per la tuŝo.

Per simila preteksto ĝin vidis ankaŭ la vikario<sup>32</sup>.

Sed lia kutima frato kunulo<sup>33</sup>, simpla kiel kolombo, dum al li faris sur la ŝultroj frotomasaĝojn, hazarde eniriginte trakapuĉe la manon, per tiu tuŝis tiun vundon okazigante al li grandan sufer-

---

<sup>31</sup> Aleksandro la kvara, 12334-1261.

<sup>32</sup> Frato Elio.

<sup>33</sup> Frato Ruffino.

on. Estis tia la motivo pro kiu la sanktulo preferis ek de tiam vesti kalzonojn altajn ĝisaksele.

Samrezulte tamen rimarkis la vundostaton la fratuloj, sendube tiuj ŝargitaj lavi la kalzonon kaj tunikon, ĉar tiuj ĉi aperis ĉiam makulitaj je sango.

## 9. **Flagoportisto de Kristo**

Kaj nun, ho nelacebla kavaliro de Kristo, surmetu la armilojn de la nevenkebla gvidanto.

Per ili fulge ekipita, vi venkos la malamikaron.

Tenu alta la standardon de la supera Reĝo.

Kaj montru plue la sigelon de la supera Pontifiko Kristo por vortoj, kaj verkoj viaj estu akceptitaj, kiel ili vere estas, nome neriproĉeblaj kaj veraj.

Rilate la sanktajn stigmatojn de Jesuo, kiujn vi portas gravurita en via korpo, neniu vin malkvietu; male, ĉiu servisto de Dio vin veneru kaj amu!

Per tiuj signoj tiel evidentaj, konfermitaj ne de du aŭ tri, sed de sennombraj atestantoj, la diaj orakoloj, en vi kaj per vi igitaj je fido indegaj, deprenas ĉiuspecan ekskuzombbron al la nekreduloj, konfirmas la kredantojn en la kredo, tiujn ĉi levas sur la flugiloj de la espero kaj flamigas je amo.

## 10. **Konfirmo de la faktoj**

Jam realiĝis tiu unua vizio al vi prezentita kiam, destinita fariĝi gvidanto de la milico de Kristo, vi vidis pretitaj por vi la armilojn krucsignitajn<sup>34</sup>.

Ne licas dubo pri tiu vizio de la Krucumito, kiu trapikis vian animon per la spado de kompatema doloro, en la tempoj de via

---

<sup>34</sup> Ĉapitro 1, 3.  
Legendo majora

konvertiĝo<sup>35</sup>.

Kaj estas veraj tiuj vortoj alvenigitaj al vi el la kruco kiel el la elstara trono de Kristo kaj el la repaciga sekreto, laŭ tio kion vi asertis per viaj sanktaj vortoj<sup>36</sup>.

Oni kredas nun per viva fido kaj estas konfermite, ke ne per mensa iluzio, sed per dia revelacio, estis vidita de frato Silvestro la kruco eliranta el via buŝo<sup>37</sup>, de frato Pacifiko la du spadoj kru-cigitaj traillantaj vian korpon<sup>38</sup> kaj de la anĝeleca Monaldo via sama persono kun la brakoj kruce kaj aerlevite etenditaj, dum Antonio predikis pri la titolo de la kruco<sup>39</sup>.

Kaj nun, proksime de finiĝo de via vivo, la admira apero de la Krucumito, kiu subforme de serafo jam ekscitis en via koro la flamon kaj gravuris en via korpo la stigmatojn, dum al vi montras esti vere tiu *“anĝelo kiu supreniras de la sunleviĝejo havante la sigelojn de la Dio vivanta (Ap 7,2)”*, sigelas ankaŭ la menciitajn mirindaĵojn, kaj ricevas per ili konfirmon.

Kaj jen vi, kiu per la miraj aperoj de la kruco de Kristo, okazitaj laŭtemporde en vi kaj ĉirkaŭ vi, jam atingis kvazaŭ tra la ses ŝtupoj tiun ĉi sepan kaj lastan aperon en kiu vi fine ripozas.

Tiu Krista kruco, prezentita de Dio kaj akceptita de vi ĉe la komenco de via konvertiĝo, kaj poste portita en viaj korpo kaj spirito tra sanktega vivo kaj montrita al aliaj kiel ekzemplo, ege pruve pravas, ke vi atingis la pinton de evangelia perfekteco.

Neniu enzorga devotulo, tial, forĵetu tiun ateston de la kristana saĝo skribita en la polvo de via karno, neniu vere fidelulo ĝin kon-testu, neniu vere humilulo ĝin taksu senvalora estante ĝi manifesti-ta de Dio mem kaj, do, inda de ĉiu fido.

---

<sup>35</sup> Ĉapitro I, 5.

<sup>36</sup> Ĉapitro II, 1.

<sup>37</sup> Ĉapitro III, 5.

<sup>38</sup> Ĉapitro IV, 9.

<sup>39</sup> Ĉapitro IV, 10.

Legendo majora

## Ĉapitro dekvara

### LIA PACIENCO KAJ LIA MORTO

#### 1. Ni komencu...

Krucumite kun Kristo en la korpo kaj en la spirito, Francisko flamiĝis je serafa amo al Dio, kaj sojfe ardis al Kristo por la animoj.

Ne povante tamen marŝi pro la elkreskaĵo de la najloj, li konsentis, ke sia korpo, jam elĉerpita, estu portata tra urboj kaj vilaĝoj por animi la fidelularon en ilia portado de la kruco de Kristo.

Dume li tiel parolis al siaj fratuloj: “Ni komencu servi al la Sinjoro, filoj miaj, ĉar malmulton ni faris ĝis nun”.

Li arde deziris reveni al humilaj iamaj taskoj, servi la leprulojn kaj submeti la jam elĉerpitan korpon al la antaŭaj rigoroj.

Li proponis plenumi grandegajn entreprenojn sub la gvido de Kristo kaj, kvankam jam senenergia sed forta kaj fervora en la spirito, aspiris al novaj triumfoj kontraŭ la malamiko per kromaj bataloj.

Lia karno poste estis en tiel dolĉa harmonio kun la spirito, tiel preta en la servado, ke ne plu oponis reziston al la sublima praktikado de la sanktaj virtoj al kiu li anhelis.

La progreso en ili estis kontinua,

#### 2. Fratinaj suferoj

Por ke kreskus en li kumulado de meritoj, kiuj ĉiuj havas la lastan perfektigon en la pacienco, li komencis suferi malsanojn tiel multajn kaj gravajn, ke preskaŭ li havis sana kaj nesuferiga neniun membron iun ajn.

Pro la malsamoj lia korpo reduktiĝis havi nur la haŭton adhe-



ran al ostoj.

Sed kvankam tiel subpremita, Francisko difinis siajn suferojn ne penoj, sed fratinoj.

Kaj okaze de pli forta ol kutime sufero, simpluma fratulo al li diris: “Preĝu al la Sinjoro por ke li sin montru pli milda, li tro akriĝas sian manon sur vin”, la homo sankta, kun forta plendo, respondis: “Se mi ne konus vian simplecon kaj puran intencon, mi abomenus ek de nun vian akompanadon ĉar vi aŭdacis taksi kritikeblaj la juĝojn de Dio rilate min”. Kaj malgraŭ elĉerpiĝinta je fortoj pro longdaŭra kaj ĝeniga malsano, li sin ĵetis surteren batante la feblajn ostojn. Poste aldonis apenaŭ vigle kaj kisante la teron: “Dankon al vi mi donas, ho Dio, pro tiuj miaj suferoj, kaj mi preĝas, ke vi plue aldonu je tiuj centoble, se tiel al vi plaĉas. Al mi estos agrablege *ke meze de doloroj vi min ne indulgu (Ijob 6,10)*, ĉar la plenumiĝo de via sankta volo estas por mi la plejalta konsolo”.

Al la fratuloj ŝajnis tiam vidi alian Ijobon kiu, dum kadukiĝis en la karmo, fervoriĝis en la spirito.

Li sciis multantaŭe la tagon de sia morto, kaj kiam ĝin vidis alproksimiĝanta, diris al siaj fratuloj, ke mem devas baldaŭ forlasis sian tendon (2 Pt 1,14), kiel la Sinjoro al li jam komunikis.

### 3. Ĉe Porciùnkola

Estis pasintaj du dek jaroj ek de lia konvertiĝo kaj ek de la sigeliĝo de la stigmatoj.

Lasttempe daŭre ĉizelita de la malmolaj trafoj de suferigaj malsanoj, kiel ŝtono metinda en la konstruaĵo de la ĉiela Jerusalemo kaj kiel duktila metalo reduktita al perfektigo per la martelo de multifacetaj missortoj, li petis esti transportita en Sanktan Marian de la Porciùnkola, volante eligi la vivspiriton tie, kie li estis ricevinta la gracspiriton.

Tien alveninte, por elmontri ke mem, analoge al Kristo, nenion havis komunan kun la mondo, malgraŭ tiu lasta malsano tiom malkapabliganta, kiu metis finon al lia suferado, li surgenuiĝis tute nuda. En tiu ekstrema momento dum kiu la malamiko povis ree koleriĝi, nuda li volis lukti kontraŭ la mondo.

Sidiĝinte sur la polvo, eĉ sen la sankta vesto, li levis kiel kutime la vizaĝon al la ĉielo. Sed, kvankam tute ensorbite al tiu gloro, li ne forgesis kovri kun la maldekstra mano la vundon de la dekstra flanko por ke ĝi ne estu vidata.

Poste li diris al siaj fratuloj: “*Mi plenumis kion mi devis (1 Reĝ 19, 20)*. Instruu vin Kristo plenumi tion kio koncernas vin”.

#### 4. Nuda

La kunularo de la sanktulo ploris kortuŝite de senmezura doloro. Unu el ili, kiun li nomis sian gardanto, intuiciante per dia inspiro, lian ardan deziron, kuris preni la ŝnuron, la kalzonon kaj la tunikon, kaj ilin transdonis al la krista malriĉulo aldonate jenajn vortojn: “Al vi mi tiujn pruntedonas, kiel al povrulo, kaj ilin akceptu je nomo de la sankta oboe”.

Kontentis Francisko kaj gajis en la koro je perfekta ĝojo pro tio ke mem sukcesis sin teni fidela ĝismorte al Madono Malriĉo. Kaj levante la manojn al la ĉielo, glorigis la Sinjoron ĉar, senvestiĝinte je ĉio, libere li povas flugi al li.

Li tiel kondutis pro amo al la malriĉeco, por ke nenium li havus sian, eĉ ne la veston kiu li kovris.

Li volis en ĉio simili al Kristo krucumita kiu senia, bedaŭranta kaj nuda pendis el la kruco. Pro tio li iam sin senvestigis kaj nudstaris antaŭ la episkopo, komence de sia konvertiĝo, kaj ĉe la mortmomento nuda li voli eliri de la mondo, kaj al la fratuloj lin asistantaj ordonis, pro amo kaj pro oboe, ke ankaŭ postmorte lin lasu nuda surtere laŭ la tempo necesas por trankvile trakuri mejlon.

Ho homo perfekte kristana, kiu konformiĝinte al Kristo en la vivo, en la morto kaj postmorte, meritis esti similigita al li ankaŭ en la eksteraj aspektoj!

## 5. Fratino morto

Alproksimiĝante fine al la horo de sia forpaso, li vokigis ĉiujn ĉeestantajn fratulojn ĉirkaŭ si, kaj post konsola parolado ilin patre instigis al la amo al Dio. Li longe parolis pri pacienco, malriĉeco kaj fideleco al la sankta roma eklezio, admonante ke oni antaŭmetu evangelion al ĉiuj reguloj.

Poste, kun la brakoj krucigitaj (li tiom amis tiun signon), etendis super ili la manojn kaj en la virto kaj nome de la Krucumito benis ĉiujn, ĉeestatajn kaj malĉeestatajn. Kaj aldonis: “Estu fortaj, ho miaj filoj, en la timo antaŭ Dio kaj persistu en ĝi: la tento kaj turmentiĝo alproksimiĝas. Beataj kiuj ne retroiras. Mi flugas al Dio, al lia graco mi rekomendas ĉiujn”.

Fininte doni tiajn afablajn konsilojn, la homo sankta portigis evangeliaron, kaj petis, ke oni al li legu tiun eron de Sankta Johano komencantan per la vorto: “*ante diem festum paschae*” (en la antaŭpaska tago).

Poste li eksplodis, kiel eble por li, en la psalmajn vortojn: “*Per mia voĉo mi krias al la Sinjoro, per mia voĉo mi lin alvokas*”. Kaj daŭris ĝisfine: “*La justuloj min atendas por la momento en kiu vi donos al mi la rekompencon (Ps 131,1-8)*”.

## 6. Kiel stelo

Post, fine, plenumiĝo en li de ĉiuj diaj planoj, sin liberigis la sanktega animo kaj estis enirigita en la ĉielan gloron dum la korpo kuŝis kiel en agrablega dormo.

Iu el la fratuloj kaj disĉiploj liaj vidis tiun animon soriranta kiel brilega stelo sur blanka nubo tujtuje ĉielen. Blanka je blanke-

geco de elstarega sankteco kaj plenplena je saĝo kaj graco, ĝi merit-  
tis eniri la lumon kaj pacon de Dio, kie kun Kristo eterne ripozas.

Ankaŭ la ministro de la fratularo de la Labora Tero, nome Aŭ-  
gusteno, homo je granda sankteco, tiam vivfiniĝanta kaj sena je  
parolkapablo, estis abrupte aŭdita laŭtvoĉe ekdiri: “Atendu, Patro,  
atendu, jen mi venas kun vi”.

Kaj al la fratuloj demandantaj al kiu li adresiĝis kun tia fervo-  
ro: “Ĉu vi ne vidas - li respondis – nian patron Franciskon enir-  
anta al paradizo?”.

Kaj tuj lia animo, deiĝinte el la korpo, kuniĝis al la sanktega Patro.

Ĝi aperis, tiun saman nokton, al la episkopo de Asizo, tiam  
pilgrimanta al monto Gargano.

Ĝi al li diris: “Jen mi forlasas la mondon kaj iras ĉielen”.

La postmatenon, ĵus ellitiĝinte, la episkopo rakontis ĉion al sia  
akompanantaro kaj, reveninte al Asizo, certiĝis, ke precize en la  
horo de la vizio Francisko estis forlasinta la teron.

Alaŭdoj, kiuj flugas al la suno kaj eskapas el mallumo, okaze  
de morto de la homo de Dio, kvankam jam noktis, grandnombre  
venis al la ĉela lito kaj longtempe turniĝante kun nekutima ĝojo  
faris vivan kaj gajan ateston pri la gloro de la sanktulo de kiu  
multfoje ili estis invitataj laŭdi al la Sinjoro.

## Ĉapitro dekkvina

### KANONIZADO KAJ TRANSLOKIĜO DE LA KORPO DE FRANCISKO

#### 1. La gloro

Francisko, servisto kaj amiko de la plejalta, fondinto kaj gvidanto de la Ordeno de la Minoraj Fratoj, amanto de la malriĉeco, ekzemplo de pentofaro, predikanto de la vero, spegulo de sankteco kaj modelo de evangelia perfekteco, antaŭgvidita de la dia graco laŭ orda progreso, de minimumaj komenciĝoj alvenis al la gloraj kulminoj.

Dio, kiu estis farinta tiel klara dumvive tiun homon, por ke riĉa je malriĉeco, sublimes je memmalŝato, konstanta en la humiliĝo, prudenta en la simpleco kaj elstara en ĉiu cetera virto, lin mortokaze igis brilanta je lumo eĉ pli klara.

Pasante fakte el tiu tero al la eterna loĝejo, por mergiĝi en la plenĝuado de la vivfonto, tiu serafa spirito lasis sur la sanktega karno, krucumita kune kun la malvirtoj kaj transhumanigita, la bildon de la pasiono de Kristo kaj certan anticipan resurekton.

#### 2. Glora korpo

Vidiĝis en tiuj bonŝancaj membroj la najloj, mirakle estiĝintaj verke de Dio pere de la karno mem kaj tiel al ĝi naturaj, ke, premitaj de unu flanko, kiel kontinuaj kaj malmolaj nervoj, ili elstarigis en la alia.

Aperis plue tiam manifesta, eĉ ĝi verko de Dio kaj de la homo, la flanka vundo, simila al tiu de la Savanto, el kie fontis la sakramento de la elaĉeto kaj regenerado de la homaro.

La najloj estis nigraj kiel fero, sed la flanko vundo estis ruĝa

kaj pro la karno-kuntiriĝo tiel ronda, ke ŝajnis rozo tre bela.

La korpa cetero kiu antaŭe, pro malsano kaj pro naturo inklinis al nigro, estis blankega kiel neĝo, certa aŭguro de la estonta gloriĝo en la ĉielo.

### 3. Ploroj kaj ridetoj

La membroj sin prezentis flekseblaj kaj morbidaj kiel tiuj de infano, tra klaraj signoj de pureco, la najloj estis nigraj en blankega karno kaj la flanka vundo ruĝa, kiel printempa rozo; kial surpriziĝi se belo tiel rara kaj tiel bunta vekis en ĉiuj ĝojon kaj miron?

Larmis la filoj pro la perdo de tiel amebla patro, sed samtempe elverŝis ĝojon kisante en li la signojn de la supera Reĝo.

La noveco de la miraklaro turnis la ploron en rideton kaj eskaĝis mirkriojn el tiuj kiuj admiris kaj delikate mantuŝis.

Neniam estis vidite, neniam estis aŭdite tiaspeca evento. Ĝi firmigis la kredon kaj ekscitis la amsentojn. En la malproksimumoj, la mirindaĵo estigis deziron iri vidi.

### 4. Popola alfluo

Fakte la novaĵo de la morto de la sanktulo kaj la famo de la miraklaĵoj altiris homamasojn al tiu loko.

Volis ĉiuj vidis per la okuloj tiun novan mirindaĵon, por tiamaniere forigi el menso ĉiun dubon kaj aldoni ĝojon al la viva impresoj.

Asizo estis tuta tie, kontemplanta kaj kisanta la sanktajn signojn en la korpo de Francisko.

Kavaliro klera, saĝa kaj multe estimata, laŭnome Hieronimo, kiu antaŭe dubis, nekredante kiel Tomaso, kun multe da fervoro kaj kuraĝo antaŭ ĉiuj, fratuloj kaj laikoj, movigis la najlojn kaj la manojn, tuŝis la piedojn kaj kostaton de la sanktulo, por neniiĝi en si kaj aliaj ĉiun dubombon. Li estis, poste, unu el la atestantoj

kiuj depoziciis favore al la stigmatoj en la sanktulo, per ĵuro sur la evangelio.

## 5. Triumfo en Asizo

Tiu ne estis tranokto por funebri, sed tranokto por festi kun anĝeloj. La fratuloj, nome la filoj alkurintaj pro la morto de la patro, kaj amaso alveninta el ĉiuj lokoj, kantis laŭdojn al la Sinjoro himnante al la sanktulo.

La mateno estis vera triumfo,

Kun ramoj kaj torĉoj, per himnoj kaj kantoj, la sankta korpo de Francisko estis akompanata al Asizo.

Enirinte la preĝejon Sanktan Damianon, kie la nobla Klara, nun glora en la ĉielo, vivis enfermita kun la konsekritinoj, oni iomete haltis por liveri okazon al liaj filinoj vidi kaj kisi la sanktan korpon de la patro sigelitan je ĉielaj lekantoj.

Atinginte fine la urbon, kvazaŭ festante, oni demetis, kun granda riverenco, la preciozan korpon en la preĝejo de sankta Georgo.

En tiu loko, infanaĝe li eklernis legi, tie li komencis sian predikadon, tie li fine trovis sian unuan ripozon.

## 6. Mirakloj

La venerinda Patro trapasis el la ŝippereo de tiu ĉi mondo la kvaran de oktobro 1226, vespere de sabata tago, kaj estis entombigita la postan tagon, dimanĉon.

Ĝuante je la beatiga vizio, li tuj komencis lumi pro multaj kaj mirindaj mirakloj. Dio decidis tion por ke la tre alta humilo de Francisko, kiu dumvive sin manifestis al la mondo per admirindaj ekzemploj cele de morkorektoj, nun estu konfirmita de la ĉielo cele de plifortigo de la kredo per mirindaĵoj de la dia potenco.

La mirakloj kaj grandaj favoraĵoj elpetitaj en diversaj mondaj lokoj naskis amon al Kristo kaj veneron al la sanktulo. Kaj la fa-

mo pri difavoroj kaj la voĉo de akklamantaj popoloj baldaŭ atingis la orelojn de papo Gregorio la Naŭa.

### **7. Kanonizado**

La plejalta paŝtisto de la eklezio, rekoninte la sanktecon de Francisko ne nur pro la mirakloj aŭditaj post lia morto, sed ankaŭ pro tio kion li jam vidis proprokule kaj jam tuŝis propramane kaj tial ne minimume dubante, ke li estis jam glorata en la ĉielo, por agi laŭkonforme al Kristo, oportune decidis lin igi glorata ankaŭ sur la tero, lin konsiderante inda je ĉiuspeca venerado.

Por igi, tamen, certe konata la gloradon de la homo sanktega al la tuta mondo, la papo ekzamenigis de la kardinaloj, kiuj ŝajnis malpli favoraj, la miraklojn konitajn, dokumentitajn kaj aprobitajn intervene de dignaj homoj.

Post diligenta pridiskuto kaj aprobo de ĉiuj menciitaj mirakloj, laŭ konsilo kaj unuanima konsento de kardinaloj kaj prelatoj ĉeestaj tiam en la kurio, la papo dekretis la kanonizadon de Francisko.

Li iris, sekve, persone al Asizo kaj la dimanĉon 16 de Julio 1228, kun la plej solena liturgiaĵo kiun estus trodistrige rakonti, alskribis la beatan Patron al la katalogo de la sanktuloj.

### **8. Transporto de la korpo**

La 25an de majo 1230, okaze de la ĝenerala Kapitulo celebrita en Asizo, la sankta korpo estis transportita al la baziliko konstruita liahonore.

Dum la transporto de tiu precioza trezoro, sigelita per la buleo de la Altega Reĝo, Kristo faris multenombrajn miraklojn por altiri ĉiujn al sia amo per la saviga parfumo de la sanktulo.

Justis, fakte, ke la ostaro de tiu en kiu Dio estis trovinta siajn komplezojn kaj sian amon, kaj kiu poste estos translokinta al paradizo per la graco de la kontemplado kiel Enoĥo, kaj estis rab-



inta al la ĉielo sur fajra ĉaro pro la karitata ardo kiel Elija, kaj nun estis transplantinta kaj burĝoniginta inter tiuj floroj de eterna printempo, justis, mi rediras, ke tiuj ostoj odoru nun el la tomo per admiraj burĝonoj.

## 9. Konkludo

Nu, kiel tiu beata homo dumvive splendis je eminentaj virtoj, tiel post lia transloko ĝis nunaj tagoj, pro la ĉiupovo de Dio, daŭre splendas pro renomataj mirakloj sur la tuta tero.

Estas, fakte, blinduloj kaj sorduloj, mutuloj kaj lamuloj, idropsuloj kaj paralizuloj, ŝippereŭoj kaj sklavoj, kiuj estas liberigitaj el siaj aĉgenaĵoj; estas morboj, estas nepraĵoj kaj ĉiuspecaj danĝeroj kontraŭ kiuj Francisko el la beata regno donas sian helpon.

Sed ankaŭ pro la sennombraj mortintoj mire revenigitaj al la vivo per lia propeto, fariĝas klara al la fidelularo la grandiozo de Dio favore al Francisko kaj la virto de la Plejalta, al kiu estas devigataj ĉiu honoro kaj ĉiu gloro laŭ ĉiuj jarcentoj de la jarcentoj.

IUJ MIRAKLOJ OKAZIGITAJ DE  
FRANCISKO POSTMORTE

# I

## LA MIRAKLARO DE LA STIGMATOJ

Por honori la ĉiupovan Dion kaj pliglorigi la beatan Franciskon, celante priskribi iujn miraklojn kiuj tiu ĉi propetis post lia feliĉa morto kaj kiuj estis poste por veraj rekonitaj, mi opiniis, ke oportunas komenci el tiuj kiuj pliklare pripensigas la potencon de la kruco de Kristo kaj ripetas ĝian gloron.

1. La homo nova Francisko brilis pro nova miraklo. Pro aparta privilegio nekoncedita en la antaŭaj jarcentoj, li aperis signita per la sanktaj stigmatoj, per kiuj li akiris karnan similecon al Kristo krucumita.

Kiu lingvo povus digne paroli pri tiel granda dono en Francisko?

Vere ĉiuj pensoj de la homo de Dio estis ĉiam direktitaj al la kruco; kaj kiel li estis impresinta tiun signon en sia koro ekde sia konvertiĝo, tiel li aspiris per tiu signo ormani ankaŭ sian korpon, fiksiĝante en ĝi. Li tial prenis pentofaran veston kiu portu pri ĝi la ekzaktajn formojn.

Lia animo sin revestis je Kristo krucumita. Volis Francisko, ke ankaŭ la korpo surmetu la krucarmilaron, kaj ke sia armeo luktu en tiu signo per kiu Dio estis supervenkinta la inferon.

La kruco mem mistere splendis plurfoje ĉirkaŭ li ek de kiam li komencis ĝin enmensigi: estis la sep aperoj, kiel oni scias, kiuj lin transformis, tra ekstaza amo, en bildon de la Krucumito en la pensoj, en la amsentoj, en la vivo.

La indulgega dia Reĝo, kiu respondas al la amon de siaj servistoj trans ĉiu atendo, lin juĝis inda ricevi gravurita en lia korpo

sian krucon. Konvenis, fakte, ke kiu estis plenplena je amo al ĝi, je ĝia gloro estu signita.

2. Je nebremsebla pruvo pri la vero rilate la stigmatojn svarmas atestoj ne nur de tiuj kiuj ilin vidis kaj tuŝis, sed ankaŭ de admiraj aperoj kaj sennombraj mirakloj kiuj, pro ilia pliiga altiro, okazis post la morto de la sanktulo.

La suverena pontifiko, Gregorio la Naŭa, al kiu dumviva Francisko antaŭanoncis, ke li estos elektita papo, antaŭ ol sanktdeklari la krucheroldon, estis alsturmita de dubo koncerne la flankan vundon.

Iun nokton, kiel li mem rakontis larmante, al li aperis la beata Francisko severmiene lin riproĉanta pro tiu dubo kaj levinta la dekstran brakon por montri, ĝuste al li, la flankan vundon. Post tiu viziito li petis pokalon kiu rikoltu la sangon kiu el ĝi estus fontanta.

La plejalta pontifiko vidis, ke la pokalo plenpleniĝis ĝisrande. De tiam, kaj poste, lia devoteco al la stigmatoj kreskis kaj por ili tiomzorge flamiĝis, ke ne plu permesis, ke iu ajn ilin kontestu.

3. La samo okazis al Minora fratulo, predikisto, homo vere virta kaj grandfama.

Tiu estis sincere konvinkita pri la realo de la stigmatiĝo de la sanktulo, sed volante serĉi pri ĝi eksplikon per la febla lumo de la homa menso, li falis en la laĉojn de la dubo kiu tenajle tenis lian animon kaj lin suferigi laŭ diversaj tagoj.

Iun nokton, tamen, Francisko al li ensongĉe aperis kun la piedoj enkotigitaj kaj kun la mieno milde kolera, dirante: “Kiaj luktoj kirlas en vi? Kiajn dubojn vi kovas en vi? Observu miajn manojn, atente rigardu miajn piedojn”.

La manoj, tiujn li vidis, trapikitaj; sed la piedojn li ne sukcesis

vidi ĉar kovritaj je koto.

Tiam la sanktulo ekkriis: “Forigu tiun koton kaj bone observu la vundojn!”.

La fratulo obeis. Al li ŝajnis vere tuŝi tiujn piedojn kaj permanente detergi tiujn truojn.

Ĵus vekiĝinte, li lasis elrompiĝi larmoj kaj detergis siajn pensojn enkotiĝintajn. Li volis pune rapagi sian homan juĝomanieron per publika konfeso.

4. Roma matrono, nobela pro naskiĝo kaj nobla pro virto, tenis muralmetita en sia preĝkapeleto portreton en kiu estis pentrita Francisko, kiun ŝi elektis kiel sian ĉielan pledanton.

Iun tagon, dumpreĝe, ŝiaj okuloj haltis sur la sanktulaj manoj kaj piedoj kaj kun granda miro kaj malplaĉo ekvidis, ke la vundoj ne estis pentritaj. La pentristo, memorflebla, ilin estis forgesinta pentri. La matrono tamen restis plurtage pridemandanta pri la afero: ŝi ne kapablis malkovri la kaŭzon de tiu neperfektaĵo.

La sanktulo mem zorgis ŝin levi el tiu ĝeno per miraklo. Iun tagon, dum denova cerba turmentiĝo, subite aperis en tiu bildo la stigmatoj ĝuste kiel ili vidiĝas en ĉiuj bildoj pri sankta Francisko.

Konsternita kaj tremanta, ŝi tuj venigis la filinon, jam devotan al la sanktulo, kaj ŝin demandis ĉu tiu bildo estis havinta jam antaŭe tiujn signojn.

“Ne, patrino - respondis - tion mi ĵuras. Mi bone memoras. Kaj nun kia la ekspliko?”.

Tiam, ĉar la homa menso multfoje falas en dubon pri la vero, alia penso kirligis en la kapo de la sinjorino: “Ĉu ne okazis, ke ili ĉeestis jam antaŭe kaj ke ni ne ekkonsciis pri tio?”. Tiu penso ŝin ene molestadis.

Ankaŭ tiufoje la Sinjoro intervenis per nova miraklo, je konfirmo de la unua: fakte, la vundoj malaperis.

5. En Katalunio, najbare de Lerida, okazis bruega miraklo.

Iun vesperon, iu Johano marŝadis laŭstrate, en kies najbaraĵoj oni ekfaris insidojn ne kontraŭ lin, kiu ne havis malamikojn, sed kontraŭ alian homon al li similtan kaj kun li kunvojaĝantan. Kiam ili estis je porpika distanco, jen la malamikoj abrupte ekaperis, sin ĵetas sur la malbonŝancan Johanon erarprenitan por la alia kaj lin permane batas per tioma perforto, ke lin lasas preskaŭ mortanta. Ĉe la unua glavtranĉo al li preskaŭ integre disiĝis ŝultro kun brako, ĉe la dua apertiĝis truo sub mamzono tiom larĝa, ke la spiro eliranta povis malfajrigi plurajn kandelojn kunegitajn.

La povrulo estis deklarita nesavebla de kuracistoj ĉar kuraco ne aplikeblas kaj ĉiu rimedo vanas. Neniu povis lin alproksimigi pro la neeltenebla fetoro emananta el putrintaj vundoj. Eĉ lia edzino malapude kunvivis.

Solece, forlasite de ĉiuj, tiam li sin adresis fido-plene al S. Francisko jam alvokita, sammaniere al la Virgulino, dum la feroca agreso. La elĉiela helpo ne sin lasis atendi. Dum li en sia liteto preĝis kaj pro intensaj doloroj kriis, li trafenestre vidis homon vestitan minoran fralulon, kiu ekparolis: “Johano, pro tio ke vi havis fidon je mi, la Sinjoro vin savos”.

“Kiu vi estas?”, demandis la malsanulo.

“Mi estas Francisko kiu vin propetis”.

Tiu ĉi alproksimiĝis al li, malligis bandaĝon kaj unkvente ŝmiris la vundojn. Ĉe la agrabla kontakto kun tiuj manoj, garnitaj je la stigmatoj kaj riĉaj je virtoj de Kristo, la gangreno malaperis, ekrefloris la karno kaj la vundoj cikatriĝis. Poste la sanktulo malaperis.

Johano ĵetis krion, kiu ĉi-foje venis el ĝojo kaj el dankemo al S. Francisko; laŭtvoĉe alvokis la edzinon, kiu jam lin priploris entombiginda. Lin vidinte, male, sendifekta kaj sekura, piedstaran-

ta kaj viglega, pro surprizo ŝi estis puŝita krei tiel laŭte, ke estis aŭdita de la tuta najbaro. Alkuris parencoj kiuj konstatis la eventon. Opiniante, tamen, ke li estus deliranta, ĉiuzorge engaĝiĝis por lin reenletigi.

Sed la miraklito ĉiuenergie rezistis kaj sin plumontrante diradis: “Mi ne estas fantomo, mi ne estas en deliro, mi ne plu malsanas, kredis min, mi estas restabiligita”. Venis sankta Francisko kaj per tuŝo de siaj manoj li min starigis. De ĉi-tie li malaperis nedelonge”.

La famo de la miraklo disvastiĝis kaj homoj alkuris sennombraj por vidi. Ĉiuj, mirplene antaŭ eksterordinaraĵo tiel granda, laŭtvoĉe donis gloron al la heroldo de Kristo.

La beata Francisko, mortinta en la korpo, sed vivanta en la Sinjoro, estis redoninta la sanon al tiu homo morte vundita! Tio kaŭzas neniu miron se konsideri, ke li portis en si mem la stigmatojn de tiu kiu, mizerikorde mortinte kaj glorie resurektinte, restabiligis per siaj vundoj la homan genron vunditan kaj preskaŭ mortintan.

6. En Potenza, urbo de Apulio<sup>40</sup>, travivis iu kleriko pernome Ruĝero, respektinda homo kaj kanoniko de la majora preĝejo.

Afliktite pro malaro iam eniri preĝcele preĝejon en kiu oni venis portreton de sankta Francisko evidente stigmatizita. Estis ĉe tiu vido, ke li ekestis atakita de dubo: “Kiel eblas miraklo tiel granda, pri kies egala neniam, ekde la mondo estas mondo, estis aŭdita?”.

Vundite en la animo de tiuj senfundamentaj pensoj, li sin sentis grave vundita en la centro de maldekstra mano kvazaŭ per arda sago, kies li aŭdis ankaŭ la sagilklakon. La ganto tamen restis sendifekta. Li efektive konstatis vundon neniam havitan, kiel gravu-

---

<sup>40</sup> Nun urbo de Bazilikato.  
Legendo majora

ritan de la sago, el kiu ellasiĝis neeltenebla varmo. Tiu vundo, kaŝita sub la ganto, klare pensigas la dubon kaŝitan en la animo!

Li angorsuferis kaj ĝemis laŭlonge de du tagoj pro doloro. Dume li malkaŝis al ĉiuj la vundon de sia koro kaj deklaris kaj ĵuris, ke mem firme kredas je la stigmatoj de la sanktulo. Larmante, li grandpiece preĝis por esti baldaŭ liberigita, ĝuste dank'al tiuj vundoj, el tiu neeltenebla peno. Kaj jen ho miro! Saniĝo de la animo tuj postvenigis ankaŭ tiun de la korpo! Li sentis neniun pluan doloron, eĉ neniun brulumon.

La dia indulgemo volis kuraci tiun dubon kaŝitan en la animo per la evidenta fajra brulomo kaj, post la saniĝo de la spirito, ankaŭ la karno fariĝis sana.

Tiu homo fariĝis pli humila, pli devota al Dio kaj nedisigeble kunigita al la sanktulo kaj al liaj fratuloj.

Tiu famega miraklo estis atestita kun ĵuro kaj ni ricevis informon de sigelita letero de la episkopo.

Ne iu ajn dubo rajtas, tial, plu naskiĝi, neniun okulo rajtas rigardi kun suspekto la miraklon de la stigmatoj kvazaŭ ili ne respektus la dian rangecon.

Fakte se multaj membroj adherus al Kristo ĉefo per tiu sama serafa ardo celante indiĝi je tiu milita armilaro kaj esti, tial, levita al samgrada ĉiela gloro, neniun saĝa homo dirus, ke tio (la stigmatoj) ne redundancas je honore de Kristo.



## II

### MORTINTOJ RESURETIGITAJ

1. En monto Marano, apud Benevento, mortis virino tre devota al sankta Francisko.

Noktotempe, dum la klerikaro estis kunigita por la funebra kanto kaj tranokto kun psalmaroj, abrupte, sub la okuloj de ĉiuj, la mortintino eksidis sur lito, alvokis unu el la sacerdotoj ĉeestantaj, kiu estis lia baptopatro kaj tiel al li parolis: “Alproksimiĝu, ho patro, kaj konfese aŭskultu mian kulpon kiun mi ne konfesis dumvive. Mi ĝin devintus pagi en dura karcero, sed sankta Francisko, premie pro mia devoteco al li, al mi obtenis vekigi el la morto-dormo por ke mi tiel povu konfesi mian kulpon kaj feliĉe senprokraste flugi al la ĉielo”.

Al la pastro, kiu tremis kiel ŝi, konfese rekonis ĉion kaj kviete estingiĝis en la dia kiso.

2. En Pomanico, sur la Apulaj montoj, geedzoj havis unusolan filinon ankoraŭ en fruaĝo kiun ili amis kiel pupilon de siaj okuloj.

Sed morto plej baldaŭ venis ŝin kapti. La gepatroj, ne havante esperon pri kromaj gefiloj, sin taksis jam likviditaj.

Ĉirkaŭ la kadavreto kolektiĝis parencoj kaj amikoj, sed la patrino, senkonsola kaj preskaŭ ekster si, konsciigis pri nenio. Senmove ŝi restis kuŝe sternita.

Tiam al ŝi aperis sankta Francisko. Tiu ĉi descendis el la ĉielo kune kun fratulo por ŝin konsoli en tiu senmezura doloro. “Kura-

ĝu! - al ŝi diris li - Pro la granda devoteco kiun vi havis al mi, baldaŭ refajriĝos la lumo de via lucerno, kiun vi priploras kiel jam mortintan”.

La virino abrupte leviĝis kaj ekrakontis al ĉiuj la vizion. Poste je la nomo de la sanktulo ŝi kunprenis la infaneton kaj ĝin levis el liteto. Ĝi estis viva!

3. La fratularo de Nocera, bezoninte ĉaron, ĝin prunte petis je nomo de S. Francisko al homo pernome Petro. Pro tio ili ricevis repagajn insultojn kaj, krome, blasfemon kontraŭ sankta Francisko. Sed tiu ulo pri tio devis tuj bedaŭri ĉar en lia animo estis enŝoviĝinta timo pro kelka peno el la ĉielo kiel puno pro lia peko. Fakte okazis, ke postnemulte lia unuenaskita filo, trafita de grava malsano, mortis.

La mizera patro kunvolviĝis surtere pro la malespero kaj ne ĉesis preĝe alvoki la sanktulon, ekplorege kriante: “Estas mi la pekulo. Mi fie parolis. Tiu peno konvenis al mi. Ho sankta Francisko, redonu al mi pentinta kiun vi al mi blasfemanta deprenis. Ĉiam mi estos devota al vi, estos via fidelulo kaj je via nomo mi donacos al la Sinjoro ĉiamdaŭran laŭdoferon”.

La infano, sekve de tiuj vortoj, resurektis. Reteninte larmojn, poste tiu ĉi diris ke, tuj post la forpaso, sia animo estis gastigita ĉe S. Francisko kaj ke, poste, de la sama li estis reenkondukita en sian korpon.

4. Sepjara fileto de roma notario, laŭkutime de infanoj, volis akompaniĝis al la patrino iranta viziti la preĝejon de sankta Marko. Pro tio ke al li ne estis permesite, la fileto sin ĵetis el palaca fenestro.

La patrino, kiu ne jam multe malproksimiĝis, pri tio aŭdis falbruon. Haste ŝi retroiris timante en sia koro, ke tio koncernis sian

infanon. Ŝi ne eraris: fakte, sur la strato kuŝis sian infano morta. Senkonsola, ŝi dolorsigne metis la manojn surkapharen kaj ek-kriis tiel ke tuj la tuta najbaro kuniĝis por plori kun ŝi.

Bonŝance Minora fratulo nome Raho, kiu estis iranta prediki en tiu sama preĝejo, tra iu loko pasis en tiu momento. Plena je fido, adresiĝinta al la patro, tiel li parolis: “Ĉu vi kredas, ke sankta Francisko pro amo kiun li portis al la Kristo krucumita, kapablas resurektigi tiun infanon?”. “Jes, - respondis la patro - mi kredas kun viva fido. Eĉ, se mi obtenos la gracon, mi votos esti estontece firme fidela al la sanktulo

La predikanto kune kun sia kunulo tergenuiĝis por preĝi, imitita de la personoj ĉeestantaj. Tiam oni vidis la infanon antaŭe obscedi, poste malfermi la okulojn kaj levi la brakojn, fine stariĝis antaŭ ĉiuj kaj tuj ekmarŝis.

Propete de sankta Francisko la infano estis reveninta al la vivo tute restabiligita.

5. Knabeto de Capua, dumlude apud bordo de la rivero Voltorno, pro nesingardo falis en ĝin kaj enprofundiĝis. La ludkunu-uloj ekkriis helppetante. Alkuris terurplena homamaso, kiu ekis preĝpeton al sankta Francisko por ke tiu ĉi sin degnu redoni la infanon al la gepatroj tiom devotaj al li.

Defore aŭdis tiun voĉegon brava naĝanto. Ankaŭ li alkuris al la loko de la malfeliĉaĵo kaj, diligente infomiĝinte koncerne la cirkonstancojn de la malfeliĉiĝo kaj preĝalvokante la helpon de sankta Francisko, lin ekserĉis, sed lin trovis kovrita de kotamaso. Pene lin eltiris eksterakven utiligante sian praktikitan arton, sed la knabo estis jam mortinta.

La homamaso alkurinta, kvankam je vido-tuŝo la knabo imponiĝis frosta kadavro, ne rezignis preĝi laŭvoĉe kaj larmante: “Ho sankta Francisko, lin redonu viva al lia patro”. Ankaŭ iuj

judoj, kortuŝiĝinte pro natura kompatato, kuniĝis al la preĝanta ĥoro. Kaj la mortinto tuj stariĝis kaj ĝojvekante en ĉiuj petis esti akompanata al la preĝejo de sankta Francisko por lin danki ĉar sciis, ke mem estis de li savita.

6. En Sessa, najbare de Napolo, en kvartalo nomita “Al la kolonoj” subite falruiniĝis domo englutante inter la ruinaĵoj junulon.

Ĉiuloke alkuris viroj kaj virinoj kaj ĉiuj engaĝis sian helppon por forigi labojn kaj ŝtonojn kun la espero povis lin trovi viva.

Sed kiam oni lin trovis, li jam estis mortinta. Tiam ili lin redonis al la patrino. La konpatinda virino, per prosingulte rompita voĉo, ripetadis feblpreĝe: “Ho Sankta Francisko, ho Sankta Francisko! Redonigu al mi mian filon!”.

Ankaŭ la tuta popolo preĝadis kun ŝi. Sed la mortinto daŭriĝis ne doni vivsignojn. Tial oni lin sternis surlite prepare al la entombigo kiu estos okazinta la postan tagon.

La patrino tamen ne desperis. Havinte pluan fidon en la Sinjoro, ŝi votpromesis, ke, se alvenus la difavoro, ŝi ornamus la sanktulan altaron per nova altartuko.

La difavoro tiom sopirata alvenis. Fakte, ĉirkaŭ meznokto la mortinto ekis obscedi kaj liaj membroj ekvarmiĝis. Fine, li ellitiĝis viva kaj sana eksplodante en dankajn vortojn, invitis la ĉeestantaron, inkluzive de la klerikaro tien kunveninta, himnadi, kun ĝojo en la animo, kune kun li al la Sinjoro kaj al sankta Francisko.

7. Vinrikoltan tempon, junulo de Ragusa, kromnomata Gerlandino, iris al sia vinlaborejo. Dum li zorgis pri la plenigo de bareloj el la ujo ricevinta el vinberpremilo, pro falruiniĝo de lignos-tako, falis grandaj ŝtonoj sur lia kapo ĝin frakasante.

Tuj alkuris la patro, kiu, desperinte lin povi savi per siaj solaj fortoj, lin lasis sub tiu pezo kaj sin forlasis al kriado kun lamenta

voĉo.

Ploroj kaj krioj alkurigis vitkulturistojn, kiuj, konsciiĝinte pri tiu grandega sufero, ĉiuforte kaj ĉiurimede klopodis savi tiun malfe-liĉulon. Tiu, tamen, kiun ili eltiris de subo de rubaĵo, estis mortinto.

Malgraŭ tio, tiu povra homo sin ĵetis teren kaj fidplena, tiel preĝis: “Sinjoro Jesuo, pro la meritoj de s. Francisko, kies feston ni baldaŭ celebros, resurektigu mian solfilon!”. Plurfoje li ripetis tiun preĝon promesante piecagojn. Li ankaŭ votis, ke mem, se benita per tia difavoro, irintus kune kun la filo viziti la korpon de la sanktulo.

La miraklo realiĝis. Tiu junulo, kiu kuŝis ĵusantaŭe disfrakasita, abrupte salte ekstaris vivplena, integra kaj surlipe ridanta. Kaj ri-proĉanta tiujn pluplorantajn, danke glordonis al sankta Francisko, per kies propeto mem sin diris resurektigita.

8. Alia mortinto estis revenigita al la vivo en Germanio. La papo Gregorio la Naŭa la bonan novaĵon komunikis per apostola letero al la fratularo kunveninta por la Kapitulo kaj translokigo de la korpo de la sanktulo.

El mia flanko mi apenaŭ aludas al la fakto ankaŭ pro tio ke mi ignoras la cirkonstancojn kaj kredas, ke sufiĉas la papa atesto.

### III

#### DEVOTULOJ LIBERIGITAJ EL MORTODANĜERO

1. Najbare de Romo nobela sinjoro nomita Rodolfo, akorde kun sia edzino, akceptis kaj gastigis en sia domo iujn minorajn fratulojn, puŝite de frata amo kaj de devoteco kiun li nutris por sankta Francisko.

Sed ĝuste tiun nokton okazis, ke la kastelo-gardisto, kiu endormiĝis sur ligna stako en la turpinto, falis en la palacan tegmenton pro abrupta malkonstruiĝo de la stako. El la tegmento, poste, li ruliĝis teren.

Ĉe la surda defala bruo la familio vekigis. La paro kaj fratuloj, tuj alkurintaj, trovis la bonŝanculon apud la palaca baza muro, sed profunde dormanta.

Ili lin skuis, lin dolĉe-maldolĉe tuŝis. Fine li vekigis, sed eklamentis, ke ili estis lin seniginta el la ĝojo dorme kuŝi enbrake de sankta Francisko.

Sed plimalfrue aŭdinte kaj konstatinte la strangan okazaĵon, nome, ke mem falis el la turpinto sen iu ajn sensa percepto, ŝi ekkonsciis pri la miraklo kaj promesis antaŭ ĉiuj sin dediĉi al pentofaro pro amo al Dio kaj al sankta Francisko.

2. En Pofĭ, Kampanio<sup>41</sup>, Sacerdoto konata kiel Tomaso, iam descendis por ripari la akvomuelon de la preĝejo.

Dum paŝado, kun nemulta atento, laŭ la kanalo tra kiu fluis

---

<sup>41</sup> Nun en Latia regiono.  
Legendo majora

profunda kaj impeta akvo, subite li falis kaj restis enprenita inter la lignaj ŝoveliloj de la rado turniganta la muelilon. Trude devigate resti senmove kaj dorsokuŝe, li ricevis survizaĝen tuta la akvan impeton.

Liaj helpantoj senesperis lin savi. Sed li ne per la buŝo, ĉar per ĝi ne eblis, sed per sia koro fervorege preĝpetis sanktan Franciskon.

Post multe da penoj kaj interkonsiloj, tiuj homoj trovis fine la ŝlosilon de la intrigo por liberigi la nebonŝancan pastron. Necessis granda energio por meti en efektivo la planaĵon. La pastro estis ja jes, tuj forpuŝita de la akva impeto, sed li estis ankaŭ ne tuj lasita de la sama.

Aperis tiam Minora fratulo kiu survestis blankan tunikon kaj ŝnurzonon. kun granda afableco prenis tiun povrulon ĉe brako kaj riverbordigis dirante: “Mi estas Francisko kiun vi preĝalvokis”.

La pastro sin turnis por kisi la piedojn al sia liberiginto, sed lin plu ne vidis. Tiu estis malaperinta. Pri la aperinto li petis la ĉirkaŭantojn, el kiuj neniuj sciis doni respondon. Tiam tiuj homoj treme tergenuiĝis kaj eklaŭdis Dion kaj la meritojn de ties servisto.

3. Iuj junuloj de Cerano iun tagon iris al la kamparo por falĉion da herbo.

En la loko de ili atingita troviĝis inter verdaj plantoj profunda puto entenanta akvon altan kvarmetran. Dum ili laboris dise tie kaj tie, unu el ili abrupte falis enen.

La kunuloj, ne plu lin aŭdinte, laŭtvoĉe lin vokis, sed neniuj respondis. Lin serĉis apude kaj najbare. Sed neniuj.

Malkovrinte, fine, inter densa herbaro tiun puton, venis al kelkaj el ili la suspekto, ke eble la kunulo estis falinta en ĝin. Ili ekrigardis kaj konsciiĝis, ke mem ne eraris.

Kaptite de emocio, ili tuj revenis al la vilaĝo por sciigi la okazaĵon kaj helppeti.

Multaj kuniĝis al ili. Alveninte la lokon de la malbonŝancaĵo, pere de ŝnuro oni mallevis la homon. La malbonŝanculo estis gaje sidanta sur la akva surfaco kiel senpeza herbeo.

Supren altirite, la homo tiel rakontis: “Dum subfaliĝo de mia korpo, mia spirito direktiĝis al la ĉielo kriante laŭtvoĉe: “Ho sankta Francisko, helpu min”. La sanktulo sense videbliĝis al mi, li min prenis kaj permane tenis neniam min forlasante ĝis, kune kun vi, li min suprenlevis ĝis tien.

4. En la preĝejo de sankta Francisko, en Asizo, dum la episkopo de urbo Ostio, kiu poste estis papigita kiel Aleksandro<sup>42</sup>, predikis antaŭ la roma kurio, granda kaj peza ŝtono, maldiligente forgesita sur la alta marmora pupitro, falis pro troa premo sur la kapo de iu virino.

La plejproksimuloj kredis ŝin mortinta ĉar ŝia kapo estis frakasita. Laŭokaze oni ŝin kovris per ŝia mema mantelo por pli poste ŝin, kadavran, forporti tujpost la finiĝo de la prediko. La povrulino, male, fidoplene sin rekomendis al S. Francisko pro tio ke ŝi estis kuŝanta ĝuste ĉe la piedoj de la altaro al li dediĉita.

En la preĝejo estiĝis granda miro kiam, post la prediko, tiu virino stariĝis senvunda kaj senvundspura. Sed nia miro pliiĝas se ni konsideras, ke tiu virino, antaŭe suferanta de senpaŭzaj kapdoloroj, de tiam ĝis ŝia vivfiniĝo je tiuj ŝi estis liberigita, kiel ŝi dumvive konstante deklaris.

5. En Cometo<sup>43</sup>, okjaraĝa infano laŭbapte Bartolomeo, iun tagon portis al la fratularo nutraĵon por volontaj homoj laborantaj en tiu konvento por fandi sonorilon.

Sed fortega vento, skuanta eĉ la domojn, impetigis kontraŭ lin

---

<sup>42</sup> Papo Aleksandro la 4a (1254-12261).

<sup>43</sup> Nun Tarquinia.



grandan pordon.

Sub tiu grava pezo certe li devis kuŝi mortinta. Ĉiuj alkuris preĝalvokante sanktan Franciskon, escepte de la patro, ĉar ŝtonigita pro la doloro, li ne povis moviĝi. Tamen, li preĝis kaj oferis sian fileton al la sanktulo.

La pordegon fine oni delokigos kaj la infano, kiun oni opiniis trovi kadavra, ŝalte elstariĝis kiel vekiginto el profunda dormo. Li sintenis gaje kaj ne prezentis iun ajn vundspuron.

Kiam atingis la dekkvaran jariĝon li survestis franciskan frokon kaj fariĝis klera literaturisto kaj fama predikisto.

6. Kelkaj laboristoj de Lentini estis detranĉintaj el monto grandan rokeron, utiligotan kiel altartabulon por la preĝejo de sankta Francisko, baldaŭ konsekrota.

Malgraŭ la ripetitaj streĉoj de kvardek homoj, oni ne sukcesis tiun ŝtonegon alŝovi sur la transportilon. Male, certmomente ĝi renversiĝis sur unu el ili kaj lin tute surkovris.

Senkuraĝigite kaj senespere, la plejparto el ili, ne sciante kion fari, rezigne foriris. Sur la loko restis nur dek homoj. Al ili venis inspiro sin turni al la glora sanktulo. Fakte, ili tiel lin humile preĝalvokis: “Ho sankta Francisko, ne permesu, ke mortu tiel horore tiu nia kunulo kiu laboris je via servo”.

Tiuj laboristoj sin sentis tuj konsolitaj en la animo, poste kun tioma facileco levis tiun ŝtonegon, ke mem klare vidis la helpon de sankta Francisko, La homo siaforte eliris tute sana, senkuntuza kaj senvunda.

Kaj dum antaŭe havis vidkapablon vualitan, de tiam ĝis vivfino ĝuis je perfekta vidkapablo

Multe efikas la potenco de sankta Francisko, ankaŭ en la kazoj senesperaj.

7. Simila muraklo okazis en San Severino, en la Markioj. Granda ŝtono aĉetita en Konstantinopolo, dum de multaj ĝi estis trenata al la baziliko de sankta Francisko, bruske renverŝiĝis sur unu el ili.

Ĉiuj ekpensis, ke la provrulo estas jam dispremita kaj reduktita al senforma amaso. Male, helpe de Sankta Francisko, kiu levis kaj tenis surlevata tiun ŝtonegon, tiu homo povis eliris el tiu situacio senvunda.

8. Al civitano el Gaeta, nomata Bartolomeo, dum laboris kun granda zorgo en la konstruado de preĝejo honore de sankta Francisko, sur la kapon falis trabo ne korekte fiksita kaj ĝin frakasis.

Sin sentinte proksima al morto, pia kiel li estis, petis de fratulo ke mem portu la Viatikon. Car timis, ke mankus sufiĉe da tempo, tiu ĉi sugestis la vortojn de sankta Aŭgusteno: “Faru fidaĝon kaj samokazos kvazaŭ vi manĝis la Sinjoran korpon”<sup>44</sup>.

La sekvantan nokton al li aperis sankta Francisko akompanata de dekunu fratuloj. Tiu interbrake tenis ŝafidon kaj, alproksimiĝinte al la lito, pernome lin vokis: “Bartolomeo, ne timu. Satano ne sukcesos vin forturni el la zorgo pri mia preĝejo. Tiu ĉi estas la Ŝafido kiun vi hieraŭ petis, ke estu al vi servita kaj kiun vi ricevis per via bona deziro. De li vi ricevos sanigon por la animo kaj por la korpo”.

Glitiginte la manon sur tiuj vundoj, al li ordonis reiri al la laborejo.

Duonmiriĝinte kaj duondubinte pri siaj okuloj, ĉiuj frumatene vidis Bartolomeon reveni labori por la konstruo de la preĝejo, senkrapa kaj gaja. Kaj lia ekzemplo kaj la granda miraklo ekscitis grandajn devotecon kaj amon al la sanktulo.

---

<sup>44</sup> Krede, et manducasti (el pribibliaj komentarioj de s. Bonaventuro).  
Legendo majora

9. Al viro de Ceprano iam malbonŝancis malfeliĉe kaptiĝi de la ingejoj de kruelaj malamikoj. Sur lin ili sin ĵetis kiel bestioj kaj lin ne forlasis se ne kiam, post abundaj batoj, ili lin kredis morta aŭ morti proksima.

La povrulo, sub hajlado de la unuaj batoj, estis fortvoĉe kriinta: “Ho sankta Francisko, venu helpi min! Ho sankta Francisko, helpu min!”.

Multaj de fore lin aŭdis nepovantaj tamen lin defendi. Li estis transportita al sia hejmo tute sangtrempita. Sed li sin montris fidplena kaj al ĉiuj diradis: “Ne, mi ne mortos: mi eĉ ne sentas la doloron pro la vundoj. Sankta Francisko venis helpi min kaj obtenis de Dio kroman tempon por pentofari”.

Kio jam dirita estis tuj konfirmita de tio kio postvenis. Fakte, ĵus purigite el la sangspuraĵoj, kontraŭ ĉiu homa antaŭvido, li salte piedstariĝis perfekte restarigita.

10. Filo de nobela sinjoro de Castel San Gimignano pro grava malsano estis reduktita sojlen de morto. Al li fluis sango el la okuloj tiel abunda kiel el rompita braka vejno. Pro aliaj gravaj indicoj evidentiĝantaj tra ĉiuj korpaj partoj, oni taksis lin poksiman al morto, eĉ certmomente li estis konsiderita jam kadavro pro senmoveco kaj sensenseco supervenintaj pro ekstrema feblo.

Parencoj kaj amikoj kuniĝintaj ĉirkaŭ lia lito lin plori mortinta kaj ekparolis pri entombigo.

La patro, tamen, fidplena je Dio, haste kuris al la preĝejo de sankta Francisko, situanta en tiu loko kaj, metinte al si ŝnuron ĉirkaŭe de la kolo, teren genuiĝis kaj suspirante kaj larmante adresis preĝojn kaj votojn. Tiamaniere li meritis de Kristo la ĝojojn povi gui je la protekto de sankta Francisko.

Reneninte hejmen li trovis, fakte, la filon digrace tute resanigita. La funebro ŝanĝiĝis al festo.

11. Per simila miraklo Dio, konsiderinte la meritojn de la sanktulo, favoris junulinon de Borgo Tamarit, en Katalunio, kaj alian de Ankono. Ambaŭ havis la piedojn en la tombo. Kaj tamen ili reobtenis la sanon helpe de la preĝoj kiujn iliaj parencoj adresis al S. Francisko.

12. En Vicalvi, kleriko laŭbapte Mateo, estis ingestinta venenon. Inter la faŭkoj de morto li ne sukcesis diri eĉ ne unu vorton al la sacerdoto kiu lin invitis sakramente konfesi. Sekrete, tamen, en sia koro, li preĝis Jesuon Kriston por ke, pro la meritoj de sankta Francisko, mem estu liberigita el tiu malbono.

La difavoro esti koncedita. Fakte, li tuj vomis per dia helpo la venenon ĵus post la eldiro de la nomo de la sanktulo, kaj povis malligi antaŭ ĉiuj dankan himnon al sia liberiganto.

## IV

### ŜIPPEREANTOJ SAVITAJ

1. Iuj maristoj iam sin vidis en granda vivdanĝero ĉar furiozis skuanta tempesto kaj ili distancis ĉirkaŭ dek mejloj de la haveno pli proksima.

La riskantoj ĵetis la ankrojn, sed pro la impeta vento kaj densega maro rompiĝis la ŝnuregoj. Ili tiam traonde drivis kun la ŝipo.

Reveninte kalma vetero, ili provis elakvigi la ankrojn, ĉar iliaj ŝnuregoj estis glisantaj sur la akvo. Sed ili sukcesis malgrundigi eĉ ne unu, malgraŭ klopodoj de tuta tago kaj preĝalvokoj al multaj sanktuloj.

Unu el ili tiam, Perfektulo laŭnome sed ne laŭkondute, eksterigis spitan esprimon: “Vi vin rekomendis al ĉiuj ĉielaj sanktuloj kaj ne pensis turniĝi al sankta Francisko. Kiu scias ĉu tiu mem subakviĝu en la marajn profundecojn kaj ilin prenu per siaj manoj!”.

Tiuj vortoj estis elparolitaj moktone. La kunuloj, tamen, ilin serioze ekkalkulis, kaj, post riproĉo al tiu homo, devotece kaj fervore ekpreĝis al sankta Francisko. Komunkonsente ili eĉ eligis voton.

Subite, sen iu ajn helpo, la ankroj elakviĝis: vento ilin lulis kvaŭ la naturo de l'fero ŝanĝiĝis al tre leĝera ligno.

2. Pilgrimanto, tre febligita en la korpo pro akutaj febroj suferitaj, elvenis el lando transmara.

Ankaŭ li nutris al sankta Francisko apartan devotecon. Fakte, li tiun elektis kiel sian advokaton ĉe la dia trono. De tia sia sin-

cereca konfido li plurfoje spertis efikojn.

Dumvojaĝe, estinte ne jam komplete restariĝinta, li sentis la ardojn de la soifo kaj petis akvon. Sed ĝi jam finiĝis kaj tion al li kunuloj sciigis.

“Iru - li tiam kriis laŭtvoĉe - iru kun fido atingi el mia bareleto, ĉar sankta Francisko ĝin plenplenigis”.

La bareleton li lasis ĵus antaŭe seka; malgraŭe, ili iris vidi kaj ĝin trovis... plena ĝisborde.

Alian tagon senbridiĝis sur la maro granda tempesto. La ŝipo, ondokovrita, estis ĉiuflanke skuĵetita grave riskigante ŝippereon. La devotulo tiam aŭdigis pluvoje sian voĉon tra la tuta ŝipo. “Ek, kuraĝu, leviĝu kaj iru renkonten al sankta Francisko kiu ekvenas nin savi!”.

Tieldirante, li genuiĝis kaj veneris la sanktulon per devotaj vortoj kaj larmoj.

Kiam la vizio malaperis, malaperis ankaŭ el li ĉiu minaco de danĝero kaj la ondoj trankviliĝis.

3. Frato Jakobo el Rieti iun tagon estis trairanta riveron sur boateto kune kun aliaj fratuloj.

Alveninte ĉe bordon, dum vice atendis eliri post la aliaj, la boateto renversiĝis kaj ankaŭ li kune kun la pramisto alfundiĝis. Tiu ĉi, tamen, ĉar kapabla naĝi, sin savis.

Sur la bordo la fratuloj fervore kaj larme preĝalvokis sanktan Francuskon. Ankaŭ frato Jakobo faris la samon, kore el la rivera fundo helpalvokis.

Preĝalvokate, la sanktulo atingis la ekdroniĝanton. Kaj frato Jakobo moviĝis antaŭ lia dolĉa ĉeesto en la akvoprofundo kvazaŭ mem estus sur tero marŝanta. Li fine kaptis permane la subakvan boateton kaj fulme kun ĝi albordiĝis.

Eĉ ne unu akvoguto, aldone, vidiĝis sur lia vesto!

4. Alia fratulo, konata kiel Bonaventuro, kiun du homoj pramis lagon, kaj jen en la boateto malfermiĝis breĉo pro impeta akvofluo kaj ĉiuj estis englutitaj de la ondoj.

*En la abismo de tiu mizero*<sup>45</sup> ili ekmemoris pri sankta Francisko kaj lin preĝalvokis grandfide. La boateto tiam, kvankam akvo-plena, resuriris surfacen kun la tri homoj kaj, gvidate de la sanktulo, evelte glitis al la aveno.

Sama kazo estiĝis rilate al fratulo el Ascoli sur rivero kaj rilate al kelkaj viroj kaj virinoj sur la lago de Rieti. Ĉiuj eskapis el certa morto tra la akvokirloj per la simpla preĝpeto al S, Francisko.

5. Iuj maristoj de Ankono, skuĝetitaj tie kaj tie pro furioza tempesto, sin vidis en danĝero droni. Sed kiam, jam proksimaj ŝip-perei, kun preĝalvoka voĉo, sin adresis al la sanktulo, granda lumo ekbrilis sur la ŝipo kaj ekfariĝis granda kalmio. Ŝajnis, ke lia virto estus obteninta el Dio la povon rege ordoni al la ventoj kaj al la maro.

Mi ne havas eblecon rakonti ĉiujn miraklojn kiujn efektivigis kaj efektivigas S. Francisko sur la akvoj; samkaŭze al mi mankas ebleco nombri ĉiujn helpojn konceditajn tie en desperaj kazoj.

Kaj ne veku miron, ke el la ĉielo li montras posedi tian povon se ek de kiam li estis vivinta sur la tero, ĉiuj kreaĵoj al li estis submetitaj same kiel tiaj ili estis al la unua homo en la tera paradizo.

---

<sup>45</sup> Psalmo 39,3.  
Legendo majora

## V

### DEVOTULOJ LIBERIGITAJ EL KATENOJ KAJ EL KARCCERO

1. En Grekolando, denaska servisto de sinjoro trafis en malbonŝancon esti false akuzita pri ŝtelo, kaj do esti enfermita en malvasta karccero laŭ ordone de la regiona princo.

La dommastrino plurfoje instigis la edzon lin liberigi, sed vane. Sin turnis ŝi tiam al sankta Francisko, lin rekomendis al ties kompato kaj pro tio eĉ votis.

La sanktulo tuj, fakte, responde al la fervoraj preĝoj, reagis per miraklo. Li, fakte, malsupreniris tiun karcceron, rompis tiujn ĉenojn, malfermis la kradpordojn kaj eksterigis, mane lin kondukante, la prizonulon lin konsolante per jenaj vortoj: “Mi estas la ulo al kiu la dommastrino vin konfidis”.

Malgraŭ sin vidinte liberigita, li timplene ekis iri piruete malsupren laŭ la deklivo de la altega roko. Sin vidinte, poste, per alia miraklo de la sanktulo, jam en teretaĝo, revenis rakonti ĉion al la dommastrino.

Tiu rakontaĵo esti por ŝi fairero kiu ekflamis al ardega amfajro al Kristo kaj al fervora devoteco al sankta Francisko.

2. Povrulo de Massa San Pietro ŝuldis sumon al kavaliro. Ne povinte kvitiĝi kun sia kreditanto pro sia mizera kondiĉo, li estis enkarccerigita laŭ ties volo.

Li lin preĝpetis pro amo al sankta Francisko, ke estu koncedite ion da tempo, sed vane. Tiu malhumilulo malŝatis la preĝpe-



ton de la malfeliĉulo kaj insultis tiun amemon kvazaŭ senutilan babilaĉo. Al li tiu ĉi, fakte, arogante respondis: “Mi vin fermigos en loko, mi vin enŝovos en tian karceron, el kiu nek Francisko nek aliaj povos vin liberigi”.

Li faris kion promesis. Sed ne multe post aperis la sanktulo, kiu, malferminte la karcerajn pordojn kaj rompinte la pezajn ĉenojn, reakirigis al la homo la liberon.

La mirakloj estis du: la prizonulo obtenis la liberon el tiu pro kiu tiom preĝpetis, kaj la arogantulo estis allogita ĉar ekde tiam li fariĝis milda kiel ŝafido.

3. Alberto el Arezzo, ĉar troviĝis malfermita en tre peniga karceron pro supozitaj ŝuldoj, konfidis sian kverelon al S. Francisko, kiun li plej amis super ĉiuj sanktuloj kaj kies ordeno li kuniĝis per specialaj amaj ligiloj.

Sed kiu sin kredigis lia kreditanto, lin traktis blasfemante konvinkite, ke nek Sankta Francisko nek Dio povus lin liberigi el siaj manoj.

Alvenis vigilo de la sanktulo, kaj en tiu tago Alberto ne volis preni nutraĵon. Pro amo al sankta Francisko ĝin donacis al povrulo.

Dumnokte, dum li pluvigilis, jen aperis al li la sanktulo. Sammomente al li falis la katenoj el la piedoj kaj manoj, memmalfermiĝis la pordoj kaj forsaltis plankaj tabuloj tiel ke la prizonulo povis reiri, liberigite, al sia domo.

Ek de tiam li fidele observis la voton fasti la vigilon de la sanktula festo kaj aldoni al la kandelego per kiu li kutimis ĉiujare honori la sanktulon, unkon el oleo kiel simbolon de sia ĉiam kreskanta devoteco.

4. Iu Petro el Alfie. akuzita pri herezo, estis kaptita en Romo kaj transdonigita laŭ ordono de la papo Gregorio la 9a al la epis-

kopo de Tivoli. Se ĉi tiu lin lasus fuĝi, certe perdus la episkopan oficon.

Lin do oni traktis laŭ rigora maniero. En karceroj lin oni kate-nigis ĉe la piedoj kaj ne liveris al li nenion ol panon kaj akvon sed eĉ tiujn laŭ ne sufiĉa mezuro.

La malfeliĉulo ekis preĝe kaj larme alkroĉiĝi al la helpo de sankta Francisko ĉar li sciis ke jam ekestis la vigilo de lia festo.

Kaj ĉar en sia koro jam malkonfesis herezon per tre fidsince-ra decido kaj kun granda devoteco ekfidis la fidelegan serviston de Kristo, li meritis esti elaŭdita ĉe Dio.

Je ektagfinaĵo de sia festo, la sanktulo malsupreniris karceron, permone lin vokis, kaj ordonis leviĝi.

“Kiu vi estas? - demandis Petro.

“Mi estas la ulo kiun vi ofte alvokis - respondis sankta Fran-cisko.

La ĉenoj rompiĝis, la pordoj, kvankam netuŝitaj, malfermiĝis kaj la elireja vojo iĝis senobstakla. Sed la povrulo, pro tio ĉio torporigita, ne aŭdacis forŝteliĝi. Tiam li komencis voĉbrui tiel laŭte ĉe la karceraj sojloj, ke la gardistaro alkuris timkaptite.

La episkopo, informite pri la evento, plonĝis tuj sur la lokon kaj, rekoninte la potencon de Dio, en tiu sama loko lin adoris.

Ankaŭ la papo kaj kardinaloj, kiam oni prezentis al ili tiujn katenojn rompitaĵoj, agnoskia la miraklon kaj gloris la Sinjoron.

5. Guidolotto el S. Gemignano estis false akuzita esti venen-inta homon kaj havi intencon samile elimini ankaŭ ties filon kaj tutan familion.

Tial li estis arestita laŭ ordono de la urbestro kaj malliberigita en turo.

La prizonulo ne senkuraĝiĝis pro tio, sed ege fidema je Dio, kiu konis lian senkulpon, konfidis sian defendon al sankta Francisko.

Dum la urbestro estis pricerbumanta la turmentojn per kiuj lin decidigi konfesi la krimon kaj, se rekonitan kulpa, per kiuj lin mortigi, en la nokto antaŭanta la tristan tagon de torturo Guidolotto estis vizitita en karcero de S. Francisko. Lia ĉelo brilegis je lumo ĝismatene kaj tiu homo ĝuis ĝojon kaj konfidon tiel senmezuran, ke mem antaŭsentis la elkarceriĝon.

Venis la ekzekutistoj, lin elkarcerigis kaj lin pendigis ĉe torturiloj plipezigante lian korpon per ferpezaĵoj.

Plurfoje ili lin altiris supren, plurfoje lin intence lasis refali malsupren, por lin konvinki, per tiu amaso de turmentoj, plihaste konfesi la krimon.

Malgarŭ akre torturita, la vizaĝo de Guidolotto brilis pro senkulpeco.

Sub li estis ekbruligita granda fajro, sed por li bruliĝis eĉ ne unu kapharero kvankam lia kapo estus deklivigita al grundo. Fine li estis aspergita per bolanta oleo. Sed pro propetado de sankta Francisko, li superis ĉiujn turmentigajn elprovojn, tiel ke oni lin agnoskis senkulpa kaj allasis al li liberon.

## VI

### VIRINOJ SAVITAJ EN AKUŜAJ DANĜEROJ

1. Grafino el Sklavonio, tiel klera pro naskiĝa nobeleco kiel nobla pro virto, kulturis grandan devotecon al sankta Francisko kaj por la Minoraj fratuloj zorgis laŭpatrine. Kvazaŭ frukto de sia granda pieco, ŝi iam estis favorata el la ĉielo per miraklo.

Dumakuŝe ŝi estis atakata de korkrevigaj doloroj. Ŝajnis, ke tiu naskiĝo estus por ŝi kaŭzo de morto. La bebo ne naskiĝus sen mortigi la patrinon. La ĉeestantaro juĝis, ke ŝi ne sukcesus akuŝi la infanon ĉar ŝi mortus antaŭe.

Tamen la memoro pri sankta Francisko ŝin liberigis el la moroportata angoro. La famo de liaj mirakloj, la efikeco de lia prope-tado kaj la gloro ĝuita en la ĉielo malfermiĝis la animon al fido kaj espero senrezervaj. Ŝi tial alkroĉiĝis al la helpo, al la konso-lo, al la rifuĝo, nome al la amiko de ĉiuj devotuloj kaj afliktuloj kaj tiel preĝis: “Ho sankta Francisko, venu helpi min. Al via kom-pato mi min konfidis kaj promesas en la kora intimo kion mia lipo ne sukcesas manifesti”.

Estis ĵus finiĝinta tiu preĝo, ke ŝi akuŝis sen percepti iun ajn doloron. Kaj bela preĝejo estis starigita je ŝiaj elspezoj kaj kulte oficigita de la fratuloj.

2. Apud Romo iu Beatrica, akuŝoproksima, portis jam de kvar tagoj morta en la ventro la feto.

Nedireblaj estis la spasmoj kaj senutilaj la rimedoj aplikitaj de kuracistoj. Al la akuŝdoloro altrudita de Dio pro la unua peko al-

doniĝis ĉe ŝi jeno: ke, fariĝinta tomo por la etuleto, estis destinita baldaŭ descendi eĉ ŝi al ĝin.

Al li ne restis ol turniĝi al S. Francisko kaj tion ŝi faris fido-plene. Ŝi sendis peti al la fratuloj kelke da relikvo de la sanktulo. Estis trovite ero de la ŝnuro per kiu la sanktulo zonis siajn flankojn.

Oni apenaŭ ĝin surmetis sur la konsumita korpo, ke el tiu ĉi la doloroj malaperis, la feti estis elmetita kaj la patrino, sanplena, tuj ellitiĝis.

3. Ĉe Calvi en Umbrio, la edzino de ĝentlemano, nomata Julino, travivis malfeliĉan vivon. Ĉiun filon, kiu inter la kutimaj doloroj al ŝi naskiĝis, kun pli akraj koraj suferoj ŝi devis liveri al la tomo. Ĉiuj forfuĝis el la vivo.

Sed iam li volis sin konfidi al S. Francisko. Ŝi troviĝis je la kvara gravedeca monato kaj ŝia menso agitiĝis multe pli pro timo de morto ol pro timo de suferoj dum la naskiĝo de la bebo.

Iun nokton, tamen, dumdorme, al ŝi ŝajnis vidi virinon kiu, tenante surbrake ĉarman infanon, tiun fordonus al ŝi kun nedirebla donacemo. Ŝi rifuzis akcepti pro la timo ĝin perdi tuj post.

Sed la virino ŝin trankviligis dirante: “Ne timu, tiu ĉi infano kiun sankta Francisko, kompatinte vian suferon, al vi sendas, plu vivos kaj ĝuos bonan farton”.

Ekvekiĝinte, tiu sinjorino komprenis el tiu vizio, ke la sanktulo ekvenas ŝin helpi kaj de tiam, trempita en ĝojon, multobligi siajn preĝojn kaj devote votis atendante akuŝon.

Alveninte fine la atendita tempo, ŝi donis lumon al maskleto. Ĝi ne mortis, sed kreskis vigla kaj bela kvazaŭ ĝi ricevus de sankta Francisko vivpliiĝon. Kaj estis tial sprono por parencoj kreski eĉ mem ĉiam pli laŭ la amo al Kristo kaj laŭ la devoteco al la sanktulo.

Similan miraklon S. Francisko ripetis en Tivoli avantaĝe de

virino kiu, jam akuŝinte multajn filinojn, al li preĝe kaj vote sin rekomendis por povi allumigi maskleton.

La sanktulo ŝin elaŭdis, kiu, fakte, almondigis du ĝemelojn, ambaŭ masklojn.

4. Virino el Viterbo, taŭzita de visceraj doloroj kaj akuŝdoloro, ŝajnis pli proksima al morto ol al vivdonado.

Ĉiu rimedo sin montris senefika kaj la vivenergioj iom post iom por ŝi elĉerpiĝis. La povrulino estis destinita venkiĝi.

Ŝi tiam memoris pri S. Francisko kaj lin alpreĝis. Abrupte ŝi estis liberigita el ĉiuj ŝiaj suferoj kaj feliĉe akuŝis.

Baldaŭ tamen ne nur ŝi forgesis la favoron ricevitan, sed ĝin ne plu atribuis al la sanktulo. En la tago de lia festo ŝi sin forlasis eĉ al manpezaj laboroj. Sed ŝi estis apenaŭ ekengaĝiginta la dekstran manon por labori, ke ĝin ŝi ne plu sentis: al ŝi ĝi restis senmova kaj seka pro ekparaliziĝo. La saman sorton suferis ankaŭ la maldekstra mano kiam pere de ĝi ŝi provis altiri al si la aridiĝintan.

Terurite pro tiu puno el Dio, ŝi ripetis la preĝon. Pro la meritoj de sankta Francisko, ĉiam humila kaj mizerokorda, la virino rekuperis la uzon de la membroj kiun ŝi jam perdis pro maldankemo kaj malŝato.

5. Kroma virino apud Arezzo, suferanta jam de sep tagoj pro akuŝdoloroj, tiel nigriĝis en la korpo, ke ŝi ŝajnis proksima al morto.

Ŝi tamen en sia koro devote votis al la sanktulo kaj, preskaŭ morta, ties preĝpetis la efikegan helpon.

Subite ŝi endormiĝis kaj sonĝis. Al ŝi ŝajnis vidi la sanktulon kaj malfruiĝi kun li en afabla konversacio.

- *Ĉu vi min konas?*

- Jes, mi vin konas.

- *Kaj vi sciu nun reciti la Saluton, Reĝino?*

- Jes.

- *Nu, ĝin recitu. Antaŭ ol vi ĝin finos, vi akuŝos kaj plu vivos.*

Je tiuj lastaj vortoj, la virino vekigis kaj timeme ekis: “Saluton Reĝino de mizerikordo...<sup>46</sup>”. Ekrecitante: “Turnu al ni viajn okulojn mizerokordajn, kaj post tiun ĉi ekzilo montru al ni la frukton de via sino, Jesuon”, sen iu plua doloro akuŝis belan infanon, Dankis do al la Reĝino de mizerikordo kiu, pro la meritoj de la beata Francisko, estis ŝin kompatinta kaj savinta.

---

<sup>46</sup> Temas pri tre konata preĝo, kies komenco la vorton “patrino” estis aldonita en XVI jarcento,  
Legendo majora

## VII

### SANIGO POR BLINDULOJ

1. En la konvento de Napolo, iu fratulo laŭnome Roberto suferis de multaj jaroj pro blindeco. Al la malsano plie aldoniĝis karnoriĉa elkreskaĵo sur la okuloj kiu malhelpis la movon kaj la uzon de la palpebroj.

Dume okazis, ke en la sama konvento kuniĝis multaj fremdaj fratuloj direktiĝantaj la diversaj partoj de l' mondo. S. Francisko, ekzemplo de perfekta obo, celante ilin kuraĝigi al la longa vojaĝo per la novaĵo de miraklo, sanigis la misŝancan fratulon tiele.

Pligraviĝis tiu ĉi kaj kuŝis en sia liteto, atendente la morton. Fakte jam oni rekomendis al Dio lian animon.

Kaj jen aperis al li sankta Francisko kune kun sankta Antono, frato Aŭgusteno kaj frato Jakobo, perfektaj liaj kunuloj en la vivo kaj nun liaj kunuloj en la gloro. Per tranĉilo detranĉis tiun elkreskaĵon, al li redonis la vidpovon kaj li eskapis el la faŭkoj de morto. Fine, tiel al li parolis: “Roberto, filo mia, la miraklo kiun mi sur vi faris estas signo, por la fratuloj kiuj ekiras foren, de mia kontinua asistado. Diru al ĉiuj, ke mem iru kontente kaj ke laboreme plenumu la obeon ricevitan”.

2. Kroma miraklo rakontiĝas en Tebo de Grekio. Blinda virino, kiu estis faste nutriĝinta, dum la vigilo de sankta Francisko, nur per pano kaj akvo, en festa tago estis frumatene kondukita de sia



edzo al la preĝejo de la minoraj fratuloj.

Dumtese, je la momento de levo de la hostio, al ŝi malfermiĝis la okuloj kaj ekvidis klarege.

Ekscitite pro tiu granda miraklo, profunde tergenuiĝis kaj adoris dirante. “Mi vidas la korpon de la Sinjoro. Jes, mi ĝin vidas. Dankon, ho Dio! Dankon ankaŭ al vi, ho sankta Francisko!”

Je tiuj jubilaj krioj homoj turniĝis al ŝi.

Post la finiĝo de la liturgiaĵo, la virino rehejmeniĝis kun ĝojo en la koro kaj helpe, kompreneble, miraklitaj okuloj. Sed ŝi jubilis ne nur pro la kontenteco pri la rehavita uzo de vidpovo, sed ankaŭ pro la fakto ke mem, pli ol ĉio, povis, per la propeto de sankta Francisko, kontempli la Korpon de la Sinjoro, lumo vera kaj viva de la animoj.

3. Ĉe Pofi, en Kampanio, dekkvarjaraĝa junuleto, kaptita de subita misfarto, perdis la vidpovon de la maldekstra okulo.

La porvidaj muskoloj tiom malfortiĝis, ke la okulo ellasiĝis el la okulkavo. Laŭ ok kontinuaj tagoj ĝi pendis preskaŭ seka sur la vango, laŭlonga kiel fingro.

Oni kredis necesa ĝia tranĉado. Laŭ kuracistoj, fakte, temis pri senespera kazo.

La patro, fidplena, sin turnis tiam al sankta Francisko. Kaj la nelacebla helpanto de la mizeruloj ne malfruis lin elaŭdi. Mirakle li revenigis tiun okulon al ĝia natura loko, vivan kaj ĝuantan je la radioj de la sopirata lumo.

4. Plue en Kampanio, ĉe Castro dei Volsci<sup>47</sup>, dika ligno faliĝinta el alto frakasis la kapon al sacerdoto lin blindigante ĉe la maldekstra okulo.

Grunde renversite, li laŭtvoĉe tiel preĝpetegis sanktan Franci-

---

<sup>47</sup> Nun en Latio en teritorio de Frosinone.  
Legendo majora

skon: “Ho sanktega Patro, faru ke mi povu iri al via festo kiel mi promesis al viaj fratuloj”.

Estis fakte la vigilo de la sanktulo.

Li estis ĵus fininta eldiri tiujn vortojn, ke neatendite li leviĝis el grundo en la miro kaj jubilo de la kompatanta ĉeestantaro.

Dumfeste li ne ĉesis priskribi al ĉiuj la miraklon de la tuja resaniĝo akirita de la boneco kaj virto de la sanktulo.

5. Homo de Monte Gargano, dum dispecigi lignon en sia vitejo, per aĥilo frapis sian okulon, ĝin fendante en du partojn.

Perdinte ĉiun esperon en la perhoma flegado, li adresiĝis al la ĉielo, kaj kun granda fervoro promesis al sankta Francisko fasti la tagon de lia festo se tiu ĉi degnus lin sanigi.

La okula ero pendanta abrupte revenis al sia loko kaj tiama-niere kuniĝis kun la alia, ke ne plu eblis vidi iun ajn vundon. Tiu homo ekvidis tiel efike kiel antaŭe.

6. Ankaŭ filo de nobelo, denaskule blinda, akiris vidpovon per la meritoj de S. Francisko.

Ĝuste pro tio li estis nomita Iluminato. Kiam li atingis konvenan aĝon, dankema pro la favoro, survestis la veston de la Minoraj fratuloj. Kaj tiom progresis en la graco kaj virtoj, ke li ŝajnis filo de la vera lumo. Li vivfiniĝis en morto eĉ pli bela.

7. En kastelo najbare de Anagni kromnomita Zancati, iu kavaliro konita kiel Gerardo, estis komplete perdinta la vidpovon. Sed ĝin li reakiris, kaj jen kiel.

Du Minoraj fratuloj, revenintaj el foraj landoj, preterire petis gastigi je la nomo de sankta Francisko. Ili estis devotege akceptitaj ĉe la familio de kavaliro kaj malavare traktitaj.

La gastoj, post dankago al Dio kaj al la kavaliro, prenis for-

permeson kaj ree ekvojis al la pli proksima konvento. Sed iun nokton la sanktulo ensonĝe viziigis al unu el la du fratuloj kaj tiel parolis: “Leviĝu kaj haste iru, kun via kunulo, al la domo de tiu homo. Li ricevis en vi Kriston kaj min. Mi volas premii lian malavaran gastamon. Li fariĝis blinda pro kulpoj sakramente ne konfesitaj”.

Post tio li malaperis.

Obeante, la fratulo elsaltis el la lito por plenumi la ordonitaĵon. Li vokis ankaŭ la kunfraton kaj kune ekvojaĝis.

Atinginte la domon de la kavaliro, ili diris ambaŭ kion la unua estis aŭdinta kaj vidinta. La gastiganto restis vere mirplena, kaj konfirmis kion la sanktulo rivelis.

Senprokraste genuiĝinte antaŭ la sacerdoto, li sincere konfesis siajn kulpojn.

Ĵus la interna homo estis renovigita per la lumo de la graco, ankaŭ la ekstera homo tuj denove havis la lumon de la okuloj.

La famo de la miraklo revigligis en multaj la riverencon al la sanktulo, la neprecon de la humila pekkonfeso, kaj la malavaran gastigemon.

8. *Posta aldono*<sup>48</sup>. Homo estis false akuzita pri ŝtelo kaj Ottaviano, juĝisto en Asizo, verdiktis, ke al li estus deŝiritaj la okuloj.

La verdikto estus efektivigita de la kavaliro Otono pere de ekzekutistoj.

La malfeliĉulo, misformita laŭ horora maniero kun la okul-kavoj malplenaj ĉar perahile al li estis tranĉitaj la optaj nervoj, kondukigis al la baziliko de la sanktulo. Tien alveniginte, li genuiĝis ĉe la bazo de lia altaro kaj tiel preĝis: “Ho indulgega sanktulo, vi kiu konas mian senkulpon, redonu al mi miajn okulojn”.

Ne jam pasis tri tagoj kaj jen la du novaj okuloj, pli etaj, sed

---

<sup>48</sup> Farita de Fra Hieronimo el Ascoli, Generala Ministro 1274-1279.  
Legendo majora

ne malpli kristalpuraj kaj klaraj ol la unuaj, rebrilis sur lia vizaĝo.

La miraklo estis ĵuratestita de Otono, la ekzekutisto de la verdikto, ĉeeste de de sinjoro Jakobo, abato de Sankta Klemento, ordone de sinjoro Jakobo episkopo de Tivoli, enketisto pri la miraĵa afero.

Pri tio estis atesto ankaŭ frato Vilhelmo Romano. Devigite de frato Hieronimo, Generala Ministro de la ordeno de la Minoraj fratuloj, kaj de la forto de la virto de obeo kaj sud ĵuro kaj minaco de ekskomuniko, ke li diru la veron, tiel li esprimiĝis antaŭ multaj provincaj ministroj de la sama ordeno kaj aliaj eminentuloj: “Kiam mi estis sekulara mi konis tiun homon. Li havis la okulojn similajn al tiuj de la ceteraj personoj. Mi ĉeestis kiam la verdikto estis efektivigita. Eĉ, mi mem per bastono renversis tiujn okulojn sur la grundo kien ili estis ĵetitaj. Poste mi havis okazon renkonti tiun homon. Li havis du okulojn kaj trebone vidis”.

## VIII

### DIVERSAJ KROMAJ RESANIGOJ EFEKTIVIGITAJ DE LA SANKTULO

1. En Città della Pieve travivis junulo almozanta, surda kaj muta ek de la naskiĝo. Li havis lango tiom kurta kaj subtila, ke ŝajnis al ĉiuj, ke ĝi al li estis tranĉita.

Pro amo al Dio li estis gastigita ĉe ulo nomita Marko. La malfeliĉulo sin vidinte flegata per tioma zorgo kaj afableco, kontente loĝadis kun sia bonfaranto.

Iun vesperon, dummanĝe, Marko diris al sia edzino je la ĉeesto de la surdmutulo: “Se sankta Francisko degnus al li donaci aŭdpovon kaj parolpovon, kia miraklo granda estus tiu! Nu, se li min elaŭdos, mi votas, ke mi lin vivtenos ĉe mi ĝis lia morto”.

Dirite farite. La lango de la surdmutulo pligrandiĝis, malfemiĝis liaj oreloj kaj tiel ekparolis: “Gloro al Dio kaj al sankta Francisko! Jen, mi parolas kaj aŭdas! Sankta Francisko min sanigis!”.

2. Fratulo Jakobo el Isco infanaĝe estis trafita de hernio tre grava. Vokiĝinte de Dio ek de plej frua junaĝo, li volis fratuliĝi en la ordeno de S. Francisko, sed neniu konigis la malsanon kiun li portis ene de si.

Li ĉeestis la translokadon de la korpo de la sanktulo kaj tiam li sin rekomendis intense. Post kiam tiuj sanktaj korpaj restaĵoj esti deponitaj en la kesto, al tiu ĉi li alproksimiĝis kaj ĝin brakumis kun la tuta amelmontro de sia animo. Li demetis tiam la her-

nian zonon kaj ne plu spertis tiun suferojn. La visceroj estis reveninta al sia loko.

Je la sama malsano estis liberigitaj pro la meritoj de sankta Francisko fratuloj Bartolo el Gubbio, Anĝelo el Todi, pastro Nikolo el Ceccato, Johano el Sora, ulo el Pisa, alia el Cisterna, iu siciliano laŭnome Petro, loĝanto el Spello najbare de Asizo kaj multegaj aliaj.

3. En apudroma marĉejo, de kvin jaroj virino estis freneza, blinda kaj surda. Ŝi diŝiris siajn vestaĵojn per la dentoj, ne timis la mortrisojn de fajro kaj akvo. Al ĉiuj tiuj malfeliĉoj fine aldoniĝis ankaŭ epilepsio.

Sed la Sinjoro estis dispoziciinta uzi al ŝi kompaton. Iun nokton, iluminite je dia brilego, tiu povrulino vidis sidiĝinta sur alta trono la beatan Franciskon. Ŝi tuj ĝistere adorkliniĝis kaj humile petegis la saniĝon. La sanktulo hezitis ĝin koncedi kaj tiam la virino votis, ke mem ne senigu, kiom ple eble, almozon al kiu ajn ĝin petanto pro amo al Dio kaj al Sankta Francisko.

La sanktulo tiam, memorante similan promeson kiun ankaŭ mem estis farinta al la Sinjoro, ŝin tuj benis per krucsigno kaj al ŝi liveris la deziritan gracon.

Ĝuis je simila miraklo, laŭ fidinda fonto, ankaŭ junulino el Norcia, kaj filo de nobelulo, kaj nelaste aliaj personoj.

4. Petro el Foligno iam pilgrime iris al la preĝejo de sankta Mikaelo<sup>49</sup>, sed kun netaŭga spiritstato. Li estis tuj punata. Fakte, ĵus gustuminte iom da Li devis ilin toleri laŭ tri jaroj, dum kiuj li diŝiris sin mem, diris kaj faris horendaĵojn.

Dum hazardaj lucidaj intervaloj li sin turnis al sankta Francisko kiun al li oni sciigis plej potenca kontraŭ la diablaj povoj. Li

---

<sup>49</sup> Sur la monto Gargano.  
Legendo majora

eĉ iris preĝis ĉe lia tombo.

Li estis tuj liberigita el la inferaj spiritoj kiuj lin kruele diŝiris, ĵus apenaŭ lia mano tuŝis tiun sanktan deponaĵon.

Simila fakto konstatiĝis sur virino el Narni kaj sur multaj aliaj personoj pri kies diablaj molestadoj kaj diversformaj liberiĝoj estus trolonge rakonti.

5. Homo el urbo Fano, laŭnome Bonomo, paralizita kaj lepre malsana, kondukita de parencoj al la preĝejo de sankta Francisko, akiris perfekta sanigon el ambaŭ malsanoj.

Similan miraklon efektivigis sankta Francisko favore al iu Otono, junulo el San Severino. Estante tiu ĉi plenplena je lepro, li esprimis voton. Li poste sin kondukigis ĉe la tombon de la sanktulo kaj tie li estis perfekte sanigita,

Sankta Francisko sin montradis aparte inklina sanigi la leprulojn ĉar dumvive mem sin dediĉis en ĉiu humilo kaj kompatio je ilia servo.

6. Nobelino laŭnome Rogata, el la diocezo de Sora, laŭ dudektri jaroj estis afliktitaj pro sangofluo. Ŝi estis ankaŭ suferinta pro diversaj eskperimentoj sur ŝi faritaj de kuracistoj, tiel ke plurfoje ŝajnis, ke ŝi estus ĉesojele de morto pro granda elĉerpiĝo. Kiam oni apenaŭ sukcesis senfluigi laŭtempeto la fluon, ŝi ekŝvelis en la tuta korpo.

Iun tagon ŝi aŭdis infanon kanti, en la latina lingvo, la miraklojn efektivigitajn de sankta Francisko kaj kortuŝiĝis ĝislarme. Ard-iĝinte sekve je viva fido, tiel ŝi ekpreĝis en sia koro: “Ho beata Patro sankta Francisko, kutimiĝanta koncedi tiom da favoraĵoj al viaj devotuloj el la tuta mondo, se vi degnus sanigi ankaŭ min, via gloro kreskus ĉar similan miraklon vi ne jam plenumis”.

La humila preĝo estis elaŭdita: pro la meritoj de la sanktulo la

virino sin sentis perfekte sanigita el sia malsano.

7. Prakseda estis roma virino je aparta pieco. Ek de sia infan-aĝo, pro amo al la dia Edzo, laŭ preskaŭ kvardek jaroj ŝi sin tenis fora el la okuloj de l' mondo, vivante en ĉambreto.

Iam ŝi devis supreniri subtegmenton pro iuj siaj aferoj. Kaptite de kapturino, ŝi falis suben, sin frakasis piedon kaj kruron kaj elartikigis ŝultron.

Dum ŝi estis sterne surgrunde al ŝi aperis la tre indulgema Patro, blanka je ĉielaj vestoj kiu, preninte permane, ŝin levis dirante. "Leviĝu, ho benata filino, leviĝu kaj ne timu". Poste li malaperis.

Prakseda rigarde turnis la okulojn ĉirkaŭen. Ne plu vidinte iun ajn, ŝi opiniis ke mem songis. Sed poste, je la lumo kiun oni al ŝi portis altirite de ŝiaj krioj elmetitaj dumfaliĝe, ŝi klare komprenis, ke s. Francisko ŝin komplete sanigis. Kaj detale rakontis, de eko kaj maleko, tion kio al ŝi okazis.



## IX

### LAŬDANTOJ DE LA SANKTULO KAJ PROFANANTOJ DE LIA FESTO

1. En la vilaĝo de Simon ĉe Poitiers, sacerdoto, laŭnome Reginaldo, estis ordoninta al siaj parokanoj publike celebri la feston de S. Francisko, al kiu li persone estis tre devota.

Sed popolano, kiu ne konis la potencon de la sanktulo, ekmo-kis tiun instigon kaj, guste en tiu tago, volis iri rikolti brullignon.

Alveninte tamen la lokon, dum li engaĝiĝis eklabori, voĉo in-sista laŭ tri fojoj sin aŭdigis ĉe liaj oreloj.: “Hodiaŭ estas festota-go, ne licas por vi labori”.

Tiu temerarulo ne konsentis eĉ ne tiun elĉielan voĉon. Kaj ti-am la dia ĉiopovo senprokaste provizis miraklon kaj punon je gloro de la sanktulo. Fakte, al li la du manoj ekligiĝis tiel ke ne eblis ilin agadigi, unu al la forko kaj la alia al la hakilo jam alten levitaj por frapi.

Tiu ulo, nescia pri kion fari kaj preskaŭ nesinrega, resekvis siajn spurojn kaj haste iris la preĝejon.

Homoj alkuris vidi. Dum li staris tute humilmiene antaŭ la al-taro, laŭkonsile de iu el multaj sacerdotoj kunvenintaj por festi, humile sin konfidis al Sankta Francisko kaj elmetis en sia koro tri votojn, nome laŭtkvante da voĉoj aŭditaj: celebri lian feston, eniri tiuokaze tiun ĉi saman preĝejon, viziti lian tombon.

Popolo, kiu devote preĝpetis por li, vidis tiam malligi, je la u-nua voto, fingron de unu mano; je la dua, alian fingron; je la tria, konstatis liberiĝintaj la ceterajn fingrojn kaj la tutan alian manon.

La homo povis demeti siahelpe la hakilon kaj forkon dum la preĝejo rehelis himnojn al la Sinjoro kaj al la povo de la sanktulo, kiu tiom mirinde povis frapi kaj savi.

La du iloj ĝisnun troviĝas pendantaj, memorcele pri la mirakloj, antaŭ la altaro tie konstruita honore de la sanktulo.

Aliaj sennombraj mirindaĵoj estis okazigitaj poste en tiu vilaĝo kaj en la lokoj ĉirkaŭaj. Ili atestas la elstaran gloron atribuitan al la sanktulo en la ĉieloj kaj la devon kiun ni havas devote celebri lian feston.

2. Simila evento okazis ankaŭ ĉe Le Mans. Malgraŭ la festo de S. Francisko, virino ne timis ŝpini. Tamen ŝi tuj sentis rigidiĝantaj la manojn kaj bruliĝantaj la fingrojn.

Tiu puno estis perfekta instruisto. fakte, ŝi rekonis en la malfeliĉo efekton de la potenco de Sankta Francisko. Pro tio ŝi humilimiene helpetis al liaj fratuloj. Ili preĝpetegis la tre indulgeman sian Patron kaj la graco estis tuj akirita. La manoj estis al ŝi malrigidigitaj kaj neniuj signoj en ili pludaŭris, nur spurvundaĵo memorigis kion ŝi spertis.

Ankaŭ en la Kampanio feliĉa, Valladolid kaj Piglio, aliaj virinoj, kiuj neniom estimis la feston de Sankta Francisko, estis mire punitaj kaj poste eĉ pli mire sanigitaj post sincera pento.

3. Kavaliro el Borgo, teritorie Massa, kun tre senhonta aŭdaco nigrigis la verkojn kaj miraklojn de Sankta Francisko. Mokadis li ankaŭ la pilgrimantojn irantajn honori la memoron pri la sanktulo kaj per kolerplenaj vortoj publike insultis la fratularon.

Iam eĉ li agis eĉ pli aĉe. Post elverŝado de sia opresa galo konstanta la gloron de la sanktulo, elpensis la jenan fian proponon: “Se veras, ke tiu Francisko estas sankta, mia korpo falu hodiaŭ trapikita de glavo. Kaj se li sankta ne estas, ĝi restu senvunda!”.

La dia kolero ne malfruis devontigi la vortojn de blasfemulo. Post kelke da tempo lia nepo, de li insultita, enpikis spadon en lian ventron. La filo de mallumo pereis en tiu sama tago fariĝante akiro de la infero.

La puno ekzemplis kiel invito ne malŝati, sed male honori per la ŝulditaj laŭdoj la mirindajn miraklojn de Sankta Francisko.

4. Iu juĝisto, laŭnome Aleksandro, trafis en samtipan punon pro tio ke li engaĝiĝis, per klaĉemo, kiom eble plej povis forigi homojn el la kulto al Sankta Francisko. Fakte, laŭ ses jaroj li restis muta.

Pro la granda sufero trudita de tiu muteco, frukto de sia peko, li pentis esti klaĉinta kontraŭ la mirakloj de la sanktulo. preĝis kaj pentofaris. La mizerikorda Patro ne insistis en la indigno. Li lin kompensis la reekkoncion kaj redonis la sopiratan paroluzadon.

De tiam, iĝinta plibona kaj devota per tiu puno, li elspezis sian langon por laŭdi la sanktulon.

## X

### KROMAJ MIRAKLOJ

1. Iu virino, pernome Maria, el Gagliani Aterno, el la diocezo de Sulmona, multe devota al Jesuo Kristo kaj al S. Francisko, iris, iun someran tagon, kamparon por sin provizis pri vivnecesaĵoj.

Ĉar varmegis laŭnetutime, la povrulino eksentis soifardojn. Preterpasante, sola, aridan montetaron foran el enloĝataj lokoj, certamamente ŝi lasis sin fali grunden preskaŭ senviva kaj mensekore alvokis sian protektanton.

Poste, frustrante amemajn kaj humilajn preĝojn ŝi ekdormis senfortigita de la peno, febligita de la soifo kaj varmo.

Malsupreniris tiam S. Francisko el la ĉielo, ŝin laŭnome vokis kaj tiele parolis: “Leviĝu kaj trinku el la akvo kiujn por vi kaj por multaj la dia ĉiopovo fontigis en tiu momento el la tera sino”.

La pia virino je tiu voĉo vekigis, ĝoje permane kaptis apudan filikon, ĝin deŝiris el la radikoj kaj per ligneto fosis ĉirkaŭ de ili. Unue la grundo humidiĝis, poste ekvenis akvo-fadeno kiu fine fariĝis vera fonto.

Ŝi sate trinkis. Per la mirakla akvo, poste, ŝi banis siajn okulojn kiujn, antaŭe vualitajn pro longa malsano, de tiam sentis kapablaj je nova lumpercepto.

Ŝi haste revenis sian hejmon kaj al ĉiuj rakontis la mirindaĵon. Popolo tiam el ĉiupartoj alkuris tiun lokon. Multaj eltiris avantaĝon de la virto de tiu akvo, ĉar ili estis je ĝia kontakto liberigitaj, post sincera konfeso, el diversaj malsanoj.

Tiu fonto pludaŭras. Apude estis konstruita preĝejeto dediĉita

la sankta Francisko.

2. Viro el Sahagun, en Hispanio, kiu kun fido sin rekomendis al sankta Francisko, akiris ke sia ĉerizarbo tute sekigita reverdiĝu kaj plenpleniĝu je floroj kaj fruktoj.

Sankta Francisko savis ankaŭ la regionon Villasilos el la invado de raŭpoj korodantaj la ĉirkaŭajn la vitejojn.

Al sacerdoto el Palencia li koncedis, ke en lia grenejo ne plu aperu tritika anobio.

Al sinjoro el Petramala li koncedis, ke lia tero estu imunigita kontraŭ raŭpoj kiuj ĉie kaŭzis ruinojn.

3. Iu Martino estis kondukinta al la paŝtejo la bovaron iom fore de la borgo. Bovo falis kaj rompis sian kruron. Ĉar ne sukcesis aranĝi la manieron ĝin savi, Martino decidis ĝin senpeligi. Sed li eĉ ne disponis pri iloj taŭgaj.

Vespere, ĉe la momento de la reveno, li ĝin rekomendas al sankta Francisko kaj li konfidis por ke dumnokte ĝin defendu el la lupoj.

La posta tagon hastege li revenis kun ĉesele la feltranĉilo, sed grandmirigite li trovis la bovon paŝtiganta. Ĝi estis tiom saniĝinta, ke ne eblis distingi la kruron rompitan el tiu sana.

La kamparano dankis al la sanktulo kiu estis aginta kiel bona paŝtisto por lia bovo kaj estis trovinta en la potenco de la miraklo efikegan rimedon por ĝin sanigi.

La humila sanktulo kutimas helpdoni al kiu ajn lin preĝpetanta. Ankaŭ en malgrandaj bezonataĵoj li korfavore alkuras.

Ni scias, fakte, ke li igis redonita al viro el Amiterno la ŝarĝobeston ŝtelitan, rekombinis nova pelvon, hazarde dispecigitan, por virino el Antrodoco, riparis vomeron, senfunkciigitan pro frakturo, de ulo el Montolmo en Markioj.

4. En la diocezo de Sabina, virino, antaŭ ol morti, estis lasinta sian infanon ankoraŭ mamnutrobezonan. al sia patrino jam okdekjaraĝa.

Ekstreme malriĉa, tiu mizerulino ne sciis kion fari ĉar neniu virino konsentis ĝin mamnutri. Nature, la kreaĵeto febliĝis ĉiam pli.

Iun nokton, sena je ĉiuspeca homa helpo, ŝi sin turnis al S. Francisko. La enamiĝanto de la senkulpuleco, al ŝi aperis dirante: “Estas mi, Francisko, kiun vi fervorege preĝalvokis. Alproksimigu viajn mamojn al la buŝo de la infano; vi vidu, ke Dio ilin plenumos per abunda lakto”.

La virino tuj obeis. Kaj jen kia Mirindaĵo! La maljunulineto jam okdekjaraĝa produktis lakton grandsate.

La famo de miraklo disvastiĝis. Viroj kaj virinoj alkuris vidi. Antaŭ fakto tiom mirinda estis ĉiuj flamaj pro sankta entuziasmo kaj gloris la Sinjoron kaj nemalpli la virton kaj kompaton de la sanktulo.

5. Geedza paro el Scoppito estis ĉiam ĝemantaj pro tio ke ilia solgenerita filo aperis kiel monstro kun la brakoj torditaj ĉirkaŭ la kolo, la genuoj fiksitaj al la brusto kaj la piedoj al la gluteoj.

La virino, kiu estis la pli afliktita, ĝeme preĝis por ke Jesuo Kristo, pro la meritoj de sankta Francisko, degnus ŝin konsoli per miraklo.

Iun nokton, kaptite de mortoporta angoro, estis venkita de la dormo, dum kiu ŝi havis vizion: al ŝi aperis S. Francisko kiu, ŝin konsolante kun vortoj kompatplenaj, konsilis, ke ŝi haste iru proksiman lokon, dediĉitan al lia nomo, kaj per la akvo de puto tie enfosita aspergu la fileton je la nomo de la Sinjoro. La virino ne zorgis pri tiuj vortoj. Sankta Francisko tiam al ŝi reaperis. Eĉ ne tiukaze li estis obeata.

Al ŝi li denove aperis kaj mem, ŝin antaŭirante, kondukis la patrino kun la fileto ĝis la pordo de la loko indikita.

Ĝuste en tiu momento tien estis alvenintaj ankaŭ iuj devotaj kaj nobelaj matronoj, kiuj, aŭdinte la detalan rakonton pri la vizio, prezentis la povrulinon al la fratuloj.

Ili mem hastis poste ĉerpi akvon el la puto kaj la plej nobela lavis la infanon. La membroj de la malfeliĉulo reiris la naturan pozicion kaj la monstreto reakiris la laŭregulan homan fizionomion.

Antaŭ la brueganta miraklo ĉiuj trempigis tramirinde.

*Posta Aldono.* En Susa, junulo el Rivarolo Canavese, laŭnome Ubertino, enirinta la Ordenon de la Minoraj fratuloj, dumnovica provo pro granda teruro freneziĝis, kaj estis frapita de paralizo de la tuta dekstra korpa flanko, perdis la aŭdpovon, la parolpovon, la monpovon kaj la konkapablon.

Tiel reduktite, li plurtagojn kuŝis en lito dum liaj kunfratuloj grande suferis.

Sed postevenis la festo de S. Francisko, kaj dum ties vigilo, en momenta lucida intervalo, la malsanulo ekpreĝis la bonan Patron per vortoj miskunigitaj, sed fidoplenej.

Sekvan matenon, dum la fratularo troviĝis en la preĝejo absorbita en la diaj laŭdoj, S. Francisko al li aperis fratule vestita kaj aŭreolita per brilega lumo.

Per la mano flugtuŝis lian la paralizitan parton, metis fingrojn sur liajn orelojn kaj signe premis sur la dekstran humeron, tiel dirante: “Filo mia, estos por vi memoraĵo kiun la Sinjoro pere de mi vin komplete sanigis”.

Li plue lin zonis per la ŝnuro ĉar la novico estis kuŝanta sur lito sen ĝi kaj ordonis, ke li leviĝu kaj kuniĝu al la aliaj en la preĝejo por laŭdkanti al la Sinjoro.

La junuleto streĉis la manojn por lin tuŝi, kaj mem eĉ volus

kisi liajn piedojn dankeme pro la ricevita graco, sed la sanktulo jam malaperis.

La fratularo, kiu lin neatedite vidis inter si, la partoprenantoj en la preĝejo, sciintaj pri kiuj malsanecoj li estis frapita, mirkonsternitaj kvatadis.

Le la rakonto pri la vizio flamigis je amo al Kristo kaj je devoteco al S. Francisko.

6. En Cori, diocezo de Ostia, viro estis perdinta la uzon de unu kruro, tiel ke li nek povis marŝi kaj nek moviĝi efike kaj libere.

Tra tiaj gravaj mizeroj, manka je espero en la homaj rimedoj, iun nokton jene li ekis plendi kun sankta Francisko, kvazaŭ li lin vidus ĉeesta: “Sankta Francisko, helpu min! Memoru, ke mi servis la vi dumvive kaj ke mi estis ĉiam devota al vi. Mi vin rajdigi sur mia azeneto, kisis viajn piedojn kaj manojn kaj estis bonfara al vi. Kaj nun, vi vidu, mi estas tiel turmentita ĝismorte”.

La sanktulo lin aŭdis el la ĉielo kaj, memorante pri la bonfaroj ricevitaj, dankeme pro tiu sincera devoteco, al li aperis, dum tiu ankoraŭ vigilis kune kun fratulo. “Jen, mi estas tie ĉi - li diris. - Mi aŭdis viajn pledojn. Mi venas nun por reciproki vian karitaton vin liberigante el viaj malsanoj”.

Per eta bastono en formo de *Tau* tuŝis lian lezitan parton kaj la tumoro malfermiĝis kaj malaperis. Tiu homo reakiris la uzon de la kruro. Sed kio vekas pli da miro estas ke, je porĉiama memoro pri la miraklo, anstataŭ la vundo resanigita restis stampita la *Tau*.

7. Sed jen, nia menso, jam distrita pro la vero de la rakontoj pri la mirindaĵoj, nun kuntiriĝas ĉikaŭe *tau*, signo de nia savo. Tio ne okazas sen dia volo. La standardisto de la kruco ĝuste me-



ritas tion. Same kiel la kruco estis por li, perfektega imitanto de Kristo, la kulmino de merito kaj savo, tiel nun, dum li regnas en la ĉieloj, la sama kruco estas por li neskebla atesto de gloro.

8. Laŭvere, la mistero de la kruco, tiel profunda kaj mirinda, en kiu kaŝiĝas la graciaj karismoj, la meritoj de la virtoj, la trezoroj de saĝo kaj scienco, tiu altega mistero nekonigita al saĝuloj kaj prudentuloj de la mondo, estis al li, malriĉulo de Kristo, tiel klare senvualita, ke ĝi fariĝis la sola lia vojo, la sola lia dolĉeco, la sola objekto de liaj predikoj.

Tiel ke, ĉe la ekkonvertiĝo, li povis kun la apostolo afirmi tute laŭvere: *“Sed por mi ne estu fanfaronado krom pri la kruco de nia Sinjoro Jesuo Kristo, per kiu la mondo estas krucumita al mi kaj mi al la mondo (Gal 6,14)”*.

Li povis ankaŭ kun ne malpli da vero aldoni estonte: *“Kaj sur kiuj irados laŭ tiu regulo, estu paco kaj kompatado (Gal 6,16)”*.

Kaj fine li povis plenevidente fini siajn elstarajn tagojn laŭ jenaj vortoj: *“mi portas en mia korpo la signojn de Jesuo (Gal 6,17)”*.

Volu la ĉielo ke nun, el la Paradizo, tage laŭtage li diru al ni: *“La graco de nia Sinjoro Jesuo Kristo estu kun via spirito, fratoj. Amen (Gal 6,18)”*.

9. Ho glora stardardisto de Kristo, vi fieru, jam certa en la gloro de la kruco, vi kiu per ĝi donis ekan al la nova vivo, kies pliposte sekvis la spurojn kaj en ĝi vi atingis perfektecon.

Jen la sama kruco vin igas nun atesto kaj diras al ĉiuj kioman gloron vi ĝuas el ĉielo.

Vin sekvu, tial, kun vizaĝo alta, kiu preterlasas la Egiption de tiu ĉi mondo. Laŭ la vojo desegnita de la krucligno kaj pro ties

virto, tiu superos la dezertojn kaj alvenos, post la marŝado tra Jordano de la efemeraj tagoj, al la promesita tero de la vivantoj.

Tien nin enmetu la vera kondotiero kaj Savinto de l'mondo, Kristo Jesuo krucumita, pro la meritoj de lia servo Francisko, por la laŭdo kaj gloro de Dio unueca kaj trieca, kiu vivas kaj regnas en la jarcento de la jarcentoj. Amen.

(Esperantigita el la latina de Armando Zecchin. Aprilon 2008a.)

Trakukista fina noto:

Sankta Francisko (1182-1226) estas unu el la plej eksterordinaraj figuroj de la historio. Lia entuziasmo, lia simpleco, lia radikaleco, subtenataj de mistika elano kaj de la amo al Dio, kaj al unuopa homo kaj al ĉiu estaĵo, faras el li personulon je granda intereso kaj aktualeco.

Akompanate de sia Edzino, “Damo Malriĉo”, Francisko trapasis la landlimojn de Asizo kaj de sia tempo, trairis jarcentojn ĝis atingi niajn tagojn, kaj abunde donacis la ĉarmaĵojn de ia kristana atesto unika siagenra. Ĉiuj kiuj alproksimiĝis al li, ĉiupoke kaj ĉiukondiĉe, estis allogitaj de la riĉeco de lia humaneco kaj arda deziro similiĝi al Jesuo.

Tiu ĉi Vivo de Sankta Francisko, dirita ankaŭ *Legenda major* (Legendo Majora), kiun sankta Bonaventuro, taskite de la ĝenerala Kapitulo de la franciskana ordeno de 1260, laŭ nesuperata maniero kontribuis konigi la Malriĉulon de Asizo. La aŭtoro, en rakonto riĉa je informoj kaj je profunda spirita fono, desegnas serenajn kaj objektivan profilon de la sanktulo kaj elfosas, en ekvilibra sintezo, la esencon de lia mesaĝo.

Sankta Bonaventuro el Bagnoreggio (1221-1274), la *doctor seraficus* (serafa doktoro), eniras la ordenon de sankta Francisko en 1243 kaj fariĝas doktoro en teologio en Parizo. En 1257 estas elektita ĝenerala ministro de la ordeno, kiun li gvidas kaj plisolidigas per decida kaj saĝa agado. Konsiderita unu el plaj esltaraj teologoj de la Mezepoko, li krom tiu *vivo de Sankta Francisko*, skribis plurajn verkojn pri teologio, kaj ekzegezo kaj mistiko. Kaj estis kanonizita en 1442 de la papo Siksto la Kvina.